

ENHAVO

1

LINGVOEVOLUO.....	4
1.1. Komplikeco de Esperanto.	4
1.2. Socia lingvoevoluo.	4
1.3. Internacieco.	5
1.4. Funkcioj de lingvoj.	5
1.5. Facileco de Esperanto.	6

2

FONETIKO.....	7
2.1. Fonologio kaj fonetiko.	7
2.2. Fonemo.	7
2.3. Sonsistemo de Esperanto.	7
2.4. Vokaloj.	7
2.5. Duonvokalo kaj diftongoj.	8
2.6. Longeco de vokaloj.	8
2.7. Hiato.	8
2.8. Konsonantoj.	8
2.9. Asimiliĝo.	9
2.10. Duoblaj konsonantoj.	9
2.11. Akcento.	9

3

ORTOGRAFIO.....	10
3.2. Grafemo.	10
3.3. Alfabeto.	10
3.4. Literumado.	10
3.5. Mallongigoj.	11
3.6. Majuskloj.	11

4

VORTFARADO.....	14
4.2. Analizo, sintezo kaj polisintezo.	14
4.3. Morfemoj leksikaj kaj gramatikaj.	14
4.4. Aglutino kaj fleksio.	15
4.5. Vortkategorioj.	15
4.6. Radikkarakteroj.	16

4.7. Samelementeco kaj proprafunkcieco.	16
4.8. Substantivaj radikoj.	17
4.9. Adjektivaj radikoj.	17
4.10. Verbaj radikoj.	17
4.11. Vortkunmetado.	18
4.12. Substantivaj kunmetaĵoj.	18
4.13. Adjektivaj kunmetaĵoj.	18
4.14. Verbaj kunmetaĵoj.	19
4.15. Adverbaj kunmetaĵoj.	19
4.16. Derivado.	19
4.17. Veraj afiksoj.	20
4.18. Afiksoidoj.	20
4.19. Fremdaj afiksoj.	20
4.20. Vortoj uzataj en la funkcio de afiksoj.	21
4.21. Fakaj afiksoj.	21
4.22. Plurelementaj kunmetaĵoj (derivaĵoj).	21
4.23. Inversa vortefiko.	21
4.24. Vortgrupoj.	22
4.25. Mallongigoj kaj akronimoj.	22
4.26. Ŝanĝo de la vortsignifo.	22
4.27. Fremdaj vortoj.	22
4.28. Terminologiaj principoj por la fakliteraturo.	23

5

MORFOLOGIO.....	25
5.1. Vortspecoj.	25
5.2. Substantivo.	25
5.3. Adjektivo.	30
5.4. Pronomo.	32
5.5. Numeralo.	35
5.6. Verbo.	40
5.7. Adverbo.	53
5.8. Prepozicio.	57
5.9. Konjunkcio.	63
5.10. Subjunkcio.	64
5.11. Interjekcio.	64

6

SINTAKSO.....	66
6.2. Vortsintakso.	66
6.3. Propozicio-sintakso.	71

7

VORTPROVIZO.....	82
7.1. Leksika bazo.....	82
7.2. Ŝhemismo kaj naturalismo.	83


8

STILISTIKO.....	85
8.1. Stilaj ebenoj.	85
8.2. Stiligadoj neŭtrala kaj sent-esprima.	85
8.3. Vortfiguroj kaj pensofiguroj.	86
8.4. Frazeologiaj esprimoj.	86
8.5. Kelkaj stilaj apartaĵoj de Esperanto:.....	86

9

TRADUKADO.....	87
9.1. Specoj de tradukoj.	87
9.2. Teorio de bildo.	88
9.3. Kontraŭaj opinioj pri la manieroj de tradukado.	88
9.4. Evoluo de la tradukmetodoj en la historio.....	89
9.5. Tri etapo de la tradukista laboro.....	90
9.6. Procedo de la tradukado.....	93
9.7. Studoj pri la aŭtoro.	93
9.8. Libereco de tradukanto.	94
9.9. Kvin tipoj de ekvivalenteco ĉe tradukado.....	94
9.10. Danĝero de troa banaleco kaj logikeco en traduko.....	95
9.11. Kulturaj diferencoj.....	95
9.12. Kompensoj.	96
9.13 La preparo de la tradukonto.....	96

LITERATURO	98
Esperantlingva:.....	98
Ĉeĥlingva pri translatologio.....	98



LINGVOEVOLUO

1.1. Komplikeco de Esperanto.

La liliputa gramatiko, kiu sufiĉis por la komencantoj, estas tute nesufiĉa por tiuj, kiuj volas Esperanton majstri. La lingvo ja ne konsistas sole el la vortoj kaj gramatikaj finaĵoj. Ankaŭ stilaj reguloj okupas en ĝi gravan lokon. Ĉiu esperantisto tendencas apliki en Esperanto kutimojn kaj idiomojn el sia gepatra lingvo, sed ĉar ili tre diferencas ĉe unuopaj naciaj lingvoj, estis necese detale prilabori la gramatikon kaj por ĉiu stila problemo trovi solvon kiel eble plej logikan kaj internacian. La malfacilaĵoj en Esperanto do fontas en la malakordo inter la logika lingvo internacia kaj nelogikaj lingvoj naciaj.

Krome, ĉiu lingvo estas rimedo de pensado kaj komunikado. Kiel tia ĝi devas esti sufiĉe malsimpla kaj komplika, por ke ĝi kapablu esprimi ĉiujn ideojn, ĉiujn delikatajn nuancojn de la homa pensado, kiujn la uzantoj bezonas esprimi en la vivo, laboro kaj literaturo. La fakto, ke ankaŭ la detala gramatiko estas studebla en Esperanto sen troa penado, pravas, ke malgraŭ la malsimpleco la lingvo restis relative facila.

1.2. Socia lingvoevoluo.

En la mondo ekzistas 3 ĝis 5 mil lingvoj. Ili ĉiuj estas perfektaj kaj samkvalitaj rimedoj de esprimado, ne grave, kia estas ilia ekstera aspekto. La laika klasado de lingvoj je "belaj" kaj "malbelaj" estas subjektivisma kaj nescienca. Bela teksto restos same bela en ĉiuj lingvoj de la mondo. La lingvoj kun mallonga literatura tradicio povas esti provizore malpli tralaboritaj, sed ne malpli kvalitaj - post certa tempo ili atingos eĉ la lingvojn plej kulturitajn. Grave estas, ke la lingvoj ne estu "mortaj", ne aplikataj en la praktiko, ili devas esti "vivaj", uzataj kaj evoluigataj de miloj, centmiloj aŭ milionoj da homoj. La socia lingvoevoluo estas la ĉefa motoro, kiu vigligas la lingvojn, aktualigas ilian vortaron kaj frazaron.

Ankaŭ la internacia lingvo bezonas stari sur siaj propraj kruroj kaj evolui laŭ la postuloj de la praktiko, ne dependante de aliaj lingvoj. Por tiu celo estas necese precipe, ke la uzantoj

bone majstru la lingvon. Ili devas esti kapablaj kreadi novajn vortojn kaj frazeologiaĵojn, adaptadi la lingvon por la esprimado en la ĉiutaga vivo, en la beletro kaj en la faka literaturo. La skeme regula gramatiko kaj libera vortfarado ebligas al la esperantistoj bone orientiĝi en la lingvo, facile riĉigadi kaj profunde tralaboradi ĝin, kvankam Esperanto ne estas por ili patrolingvo. La Akademio de Esperanto prezentas multajn teoriajn rekomendojn al la publiko, sed pacience atendas tutajn jardekojn, kiel la situacio evoluos en la praktiko, ĉu la publiko akceptos la rekomendojn aŭ ne. Kio estas bona kaj bezona, estas plej ofte akceptata - nur escepte venkas la bonajn ideojn la malbonaj -, dum tio, kio estas malbona aŭ senbezona, falas en forgeson kaj silente forlasas la lingvon.

En ĉi tiu socia evoluigado de Esperanto konsistas la sekreto de ĝia relativa sukceso. Ĉiuj ceteraj projektoj de internacia lingvo estis de siaj aŭtoroj destinitaj por "sciencia" evoluo, t.e. laŭ la teorioj de filologoj, sen la praktikado fare de la amatora publiko. Malgraŭ la asertado, ke tiuj projektoj "aspektas multe pli science" ol Esperanto, ili ne sukcesis enradikiĝi en la vivo, ĉar ili ignoris la socian evoluigadon de lingvoj. Sole Zamenhof havis tiom da memdisciplino, ke li post unu jaro cedis de ĉiuj aŭtoraj rajtoj kaj tiamaniere ebligis al ĉiuj adeptoj de la lingvo aktive partopreni en ĝia plua pliperfektigado.

1.3. Internacieco.

La pensado kaj parolo estiĝis samtempe (iam en la praepoko), ĉar sen pensado ne eblas paroli, sen parolo ne eblas pensi. Pli poste evoluis ankaŭ la lingvo kiel sistemo de sonaj simboloj. Nun neniu scias, ĉu la lingvo ekestis origine sur unu loko de nia planedo (monogeneza teorio) aŭ sur pluraj lokoj (poligeneza teorio). Tamen estas certe, ke ĉiujn lingvojn influas faktoroj disigaj (obstakloj de la naturo: maroj, riveroj, montaroj, arbaroj, dezertoj ktp.), kiuj kaŭzas diferencigadon de parencaj lingvoj, kaj faktoroj kunigaj (komerco, militoj, internacia kunlaboro), kiuj proksimigas al si eĉ lingvojn neparencajn. En la pasinteco ofte pli forta popolo

trudis sian lingvon al popoloj malpli fortaj, kiuj modifis tiun lingvon per elementoj de siaj lingvoj kaj formis tiamaniere lingvojn tute novajn, kvankam parencajn. Ekzemple el latinaj dialektoj, modifitaj per lingvoj iberaj, ĝermanaj, keltaj kaj slavaj, formiĝis la franca, hispana, portugala, rumana k.a. En la nuntempo la riĉa internacia kunlaboro rezultigis dekmilojn da internaciaj vortoj, sur kiuj elkreskis ankaŭ la lingvo internacia.

Sed taksu la internaciecon oni devas tre atente. Por eŭropanoj estas pli internacia "toreadoro" ol "toreisto", ĉar la unua n vorton uzas ĉiuj eŭropaj lingvoj, dum la duan ne. La neeŭropanoj utiligas en siaj lingvoj nenian el la d u vortoj, sed "toreisto" estas regula kaj tial por ili multe pli internacia, tutmonda, dum la neregula "toreadoro" estas nur eŭropa.


1.4. Funkcioj de lingvoj.

La lingvo plenumas en la homa socio plurajn funkciojn, por kiuj ĝi adaptas siajn esprimrimedojn. Ĉiu lingvo konsistas el diversaj stiloj (komunuza, beletra, publicista, administra,

faka), kiuj diference laboras kun la lingva materialo. La faka stilo bezonas tre altan precizecon kaj unusencecon, por ĉiu nocio sole unu terminon kaj ĉiun terminon precize difinita. La beletro male klopodas pri kiel eble plej granda riĉeco, pri multaj sinonimoj, pri vortoj sent-esprimaj, dum la precizeco ne gravas; ne malofte la verkistoj intence formulas siajn frazojn dusence por enkaŝi ironion aŭ por streĉi la nervojn de la leganto (detektivaj romanoj). La administra stilo estas severa, rigora kaj logika, ĉar la administraj tekstoj havas juran karakteron. La komunuza stilo servas al la homoj en la privata ĉiutaga vivo, ĝi tendencas uzi slangajojn. La publicista stilo estas hibrida, kiu per beletraj rimedoj priskribas sciencajn aŭ teĥnikajn fakojn (popularscienca literaturo), historiajn kaj politikajn aferojn (la literaturo de faktoj) aŭ okazaĵojn el la vivo (artikoloj pri interesaj eventoj kaj personoj). Specialan stilon postulas verkoj dediĉitaj al infanoj kaj junularo.

1.5. Facileco de Esperanto.

La facileco de Esperanto estas nurrelativa; kompare kun aliaj lingvoj ĝi havas pli fonetikan ortografion, pli regulajn deklinacion, komparacion, konjugacion kaj vortfaradon. La esperantistoj lernas parkere nur la radikvortojn, ceterajnesprimojn ili formas per derivado, kunmetado aŭ grupigado. Tamenrestas sufiĉe da lernenda materialo, kiu konsumas konsiderindegrandan kvanton da fortoj de ĉiu lernanto. Necesas konscii, ke nesufiĉas memori la vortojn kaj gramatikajn regulojn. Oni devas lerniuzi ilin, kapabli pensi en Esperanto sen helpo de la gepatra lingvo, kulturi sian lingvosenton. Tiuj kapabloj dependas de la biologiaj proprecoj de la homa cerbo, kiu ebligas nenium alian vojon por akiriilin krom diligenta kaj fervora trejnado. La lernanto devas tiomlonge trejni kaj provi paroladon, ĝis li akiros certan rutinon. Postevenas neceso trastudi detalan gramatikon kaj per ekzercado fiksiĉiujn akiritajn sciojn. Multaj gekursanoj alpaŝas la lernadon de Esperanto kun naivaespero, ke ĉi tiu lingvo estas tiom facila, ke ĝi lerniĝos per si mem, ke tra leginte la lernolibron ili post du tri semajnoj parolos internacilingve same bone kiel nacilingve. Kompreneble, la unuaj malfacilaĵoj senkuraĝigas ilin kaj ili antaŭtempe ĉesigas la lernadon sensukceso. Ne malmultaj estas ankaŭ tiuj gekursanoj, kiuj studas kiel sianĉefan fremdan lingvon la anglan, francan, rusan, germanan aŭ alian, dum Esperanto estas por ili nur flanka hobia. Se Esperanto estas dekoble pli facila - opinias ili - devas sufiĉi por ĝi dekonon detempo kaj diligento. En la realo Esperanto estas pli facila nur trioble aŭ maksimume kvinoble ol ceteraj lingvoj. Tial ankaŭ ĉi tiuj komencantoj ofte malsukcesas konkeri la internacian lingvon. Sed ni povasesperi, ke kun la kreskanta signifo de Esperanto en la socia vivo oni studos ĝin ĉiam pli serioze kaj sekve ankaŭ pli sukcese.



FONETIKO

2.1. Fonologio kaj fonetiko.

La fonologio studas sonojn, kiuj konsistigas la sonan sistemon de la lingvo. La fonetiko instruas, kiamaniere oni prononcu tiujn sonojn.

2.2. Fonemo.

La fonemo estas baza fonologia unuo, kapabla diferencigi signifojn. En Esperanto estas tia fonemo ankaŭ la voĉa DZ kontraste al la senvoĉa C (*edzo - eco*). Ekzistas la dentala nazalo N (*sono, puno*), kiu antaŭ K aŭ G povas esti prononcata kiel velara nazalo N (*manko, anglo*), sed la signifo de la vortoj ne ŝanĝiĝos, se oni prononcos ĝin dentale. La dentala kaj la velara nazaloj N formas unu fonemon, ili estas alofonoj de la fonemo N.

2.3. Sonsistemo de Esperanto.

Esperanto havas 29 fonemojn: 5 vokalojn (*a e i o u*), 1 duonvokalon (*ŭ*) kaj 23 konsonantojn (*b c ĉ d f g ĝ h ĥ j ĵ k l m n p r s ŝ t v z dz*).

2.4. Vokaloj.

La vokaloj ne metas obstaklon al la trairsta aerblovo. La labializitaj vokaloj (*o, u*) estas prononcataj per la lipoj, la nelabializitaj (*i, e, a*) ne. Laŭ la horizontala ŝoviĝo de la lango oni distingas vokalojn antaŭajn (*i, e*), centrajn (*a*) kaj malantaŭajn (*u, o*). Laŭ la vertikala leviĝo de la lango oni distingas vokalojn altajn (*i, u*), mezaltajn (*e, o*) kaj malaltan (*a*). Grava propeco de la vokaloj estas, ke ili estas silaboformaj.

vokaloj	antaŭaj	centraj	malantaŭaj
---------	---------	---------	------------

altaj	-/i	-/-	u/-
mezaltaj	-/e	-/-	o/-
malaltaj	-/-	-/a	-/-
labializitaj / nelabializitaj			

2.5. Duonvokalo kaj diftongoj.

La duonvokalo ŭ ne estas silabo-forma, sed ĝi formas diftongojn (*aŭ, eŭ, oŭ*), kiuj jam formas silabojn. Escepte ŭ povas troviĝi antaŭ vokalo: *ŭa* (infana ploro), *ŭaks* (rano), *ŭo* (nomo de la litero).

2.6. Longeco de vokaloj.

La akcentajn silabojn oni prononcas plilongaj ol la senakcentajn. Multaj silaboj estas longaj per si mem: *manko, sendi, finno, tondro, laŭdo, firsto*. Ĉe la ceteraj oni longigas la vokalojn: *a:mi, pe:ti, fi:no, ko:ro, e:dzo, re:ĝo, bele:co*. Se la dua el la du sinsekvaj konsonantoj estas R aŭ L, oni povas la vokalon prononci aŭ mallonge aŭ longe laŭ persona gusto: *patro* kaj *pa:tro*, *kadro* kaj *ka:dro*, *ebla* kaj *e:bla*, *pantoflo* kaj *panto:flo*.

2.7. Hiato.

La hiato estas renkontiĝo de du vokaloj (*hiato, mia, kreu, balau, la amo, flava oro*). Se interne de vorto unu el la vokaloj estas i, oni kutime prononcas inter ili malfortan j: *nia instruisto* (nija instrujisto).

2.8. Konsonantoj.

Dum la prononco de la konsonantoj en diversaj lokoj de la buŝkanalo estiĝas malhelpoj, kiujn la aerfluo devas venki aŭ eviti tra la nazo. Ĉe la elparolo de la voĉaj konsonantoj (*b v d z ĝ g h dz j m n r l*) la laringo vibras, ĉe la senvoĉaj ne (*p f t s ŝ ĉ k ĥ c*). Laŭ la estiĝloko oni distingas konsonantojn lipajn (labialoj), dentajn (dentaloj), gingivajn (gingivaloj), palatajn (palataloj), gorĝajn (velaroj) kaj laringajn (laringaloj). Laŭ estiĝmaniero oni distingas konsonantojn eksplodajn (plozivoj), frotajn (frikativo), eksplodo-frotajn (afrikatoj) kaj nazajn (nazaloj).

konsonantoj	labialoj	dentaloj	gingivaloj	palataloj	velaroj	laringaloj
plozivoj	p/b	t/d	-/-	-/-	k/g	-/-
frikativoj	f/v	s/z	ŝ/ĵ	-/j	ĥ/-	-/h
afrikatoj	-/-	c/dz	ĉ/ĝ	-/-	-/-	-/-
nazaloj	-/m	-/n	-/-	-/-	-/-	-/-
likvidoj	-/-	-/l,r	-/-	-/-	-/-	-/-
senvoĉaj / voĉaj						

2.9. Asimiliĝo.

Ĉe renkontiĝo de voĉa kaj senvoĉa konsonantoj, la unua asimiliĝas al la dua: *subteni* (supteni), *okdek* (ogdek), *ekzemple* (egzemple).

2.10. Duoblaj konsonantoj.

Esperanto evitas duoblajn konsonantojn, tamen ili aperas ĉe kelkaj derivaĵoj (*mallonga*, *interrompi*, *ekkanti*, *rabbirdo*), iam ĉe sinsekvaj vortoj (*sed do*, *kaj jam*, *nek kanti*) kaj ĉe nemultaj internaciaj vortoj por distingi ilin disde vortoj similaj (*brutto* - *bruto*, *finno* - *fino*). La duoblaj konsonantoj devas esti duoble prononcataj.

2.11. Akcento.

La Esperantaj vortoj havas la akcenton sur la antaŭlasta silabo. Unusilabaj vortoj estas ĝenerale senakcentaj, sed en la frazo ili povas ricevi malpli fortan flankan frazakcenton, same kiel multsilabaj vortoj (*Mi ĝin metis sur la tablon*, *karulino*). Emfazitaj vortoj ricevas pli fortan akcenton sencan (*serĉu ĝin ne sur la tablo*, *sed sub la tablo*; *faru tion vi*, *ne li*).



ORTOGRAFIO

La ortografio estas regularo, kiel per skribaj signoj noti parolon en iu konkreta lingvo. La principoj ortografiaj estas fonema (al ĉiu fonemo respondas unu grafika signo), morfema (ĉiu morfemo, t.e. ĉiu prefikso, radiko, sufikso aŭ finaĵo, estas ĉiam same skribata, eĉ se ĝi estas prononcata iom diference: *subteni/supteni*), historia (la ortografio malfruiĝis post la prononcado, ekz. en la angla). Esperanto havas ortografion foneman (fonetikan).

3.2. Grafemo.

La grafemo estas baza ortografia unuo: litero, diakrita signo (supersigno), interpunkcia signo. Variantoj de unu grafemo estas alografoj. La literoj havas kvar alografojn: minusklojn (*a b c . . .*) kaj majusklojn (*A B C . . .*), presajn kaj manskribajn. La literoj kun supersignoj (*ĉ ŝ . . .*) nomiĝas ĉapelitaj. La supersignoj estas la cirkumflekso (^) kaj la duoncirklo (). La interpunkciaj signoj estas punkto (.), komo (,), punktokomo (:), dupunkto (:), krisigno (!), demandsigno (?), tripunkto (. . .), haltostreko (–), dividstreko (–), citiloj (" " « »), krampoj (), steleto aŭ asterisko (*), apostrofo ('), oblikva streko (/).

3.3. Alfabeto.

La alfabeto de Esperanto havas 28 literojn, por ĉiu fonemo unu literon: 5 vokalojn, 1 duonvokalon, 22 konsonantojn:

a b c ĉ d e f g ĝ h ĥ i j ĵ k l m n o p r s ŝ t u ŭ v z

Sole por la fonemo *dz* ne ekzistas speciala litero. Esperanto ne uzas la literojn *q, ŭ, x, y* (*kvalito, vagono, eksperto, ekzemple, sistemo*).

3.4. Literumado.

La literoj havas nomojn: *a bo co ĉo do e fo go ĝoho ĥo i jo ĵo ko lo mo no o po ro so ŝo to u ŭo vo zo*. En la matematiko estas uzataj ankaŭ la literoj *q* (kuo), *w* (duobla vo), *x* (ikso), *y* (ipsilono) kaj la grekaj literoj (alfa, beta, gama, delta, epsila, dzeta, eta, teta, jota, kapa, lambda, mu, nu, ksi, omikra, pi, ro, sigma, taŭ, upsila, fi, ĥi, psi, omega). Aperis ankaŭ aliaj provoj pri la

nomoj de literoj (*a ba co ĉo da e fo ga . . . , a be ce ĉe de e ef . . .* k.a.). **Literuma alfabeto** por literumi ĉe telefonado: A Asfalto, B Barbaro, C Centimetro, Ĉ Ĉefo, D Doktoro, E Elemento, F Fabriko, G Gumo, Ĝ Girafo, H Hotelo, Ĥ Ĥaoso, I Insekto, J Jubileo, Ĵ Ĵurnalo, K Kilogramo, L Legendo, M Maŝino, N Naturo, O Oktobro, P Papero, Q kuo, R Rekordo, S Salato, Ŝ Ŝilingo, T Triumfo, U Universo, Ŭ Universo hoketo, V Vulkano, W ĝermana vo (vavo), X ikso, Y ipsilono, Z Zinko, ' streko supren, hoketo, ° cirkleto, " tremao, streko falanta, ^ cirkumfleksio, tildo, - streko kuŝanta, ŝ Oktobro trastreko, ç Centimetro subhoko (cedilo), @ Asfalto envolvita (heliko).

3.5. Mallongigoj.

En la skribo oni ofte mallongigas titolojn de personoj (s-ro = sinjoro, k-do = kamarado, d-rino = doktorino, s-ano = samideano), multe uzatajn vortojn (vd. = vidu, ekz./ekz-e = ekzemple), vortgrupojn (k.t.p./ktp. = kaj tiel plu, t.e. = tio estas, k.a. = kaj aliaj, k.s. = kaj simile), nomojn (E-o = Esperanto, GDR = Germana Demokratia Respubliko, UEA = Universala Esperanto-Asocio, SET = Somera Esperanto-Tendaro).

3.6. Majuskloj.

Majuskle estas skribataj la komencoj de frazoj kaj propraj nomoj (*Petro, Anglio*), inicialoj de diversaj nomoj de ŝtatoj, institucioj aŭ aranĝoj (*Germana Demokratia Respubliko, Universala Esperanto-Asocio, Konstanta Internacia Kvalifikejo*) kaj mallongigoj formiĝintaj el tiuj inicialoj (*GDR, UEA, KIK*). Multaj aŭtoroj skribas majuskle ankaŭ ĉiujn vortojn (escepte de la artikolo, prepozicioj kaj konjunkcioj) en titoloj de libroj kaj ĉapitroj (*La Faraono, La Knaboj de Paŭlo-strato*), aliaj skribas majuskle nur la unuan vorton (*La faraono, La knaboj de Paŭlo-strato*).

3.7. Asimilado de propraj nomoj. Multajn proprajn nomojn Esperanto plene asimilis donante al ili ne nur siajn literojn, sed ankaŭ la akcenton kaj finaĵojn: *Ŝekspiro, Voltero, Francio, Parizo, Zeŭso* ktp. Tiamaniere oni asimilas sole la plej famajn nomojn kaj nur en la populara kaj beletra literaturoj pro oportunaj ebloj de derivado (*Ŝekspira tragedio, Venecia vivo, vivi Parize*). La nomoj, kiuj ne estas internacie konataj, la aŭtoraj nomoj sur la titolpaĝoj de libroj, la geografiaj nomoj sur poŝtaĵoj estas neasimilitaj (*Blaz~ejovice, Shakespeare, Paris*). La nomoj transprenitaj el la lingvoj ne uzantaj la latinan alfabeton aŭ uzantaj specialajn literojn kaj supersignojn aŭ havantaj nefonetikan ortografion, estas ofte nur transskribitaj laŭ prononco (*Fuĵijama, Ŝekspir, Kandid*) aŭ transliteritaj, litero postlitero (*Ĉeĥov, Ĉapek*).

3.8. Interpunkcio. La interpunkcio ne estas en Esperanto unueca, la uzantoj de la lingvo povas apliki la kutimojn de siaj naciaj lingvoj, ĉar la interpunkcio estas nur papera afero, kiu ne ŝanĝas la signifon de frazoj. Tamen post centjara ekzisto de Esperanto evoluis certaj rekomendindaj tendencoj.

3.8.1. Punkto. La punkton oni uzas ĉe la fino de frazo (*Neĝas.*) kaj post kelkaj mallongigoj (*t.e., vd., ekz., ktp.*). La punkton oni ne uzas, se la mallongigoj havas finaĵon (*E-o, d-ro, s-ro, ekz-e*) aŭ estas uzataj ankaŭ parole (*UEA, ĈEA, HEJ*).

3.8.2. Komo. La komon oni uzas post vortoj de alparolo (*Venu, ho kara, al mi.*), antaŭ kaj post apozicio (*Prago, la urbo centtura, aperis antaŭ ni.*), por apartigi samspecajn frazelementojn ne ligitajn per konjunkcioj (*La patro, patrino kaj mi aĉetis panon, buteron kaj lakton.*), post antaŭmetitaj gerundioj (*Veninte hejmen, ŝi tagmanĝis.*), post antaŭmetitaj adjektaj predikativoj (*Malsata kiel lupoj, li venis hejmen.*), inter propozicioj de frazo (*Mi venis, kaj li diris, ke mi povas tuj foriri.*). Nur se du kunorditaj propozicioj ligitaj per **KAJ** aŭ **AŬ** (sed ne per **SED**) havas la saman subjekton, oni ne uzas la komon (*Mi venis kaj tuj foriris. Mi iros teatron aŭ rigardos televidon. Mi ne foriris, sed restis.*). La frazelementoj ligitaj per konjunkcioj ne estas apartigataj per komoj (*bela kaj juna sed ne saĝa nek prudenta*). La epitetojn oni apartigas per komo, se ili ĉiuj senpere rilatas al la sama substantivo (*juna, bela, saĝa viro*), sed ne se la lasta epiteto formas kun la substantivo kompleksojn (*bela juna viro = bela junulo*).

3.8.3. Punktokomo. La punktokomo apartigas du propoziciojn plidistinge kaj pli logike ol nura komo aŭ nura punkto. Komparu: *Donu al mi tiun libron, mi volas ĝin legi. - Donu al mi tiun libron. Mi volas ĝin legi. - Donu al mi tiun libron; mi volas ĝin legi.*

3.8.4. Dupunkto. La dupunkton oni uzas antaŭ citaĵo (*Li diris: "Jes."*), antaŭ eksplika nombrado (*mi amas legomojn: pizon, fazeolon, karoton*), antaŭ eksplika klarigo (*facila pruvo: iru tien kaj rigardu*), antaŭ resuma ekvivalento (*la plej fidela amiko de la homo: la hundo*).

3.8.5. Krisigno kaj demandsigno. La krisignon oni uzas post frazoj emfazaj, vokaj (*Tuj revenu!*), la demandsignon post frazoj demandaj (*Kien vi iras?*). La demandsignon oni uzas nur, se la ĉefpropozicio mem estas demanda (*Mi ne scias, kiam li venos. - Ĉu vi ne scias, kiam li venos?*).

3.8.6. Tripunkto. La tripunkto anstataŭas mankantan tekston por signi daŭrigon (*unu, du, tri. . . ktp.*), nefinitan penson (*kaj vi opinias, ke li . . .?*), eliminatan parton de citaĵo (*"La plej gravaj trezoroj de la homo ... estas la vivo kaj la sano."*) kaj trivialaĵon (*mi piedbatis lin en la ... -on*).

3.8.7. Haltostreko. La haltostreko emfazas ion neatenditan (*kaj tio estis - urso!*) aŭ intermetitan (*kaj nun - por esti sincera - mi konfesas, ke . . .*), finas vorton inkognitan (*en la jaro 19- sinjoro N- vivis en la urbo B-*), anstataŭas ĜIS (*en la jaroj 1950 - 1955 la fabriko produktis nur 300 - 400 maŝinojn*) aŭ MINUS ($9 - 5 = 4$).

3.8.8. Dividstreko. La dividstreko estas uzata en kunmetaĵoj (sed ne derivaĵoj!) por pliklarigi ilian konstruon (*poŝtmark-kolekto, kurac-herbo, am-uzo*), por ligi apoziciajn kunmetaĵojn (*sportistoj-kuracistoj, angla-ĉeĥa vortaro*) aŭ por transporti parton de vorto, pro lokmanko, sur la sekvan linion. La vortojn oni povas dividi laŭplaĉe (*p-l-i-k-l-a-r-i-g-i*), sed estas konsilinde fari tion aŭ laŭ silaboj (*pli-kla-ri-gi*) aŭ - plej bone - laŭ prefiksoj, radikoj

kaj sufiksoj (*pli-klar-igi*).


3.8.9. Oblikva streko. La oblikva streko montras frakcion (3/5) aŭ parencecon de esprimoj (*virĉevalo/ĉevalino, labialoj plozivaj p/b*). En la vortaroj ĝi apartigas finaĵon (*patr/o*).

3.8.10. Apostrofo. La apostrofon oni uzas por signi elfalintan literon: la A de la artikolo kaj la O de substantivo (*de l' am'*), la E de DANKE AL (*dank' al tio*), alian literon ĉe balbutado (*bo'an ta'on, sin'oro*).

3.8.11. Citiloj. La citiloj estas uzataj por citi rektan parolon (*Li diris: "Bone".*) aŭ ideon de iu alia (*vi skribis, ke "la teorio pli gravas ol la praktiko", sed mi ne konsentas*) aŭ por ironiigi (*li estis vera "bonulo"*).

3.8.12. Krampoj kaj parentezo. La krampojn oni uzas por intermeti klarigon gramatike sendependan de la ĉirkaŭa frazo. La informo inter la krampoj estas nomata parentezo. La krampoj estas rondaj (), rektaj [], oblikvaj //, angulaj < > aŭ kuniga {.

3.8.13. Steleto. La steleto (asterisko) atentigas pri noto ĉe la paĝpiedo.



VORTFARADO

La vortfarado estas tre grava en ĉiu lingvo, sed en Esperanto ĝi havas signifon eksterordinaran. Ĝi ebligas al la uzantoj de Esperanto - por kiuj Esperanto ne estas gepatra lingvo - ekregi grandan parton de la vortprovizo kaj elaste adapti la lingvon al la novaj bezonoj de komunikado. En Esperanto estas novaj vortoj farataj per ŝanĝo de la vortkategorio (*tablo - tabla*), per kunmetado (*patrolingvo*), per derivado (*patrino*), per farado de vortgrupoj (*unu-direkta konvertilo*), per mallongigoj kaj akronimoj (*UEA, Usono, zoo*), per signifotransporto (*kapo - kapo de ŝraŭbo*) kaj per akceptado de vortoj el fremdaj lingvoj (*sputniko, rogallo*). Por korekta vortfarado necesas scii analizi la vortojn kaj ĉiun vorteron ĝuste pritaksi.

4.2. Analizo, sintezo kaj polisintezo.

Helpe de vortoj oni esprimas ne sole signifojn, sed ankaŭ diversajn gramatikajn rilatojn inter ili. Se la gramatika kaj signifa elementoj formas du memstarajn vortojn (*je patro*), temas pri formoj analizaj, se ili formas unu vorton (*patron*), temas pri sintezo. Ĉe polisintezo kuniĝas pluraj plensignifaj elementoj en unu vorton (*patrolando*). La tri principoj estas kombineblaj kaj aplikeblaj ĉiuj tri samtempe (*por skribmaŝinoj*). La analizeco estas tendenco al disigado (*mi iĝos riĉa*), la sintezeco tendencas al kunigado (*mi riĉiĝos*).

4.3. Morfemoj leksikaj kaj gramatikaj.

Morfemo estas la plej malgranda son-unuo, havanta propran signifon. Ekz. la vorto "*maljunulinojn*" estas disigebla je jenaj morfemoj: *mal-jun-ul-in-o-j-n*. La leksikaj morfemoj (*mal, jun, ul, in*) prezentas la bazajn plensignifajn signojn (ili esprimas personojn, bestojn, objektojn, substancojn, kvalitojn, agojn ktp.), dum la gramatikaj morfemoj (*o, j, n*) estas helpsignoj, indikantaj la akcesorajn cirkonstancojn kaj gramatikajn rilatojn. La gramatikaj morfemoj estas populare nomataj finaĵoj. La leksikajn morfemojn oni povas dividi je radiko (*jun*), kiu formas la bazon de la vorto, kaj je afiksoj, kiuj la radikon pli detale determinas kaj modifas. Se la afikso estas metita antaŭ la vortradiko (*mal-*), ĝi estas nomata prefikso, se ĝi estas postmetita (*-ul-, -in-*), temas pri sufikso. La leksikaj morfemoj de unu

vorto sen morfemoj gramatikaj formas la **radikalon** de la vorto (*maljunulin*). Do ne konfuzu la terminojn "radiko" kaj "radikalo".

4.4. Aglutino kaj fleksio.

La sintezaj formoj povas esti aŭ aglutinaj, se la vortelementoj (morfemoj) estas neŝanĝeblaj kaj gluiĝas (aglutiniĝas) unu al la alia (*patr-o*, *patr-in-o*, *ge-patr-o-j*, *patr-o-land-o*), aŭ fleksiaj, se la morfemoj ŝanĝiĝas kaj kunfandiĝas, kutime ankaŭ ilia signifo ne estas fiksita. Rigardu ekz. en la ĉeĥa la ŝanĝon de konsonanto (*Praha/Praz~ák = Prago/Praganoj*), diversajn signifojn de la gramatika morfemo "u" (*pec~u husu pánu - mi rostas anseron al la sinjoro*) kaj diferencajn finaĵojn de akuzativo ĉe diversaj substantivoj (*muz~e - viron*, *pána - sinjoron*, *stroj - maŝinon*, *z~enu - virinon*, *z~idli - seĝon*, *me~sto - urbon*, *stavení - konstruaĵon*). La ĉeĥa apartenas al la lingvoj fleksiaj, Esperanto al la lingvoj aglutinaj kune kun la hungara, turka, kartvela k.a. El la vidpunkto de esprimiveco estas ambaŭ tipoj samkvalitaj, sed el la vidpunkto pedagogia-psikologia pli avantaĝas la tipo aglutina, ĉar dank' al pli granda reguleco ĝi estas pli facile lernebla. Per aglutineco Esperanto proksimiĝas ankaŭ al la lingvoj ekstereŭropaj. En Esperanto sole la sufiksoj -ĉj- kaj -nj- kapablas ŝanĝi la vortradikojn (*patr-o - paĉj-o - panj-o*), sed ĉar la internacia lingvo ĉerpis sian vortprovizon el la lingvoj fleksiaj, estas la spuroj de tiu origino rimarkeblaj ĝis nun (*agi - akto - reakcio - agento; figuro - fikcio - fiktiva* ks). La ordinara lingvouzantoj traktas tiujn vortojn, kvazaŭ temus pri memstaraj vortradikoj, kaj sole la lingvistoj konas ilian etimologian parencecon. Ekzistas ankaŭ aliaj lingvotipoj. La araba havas internan fleksion, ĉe kiu novaj formoj estas kreataj per ŝanĝo de la radiko (*kalbun - hundo; kilabun - hundoj*), la polisintezita indonezia lingvo formas pluralon per duobligo (*orang - homo, orang-orang - homoj*), la ĉina estas male tipo de izola lingvo, en kiu tute ne okazas kunigado de morfemoj.

4.5. Vortkategorioj.

El la vortradikoj (*martel, bel, kur*), radikaloj (*tagmez, maljunul, herbriĉ*) kaj ankaŭ el kelkaj nevariaj vortspecoj (*tri, nun, antaŭ, fi*) povas la gramatikaj morfemoj -o, -a, -e, -i formi kvar fundamentajn vortkategoriojn:

- substantivoj (*martelo, belo, kuro, tagmezo, maljunulo, herbriĉo, trio, nuno, antaŭo, fio*)
- adjektivoj (*martela, bela, kura, tagmeza, maljunula, herbriĉa, tria, nuna, antaŭa, fia*)
- adverboj (*martele, bele, kure, tagmeze, maljunule, herbriĉe, trie, nune, antaŭe, fie*)
- verboj (*marteli, beli, kuri, tagmezi, maljunuli, herbriĉi, trii, nuni, antaŭi, fi*)

En Esperanto preskaŭ ĉiuj radikoj kaj radikaloj povas esti realigitaj en ĉiuj kvar kategorioj. En tio kaŝiĝas granda esprimriĉeco, kiun niaj vortaristoj ĝis nun ne registris en siaj vortaroj, kaj la esperantistoj tial ne scias apliki ĝin. Speciale efika estas la verbigado de substantivoj kaj adjektivoj: *La ĝardeno riĉas / abundas je fruktoj. Tigro diskarnis antilopon. Oni disporidis la ĉambron fenestrantan en ĝardenon. Antaŭ ni turis fabrika fumtubo.*

4.6. Radikkarakteroj.

Kelkaj vortradikoj eniris Esperanton en formo de verbo (*labori*); eblas facile formi el ili la nomon de la ago (*laboro, laborado*), rilaton al la ago (*labora*), lokon de la ago (*laborejo*), personon plenumantan la agon (*laborulo, laboranto, laboristo*), kvaliton de la persono (*laborema*), instrumenton por la ago (*laborilo*) kaj rezulton de la ago (*laboraĵo*).

Aliaj radikoj transiris en Esperanton jam rekte kiel adjektivoj esprimantaj kvaliton (*bela, granda, verda*) aŭ kiel substantivoj esprimantaj personon (*tajloro*), lokon (*fabriko*), instrumenton (*martelo*) aŭ rezulton (*foso, produkto, verko*). Pli poste estis derivitaj el ili la ceteraj vortkategorioj (*belo, beli, bele, tajlora, tajlori, marteli, fabriki, fosi, produkti* ktp.) kaj derivaĵoj (*beleco, tajloraĵo, martelejo, fabrikisto* ktp.). Necesas atenti, ke oni ne apliku ĉe ili tiujn sufiksojn, kies signifon la radikoj jam enhavas: *tajloro* (ne: tajloristo), *fabriko* (ne: fabrikejo), *martelo* (ne: martelilo), *produkto* (ne: produktaĵo) ktp. Kelkaj radikoj havas tre similan signifon en la kategorio verba (*produkti - fabriki; remi - pagaji*), sed diferencas en la kategorio substantiva (*produkto - fabrikaĵo; produktejo - fabriko; remo - pagajado; remilo - pagajo*). Ĉe kelkaj derivaĵoj poste estiĝas problemoj, ĉu kompreni ilin kiel derivaĵon de aĵo aŭ de ago: *martelejo* - ĉu produktejo de marteloj aŭ forĝejo, kie oni martelas?; *fabrikisto* - ĉu posedanto de fabriko aŭ produktanto de iu ajn fabrikaĵo? Ekestas homonimoj, kiujn povas precizigi ĉirkaŭteksto, konvencia kutimo aŭ terminologia difino.

Aldonante sufikson jam enhavatan en la radiko oni ricevas esprimon kun iom ŝanĝita signifo (*foso* = fosita kavo; *fosaĵo* = longforma foso; *martelilo* = ĉiu ajn malmola aĵo, per kiu eblas marteli, sed kiu ne estas martelo; *pagajilo* = ĉiu ajn lignopeco, per kiu eblas pagaji, sed kiu ne estas pagajo).

Por pli bone orientiĝi pri la radikoj kaj por pli facila derivado estis ellaborita teorio pri la radikkarakteroj. Al tiuj radikoj, kiuj eĉ sen la gramatika morfemo elvokas ideon pri persono, besto, planto aŭ aĵo, estis aljuĝita substantiva karaktero (*knab, hund, roz, tabl*). Se la radikoj elvokas ideon pri kvalito (*bon, alt, flav*), ili estas adjektivaj radikoj, kaj radikoj esprimantaj agojn kaj statojn (*ir, pens, star*) estas verbaj. Pri la teorio oni diskutis kaj disputis duonjarcenton, ĝis ĝi estis oficiale agnostika de la Akademio de Esperanto en majo 1967. Malgraŭ tio la lingvistoj ĉiam oponas, ke la diferencoj inter la radikoj estas kaŭzitaj de iliaj signifo-enhavoj, ne de iliaj gramatikaj karakteroj. Tamen el pure praktikaj motivoj estas necese kaj avantaĝe la teorion koni kaj memori.

4.7. Samelementeco kaj proprafunkcieco.

Laŭ la teorio pri la radik-karakteroj havas la gramatika morfemo (finaĵo) *nepropran* funkcion tiam, kiam ĝi estas almetita al la radiko de la sama gramatika karaktero, do la finaĵo -o al substantiva radiko (*martelo, homo, rozo*), la finaĵo -a al adjektiva radiko (*bela, ruĝa, akra*) kaj la finaĵo -i al verba radiko (*kuri, esti, labori*). En tiuj kazoj oni parolas pri samelementaj vortoj, kaj la gramatika morfemo estas preskaŭ superflua, pleonasma, ĉar ĝia signifo jam estas enhavita en la radiko. Oni almetas ĝin fakte nur pro formalaj motivoj,

ĉar la reguloj de la Esperanta gramatiko postulas ĝin, sed ĝi ne estas portanto de nova informo. En mala kazo, kiam inter la finaĵo kaj radikoj ne estas gramatika akordo, la finaĵo ŝanĝas la vortkategorion (*marteli, homa, ruĝo, esto*) kaj prezentas do novan informon. Oni diras, ke la gramatikaj morfemoj estas uzitaj en sia *propria* funkcio, ili fakte anstataŭas vortojn kaj radikojn (*martela* = martelrilata, rilatanta martelon; *martele* = martelmaniere, per martelo; *marteli* = martelbati, bati per martelo; *beli* = esti bela, impresi bela).

4.8. Substantivaj radikoj.

La substantivaj radikoj signas personojn (*knabo, frato, viro*), inter ili reprezentantojn de diversaj profesioj (*soldato, tajloro, reĝo, profesoro*), plue bestojn (*papago, hamstro, serpento, simio*), plantojn (*arbo, rozo*), instrumentojn (*broso, bremsa, pioĉo*), lokojn (*fabriko, uzino, foiro, placo, urbo*), rezultojn de agoj (*produkto, verko, foso*), abstraktaĵojn (*muziko, ideo*) ktp. La almetita adjektiva finaĵo plej ofte esprimas rilaton (*tabla lampo, reĝa palaco*), escepte ankaŭ kvaliton (*reĝa donaco, amika helpo*). La verba finaĵo montras ĉe la profesi-nomoj la plenumadon de la profesio aŭ agadon similan (*profesori, soldati, reĝi, tajlori*), ĉe la instrument-nomoj laboron per la instrumentoj (*brosi, bremsi, pioĉi*), ĉe la lok-nomoj agadon en tiuj lokoj (*fabriki, uzini, foiri, kongresi*), ĉe la rezult-nomoj agadon kondukantan al la rezulto (*produkti, verki, fosi, muziki*), ĉe la best-nomoj similan konduton (*papagi, simii, serpenti, porki, hamstri*), ĉe la plant-nomoj kreskadon (*ĝermi, radiki, branĉi, burĝoni, flori*) ktp. La agad-nomoj estas kreataj per la sufikso -ado (*brosado, florado, tajlorado*), la kvalit-nomoj per la sufikso -eco (*homeco, tajloreco, branĉeco*).

4.9. Adjektivaj radikoj.

La adjektivaj radikoj esprimas mezuron (*alta, eta, granda*), koloron (*blanka, ruĝa, verda*), aspekton (*bela, ĉarma, turpa*) ks. La verba finaĵo donas al ili sencon "esti ia" (*alti* = esti alta, *verdi* = esti verda), sed pli aktive kaj pli imprese (*la herbo estas verda* - simpla konstato; *la herbo verdas* - la herbo frapas okulojn per sia verdeco; *la akvo bluas* - la akvo impresas blue sub certaj veterkondiĉoj, kvankam akvo mem estas senkolora). El nemultaj adjektivoj estiĝas eĉ transitivaj verboj (*ĉarmi iun* = sorĉi iun per sia ĉarmo; *avidu monon* = sopiri pri mono). La substantiva finaĵo formas el la adjektivaj radikoj nomojn de kvalitoj kiel de realaĵoj (*birdo flugas en alto de dek metroj; unuo de longo estas metro; tempo kaj temperaturo estas fizikaj grandoj*), dum la sufikso -eco formas nomojn de kvalitoj kiel de ies proprecoj (*la alteco de la birdo estis dek centimetroj; la longeco de la ekvatoro; la grandeco de Dickens; la beleco de la pejzaĝo*) kaj la sufikso -aĵo nomojn de konkretaj objektoj, kiuj prezentas la kvaliton (*altaĵo* = monteto; *belajĵoj de la pejzaĝo* = ekz. riveroj, arbaroj, kasteloj, kiuj beligas la pejzaĝon). La agad-nomoj estas esprimataj per la sufikso -ado (*ĉarmado, avidado, utilado, abstraktado, rapidado*).

4.10. Verbaj radikoj.

La verbaj radikoj esprimas agojn (*labori, salti, remi*) kaj statojn (*esti, sidi, resti*). La

substantiva finaĵo kreas la ag- kaj stat-nomojn (*laboro, remo, esto, resto*), plej ofte nur unu movon, dum la ripetadon aŭ daŭron oni montras per la sufikso -ado (*salto - saltado, remo - remado, sidado, restado*). La adjektiva finaĵo plej ofte esprimas rilaton (*ama letero, morta lito, nutra komitato, manĝa karto, naĝa kapablo*), escepte ankaŭ kvaliton (*nutra manĝaĵo, konfuza parolo, flua raporto*).

4.11. Vortkunmetado.

Ĉe la vortkunmetado kuniĝas du aŭ pluraj vortradikoj en unu tuton. Do temas pri la polisintezo. La ĉefelemento staras sur la fino de la kunmetaĵo kaj esprimas ĝian ĉefan signifon kaj vortkategorion. La antaŭaj flankelementoj nur karakterizas la ĉefelementon (*skribmaŝino - maŝinskribo; pafarko - arkpafi*). Plur-elementaj kunmetaĵoj estas fakte kunmetaĵoj de kunmetaĵoj (*poŝtmarkkolekto*) kaj ĉiam estas divideblaj je du ĉefaj partoj (*poŝtmark-kolekto*). Ĉe la kunmetado ludas la ĉefan rolon la vortkategorio de la ĉefelemento.

4.12. Substantivaj kunmetaĵoj.

La substantiva ĉefelemento substantivigas ankaŭ la flankelementon, eĉ se ĝia radikkaraktero estas alia (*homkoro = koro de homo; varmenergio = energio de varmo; labortago = tago de laboro*). La flankelemento esprimas aŭ rilaton (*paperkorbo = korbo por paperoj*) aŭ materialon (*paperskatolo = skatolo el papero*) aŭ epiteton (*soldatkamarado = soldato, kiu estas ankaŭ kamarado; kverkarbo = kverko-arbo*). Plena Gramatiko nomas tiujn tri tipojn analizo R (rilato), analizo M (materialo) kaj analizo E (epiteto). Oni vidas, ke ankaŭ vortoj kreataj sammaniere povas havi diferencon analizon (*paperkorbo - paperskatolo*), kiu estas fiksita per konvencia, nepreskribita interkonsento de la lingvo-uzantoj.

La rilato inter la ĉefelemento kaj flankelemento estas esprimebla ankaŭ per adjektivo, se ĝi ne estas kvalit-adjektivo: *homkoro = homa koro* (homa = apartenanta al homo), *ŝtonponto = ŝtona ponto* (ŝtona = farita el ŝtono). Per kvalit-adjektivo tio ne eblas: *belkulto = kulto de belo* (ne: bela kulto); *belreĝino = reĝino de belo* (ne: bela reĝino); *varmenergio = energio de varmo* (ne: varma energio), *voluptamo = amo al volupto* (ne: volupta amo). Kunmetaĵo esprimas "specon" de io (*dikfingro = speco de fingro, nome polekso aŭ halukso; altforno = speco de forno, nome forno por ferfabrikado*), dum memstara adjektivo esprimas taksadon (*maldika dikfingro de maldika homo; malalta altforno apud pli alta altforno*). Tial esprimojn "*bela knabino, juna knabo, granda libro*" ne eblas simple kunmeti al "*belknabino, junknabo, grandlibro*", ĉar tiuj vortoj havus diferencon signifon. La kunmetaĵo havas sencon nur tiam, kiam ĝi havas realan modelon en la vivo: se la naturo ne donus al ni unu fingron okulfrape pli dika ol la ceteraj, la vorto "dikfingro" estus sensencaĵo.

4.13. Adjektivaj kunmetaĵoj.

Ankaŭ la adjektiva ĉefelemento substantivigas la flankelementon (*herbriĉa = riĉa je herbo; belriĉa = riĉa je belo; varmplena = plena je varmo; prespreta = preta je preso; servopreta = preta je servo; di-simila = simila je dio*). Ekzistas ankaŭ simpla apudmetado de adjektivoj (*vortaro*

angla-rusa; blanka-ruĝa-blua standardo). La adjektivoj derivitaj de aliaj vortspecoj, kiam la finaĵo -a estas uzata proprafunkcie, kondutas kvazaŭ vort-kunmetoj, en kiuj la finaĵo -a anstataŭas iun adjektivon (*homa* = homrilata, homspeca). Tiu principo ebligas krei adjektivojn eĉ el vortgrupoj, en kiuj estas kiel substantivo la morfemo antaŭ la finaĵo -a (*plenkreska* = estanta en plena kresko; *dupieda* = havanta du piedojn; *junknabina koro* = koro de juna knabino; *bluokula infano* = infano kun bluaj okuloj; *senlabora profito* = profito akirita sen laboro; *senforta knabo* = knabo sen forto). Sed ĉi tiuj adjektivaj kunmetaĵoj ne pravigas similajn kunmetaĵojn substantivajn (ne: *plenkresko*, *dupiedo*, *junknabino*, *bluokulo*, *senlaboro*, *senforto*). Se tiaj substantivaj kunmetaĵoj tamen estas uzataj, ili montras specon de io (ekz. *tripiedo* = speco de seĝo, nome tripieda seĝo aŭ portilo por aparatoj).

4.14. Verbaj kunmetaĵoj.

Ĉe la verbaj kunmetaĵoj la flankelemento esprimas aŭ rezulton de la ago aŭ manieron de la ago. La rezulto estas analizebla kiel adjektivo predikativa (*kunrasti* = rasti ion kuna), la maniero kiel adverbo (*kunludi* = ludi kune). Do la sama flankelemento povas havi ĉe diversaj verboj diferencon eksplikon laŭ la enhavo de la verbo kaj laŭ la kutimoj de la uzantoj (ludi kune, sed ne rasti kune). La maniero de la ago estas analizebla ankaŭ per substantivo kun la prepozicio PER (*martelbati* = bati per martelo). Kiel esprimiĝon de maniero eblas analizi ankaŭ vortojn, en kiuj la finaĵo -i estas uzata proprafunkcie kaj anstataŭas iun verbon (*marteli* = agi martele; *verdi* = impresi verde), kvankam pro tio ni ne konsideros la vortojn kunmetaĵoj. Ĉe la kunmetaĵoj el substantivaj kaj verbaj radikoj necesas vicigi ilin laŭ logiko: *pafarko* (= arko por pafi) - *arkpafi* (= pafi per arko, ne: pafarki); *fajfsako* (= sako por fajfi) - *sakfajfi* (= fajfi per sako, ne: fajfsaki) - *sakfajfado* - *sakfajfilo* (= fajfsako); *skribmaŝino* - *maŝinskribi* - *maŝinskribo* - *maŝinskribado*.

4.15. Adverbaj kunmetaĵoj.

La finaĵo -e estas ĉiam uzata proprafunkcie kaj esprimas manieron, tial la adverbaj kunmetaĵoj estas kreataj el la kunmetaĵoj substantivaj, adjektivaj kaj ankaŭ verbaj (*presprete*, *herbriĉe*, *sangavide*, *bonfarte*, *maŝinskribe*, *senlabore* ktp.).

4.16. Derivado.

Derivado estas vortfarado per prefiksoj kaj sufiksoj, komune nomataj derivaj afiksoj, diference de la afiksoj gramatikaj (finaĵoj). Sed plej ofte oni nomas ilin nur afiksoj, pensante pri la leksikaj morfemoj, kiuj modifas la leksikan signifon de la vortradiko (baza leksika morfemo). Historie la afiksoj evoluis (en la naciaj lingvoj) el memstaraj vortoj, kiuj komencis esti uzataj ĉefe en kunmetaĵoj, ĝis ili perdis sian memstarecon. En Esperanto la afiksoj konservas la kapablon de memstara uzo (*for*, *disa*, *aĉa*, *eta* ktp.), sed ankaŭ ili estas uzataj precipe en kunmetaĵoj. Multaj vortoj, kiuj ne estas afiksoj, komencis uziĝi tiamaniere ankaŭ en Esperanto (*fi-*, *ĉef-*, *vir-*, *-ama*, *-hava*, *-tuko*), do ni estas atestantoj de simila evoluo, kiu okazis kaj okazas en la naciaj lingvoj.

La veraj afiksoj estas tiuj, kiuj tute ne obeas la regulojn de kunmetado, ekzemple ne prenas la ĉefan signifon, kvankam ili troviĝas sur la fino de la vorto (*knabeto* = eta knabo, ne knaba eto). La afiksoidoj estas tiuj afiksoj, kiuj parte obeas la regulojn de kunmetado, ekzemple estas portantoj de la ĉefa signifo de la vorto (*junulo* = juna ulo). Sed ĝi ne estas vera kunmetado, ĉar tiukaze "junulo" devus esti la sama malkorektaĵo kiel "junviro". La derivado havas do certajn apartaĵojn. Krom la oficialaj afiksoj penetras en Esperanton ankaŭ afiksoj neoficialaj, inter ili la grek-latinaj pere de fremdvortoj. En la funkcio de prefiksoj estas uzataj la prepozicioj.

4.17. Veraj afiksoj.

La veraj afiksoj ne obeas la regulojn de la vortkunmetado. La veraj prefiksoj (*bo, eks, ge, mal, pra*) ne estas substantivigataj de la substantiva ĉefelemento, sed adjektivigataj (*bopatro* = boa patro; *prapatro* = praa patro; *gepatroj* = geaj patroj; *eksministro* = eksa ministro; *malamiko* = mala amiko aŭ malo de amiko, sed ne amiko de malo, patro de boo ktp.). La veraj (diafanaj) sufiksoj (*aĉ, et, eg, ĉj, nj*) ne ŝanĝas la karakteron de la radiko, ne iĝas la ĉefelemento (*knabaĉo* = aĉa knabo; *knabeto* = eta knabo; *knabego* = ega knabo; *knabĉjo* = aminda knabo; *knabinjo* = aminda knabino - ne: knaba aĉo, knaba ego ktp.). Al la veraj sufiksoj kalkulas la Plena Gramatiko ankaŭ la sufikson UM, kiu ja transprenas la ĉefan signifon (*plandumo* = umo sur plando), sed pro sia nedifina signifo ĝi ne havas karakteron de memstara radiko. Apenaŭ eblas konsenti, ke ankaŭ la numeralaj sufiksoj (*obl, on, op*) apartenas al la veraj sufiksoj; ili ja portas la ĉefan signifon (*duoblo* = oblo de du) kaj havas memstaran uzon kun preciza difino. Ĉi tien pli taŭgus la verbaj participaj sufiksoj (*ant, int, ont, at, it, ot*), kiuj ne estas memstare uzataj.

4.18. Afiksoidoj.

La afiksoidoj estas ĉiuj afiksoj, kiuj kondukas kiel radikoj ĉe kunmetado. La prefiksoidoj (*dis, ek, for, mis, re*) funkcias antaŭ verbaj radikoj kiel adverboj (*miskonduti* = konduti mise) aŭ kiel adjektivoj predikativaj (*forsendi* = sendi ion, por ke ĝi estu fora; *diskuri* = kuri por esti disaj) aŭ kiel epiteto flankelementa (*diskarnigi* = igi disa karno). La sufiksoidoj estas ĉiuj sufiksoj, kiuj transprenas la ĉefan signifon de la kunmetaĵo (*hundino* = hunda ino). Kompreneble, la analizado estas nur proksimuma: inter "junulo" kaj "juna ulo" estas nuanca diferenco; aŭtomobilo estas "sprita aĵo", sed ne "spritaĵo" ktp.

4.19. Fremdaj afiksoj.

Kun la grek-latinaj vortoj penetris en Esperanton ankaŭ grekaj kaj latinaj afiksoj, kiuj en Esperanto ne estas uzataj memstare, sed nur kiel partoj de tiuj vortoj: ekzemple la prefikso PRE- (*preludo, prepozicio, prefikso*) aŭ la sufikso -ACIO (*deklaracio, kunjugacio, deklinacio*). La esperantistoj kutime lernas tiujn vortojn kiel unu tutaĵon, multaj eĉ ne konscias, ke fakte temas pri derivaĵoj. Lastatempe aperis provoj memstarigi tiujn afiksojn kaj uzi ilin ankaŭ ĉe aliaj Esperantaj vortoj, precipe en la fakstilo. Plena Gramatiko nomas tiujn afiksojn

"ŝajnaj" aŭ "pseŭdoafiksoj", kvankam ili estas nek ŝajnaj nek pseŭdaj. Ili estas nur "latentaj" (= kaŝitaj) fremdaj afiksoj.

4.20. Vortoj uzataj en la funkcio de afiksoj.

En la funkcio de prefiksoj estas tute normale uzataj la prepozicioj (*alveni, laŭvera, senplumigi* ktp). kaj kelkaj vortradikoj (*ĉefverko, virĉevalo, fiĥomo*). En la funkcio de sufiksoidoj servas pluraj radikoj (*tablotuko, flugilhava, pacama, vermoplena*). Plena Gramatiko nomas ilin "kvazaŭsufiksoidoj"; la taŭgeco de tiu termino estas dubinda, ĉar ĝi estas en la lingvistiko nekonata.

4.21. Fakaj afiksoj.

Por la bezonoj de la faka stilo estas enkondukataj en Esperanton novaj prefiksoj kaj sufiksoj, kiuj estas konsiderataj kiel neoficialaj afiksoj. Tio estas ekzemple la prefiksoj PRE- (*preludo* = antaŭludo; *premorta* = antaŭmorta), HIPER- (*hiperstrukturo* = superstrukturo), PSEŬDO- (*pseŭdobazo* = ŝajna bazo, kvazaŭ-bazo) kaj precipe la sufiksoj -OZA (*sabloza* = sabloriĉa), -IVA (*produktiva* = kapabla multe produkti; *trabativo* = kapablo trabati), -IZI (*gluizi* = ŝmiri per gluo; *pasteŭrizi* = apliki la metodon de Pasteur), -IFI (*varmifi* = igi varmon; *varmigi* = igi varma), -ESKA (*japaneska* = japansimila; *vireska knabino; virineska knabo*), -IKO (*poetiko* = scienco pri poezio; *informadiko* = scienco pri informado), -OIDO (*homoido* = homsimila simio; *elipsoido; asteroido; sufiksoido*). En la kemio estas uzataj la sufiksoj -ITO, -ATO kaj -IDO por la nomoj de saloj (*sulfito, sulfato, sulfido*), en la zoologio oni uzas la sufikson -EDOJ por la nomoj de familioj (*cervedoj*), la sufikson -ENOJ por la nomoj de subfamilioj (*cervenoj*), en la botaniko servas la sufikso -ALOJ por la nomoj de ordoj (*rozaloj*) kaj la sufikso -ACOJ por la nomoj de familioj (*rozacoj*).

4.22. Plurelementaj kunmetaĵoj (derivajoj).

La plurelementaj kunmetaĵoj havas duobla aŭ la ĉefelementon (*kest/ŝlos-ilo*) aŭ la flankelementon (*kudr-il/ujo*), eventuale ambaŭ du (*dom-pord/ŝlos-ilo*). Ĉe la pli komplikaj kunmetaĵoj ol duelementaj estas taŭge skribi dividstrekon, por ke la vorto estu pli facile komprenebla (*poŝtmark-kolekto, dompord-ŝlosilo, turhorloĝ-montrilo*). La plurelementajn kunmetaĵojn ĉiam eblas dividi je du partoj.

4.23. Inversa vortefiko.

En kelkaj kunmetaĵoj (*senforta, grandlabora*) la flankelemento substantivigas la ĉefelementon (estanta sen forto, estante granda laboro), do inverse ol en la ceteraj kunmetaĵoj, en kiuj la ĉefelemento influas la flankelementon. Ĉe la inversa vort-efiko estas la finaĵo -a uzita proprafunkcie eĉ ĉe adjektiva radikoj, ĉar en la vorto estas kvazaŭ kaŝita ankoraŭ la finaĵo substantiva: *senforta* = (sen forto)a.

4.24. Vortgrupoj.

Multajn nociojn ne eblas esprimi per unu vorto, tial ili estas esprimitaj per grupo da vortoj (vortgrupo), kiu funkcias kiel unu tutaĵo, unu esprimo. La vortgrupoj plej ofte aperas en la fakstilo (*latentaj flankelementoj, kompleksa frazo, egaligo de kunkudroj, ŝmirado per brilpliiga solvaĵo*). Ĉiu tiu metodo estas uzata tiam, kiam oni volas eviti monstrajn kunmetaĵojn (*kunkudregaligo, latentflankelemento*) aŭ kiam la kunmetaĵo havus alian signifon (*ligna ŝraŭbo* = ŝraŭbo el ligno; *lignoŝraŭbo* = ŝraŭbo por fiksi lignojn, ekz. metala, plasta k.s.).

4.25. Mallongigoj kaj akronimoj.

En Esperanto ekzistas pluraj specoj de mallongigoj. Kelkaj vortoj aŭ grupoj da vortoj estas skribataj mallongigite, sed plene prononcataj (*d-ro, s-ro, ekz-e, ktp., k.s.* - doktoro, sinjoro, ekzemple, kaj tiel plu, kaj simile), aliaj estas mallongigite ne nur skribataj, sed ankaŭ prononcataj (*sulfo* = sulfuro; *labo* = laboratorio; *zoo* = zoologia ĝardeno). La mallongigitaj nomoj de kemiaj elementoj servas por derivado (*sulfo* - *sulfato, sulfito, sulfido*), aliaj forhakitaj formoj estas kutime slangaj (*labo, zoo, aŭto, stereo*). La inicialaj nomoj (akronimoj) estiĝas el la inicialoj de la unuopaj vortoj de plurvorta nomo; ili estas aŭ literumataj (*GDR* - legu: godoro = Germana Demokratia Respubliko) aŭ legataj kiel memstaraj vortoj (*ĈEA* - legu: ĉea = Ĉeĥa Esperanto-Asocio; *KIK* - legu: kik = Konstanta Internacia Kvalifikejo). Speciala kazo estas la vorto *Usono*, kiu komence de la jarcento estis proponata internacie (*USN* = United States of North America), sed ĝi akceptiĝis sole inter la esperantistoj, dum la cetera mondo uzas la mallongigon *USA*. En Esperanto ne estas uzata rekte *USN*, sed la vorto *Usono*, kiu ebligas formi derivaĵojn kaj distingi la nomojn koncernantajn la ŝtaton disde tiuj, kiuj koncernas la kontinenton (*Usona* - Amerika, *Usonano* - Amerikano). El aliaj lingvoj ofte estas prenataj en Esperanton jam pretaj akronimaj vortoj formitaj el inicialoj (*lasero* - Light of Amplifier with Stimulated Emission of Radiation) aŭ el la komencaj silaboj (*komsomolo* - KOMunistiĉeskij SOjuz MOLodjoĵi).

4.26. Ŝanĝo de la vortsignifo.

Multaj vortoj el la komuniza stilo akiras novan signifon en la fakstilo, nome per precizigo de la vortsignifo (*metalo* - unu difinon havas la fiziko, alian la kemio) aŭ per metafora nocio-transporto (*kapo de ŝraŭbo, dentoj de rado, kruro de tablo, informa kanalo* ktp.). Pri metonimio temas tiam, se certa esprimo estas uzita en la signifo, kiu pli konkrete devus esti kreita per derivaĵo (*rikolto* = rikoltado aŭ rikoltaĵo; *la tuta tablo ekridis* = la tablanaro ekridis) aŭ per transporto de propra nomo sur la nomon de objekto (*damasko, pergameno, rentgeno, pasteŭrizi* - el la nomoj: Damasko, Pergamo, Roentgen, Pasteur).

4.27. Fremdaj vortoj.

Laŭ la 15-a regulo de la fundamenta gramatiko Esperanto povas akcepti ĉiun ajn internacian vorton, donante al ĝi fonetikan ortografion kaj Esperantan gramatikan formon (*toreadoro, vindsurfingo, agrikulturo* ktp.). Tamen estas pli taŭge preni la vortradikon kaj la

ceterajn vortojn formi laŭ la reguloj de la Esperanta vortfarado (*toreisto, surfotabulo, agrokulturo*). Multaj vortoj estas tradukeblaj (*micetologio = fungoscienco*): la fakstilo preferas la vortojn internaciajn, la populara literaturo la esprimojn tradukitajn. La lingvo malvolonte akceptas novajn vortradikojn, ĉar la vortprovizo de Esperanto estas jam tiom ampleksa, ke estas preskaŭ neeble, ke unu homo ekregu ĝin plene. Necesas atenti pri la t.n. falsaj amikoj, t.e. vortoj nur ŝajne internaciaj (ekz. "benzino" estas en la franca "essence", en la brita angla "petrol" kaj en la usona angla "gasoline").

4.28. Terminologiaj principoj por la fakliteraturo.

La fakterminaro estas en Esperanto subevoluinta (la faklibroj estas malfacile vendeblaj), kio estas nuntempe la plej granda manko de nia movado. Ĉar ĉiu esperantisto havas sian profesion, en kiu ekzistas terminaro, li devus koni la terminologiajn principojn por terminfarado, por ke li povu kunlabori ĉe la evoluigado de terminoj de sia fako. La terminologiajn principojn por la ĉefaj mondlingvoj (kaj tial ankaŭ por ĉiuj ceteraj lingvoj) ellaboris aŭstra profesoro d-ro Eŭgeno Wüster (en 1931) - ni povas fieri, ke li estis esperantisto.

Ĉiu faka nocio (imago) devas esti precize difinita. La nocio estas esprimita per termino, do per konkreta vorto aŭ vortgrupo. Ĉiu nocio devus esti esprimita nur per unu termino (en la realo sinonimoj ekzistas en la faka leksiko, sed principe ili ne taŭgas) kaj ĉiu termino devus esprimi nur unu nocion en la kadro de unu fako. Ne malhelpas, se la sama termino estas diference difinita en diversaj fakoj (ekz. "operacio" en medicino, financoj kaj militado). La terminoj ekzistas nemotivitaj, radikaj (*seĝo, tablo, ŝraŭbo*) kaj motivitaj, priskribaj (*brakseĝo, skribotablo, ligna ŝraŭbo, lignoŝraŭbo, ŝraŭbilo* ktp.). Oni devas zorgi, ke la terminoj estu motivitaj ĝuste, dum la malĝuste motivitajn oni forlasu (tial estis forlasita kaj nuligita "ĉevalforto", ĉar ĝi ne estis unuo de forto, sed de povumo). Alia afero estas, se la vorto perdis sian priskriban karakteron kaj estas perceptata kvazaŭ radika nemotivita termino (ekz. "atomo" signifas greke "nedividebla", sed nun neniu komprenas ĝin tiamaniere, tial ĝi povis resti, kvankam estas de longe sciata, ke la atomoj konsistas el pli malgrandaj eroj). La termino devas kiel eble plej trafe bildigi la nocion, sed ĝi devas samtempe eviti superfluan, pleonasman ripetadon de informoj (ekz. estas superflue diri "transformilo de alterna kurento", ĉar transformi eblas sole la alternan kurenton). Ankaŭ ĉi tie validas la fama principo de neceso kaj sufiĉo. Tre grava kvalito de termino estas la produktiveco, kapablo de termino derivi novajn vortojn (*brakseĝo - brakseĝa*). El la vortgrupoj kutime ne eblas krei derivaĵojn (*ŝranko por libroj*), tial ekzistas forta tendenco al unuvorteco, se ĝi eblas (*libroŝranko - libroŝranka*).

Tre grava estas la internacieco de termino. Ĉe kreado de terminaro por certa fako kutime estas unue sur internacia nivelo elektitaj bezonataj nocioj, ĉiu nocio estas precize difinita, kaj nur poste oni serĉas por ĉiu nocio taŭgan terminon en la unuopaj lingvoj. La diverslingvaj terminoj povas koincidi en tri gradoj:

a) koincidas iliaj nocio-enhavoĵoj (*lignaĵisto* - ĉeĥe "stolar~"), sed ne la nocio-formoj (la ĉeĥa termino por lignaĵisto signifas laŭvorte "tablisto")


b) koincidas iliaj nocio-enhavoĵoj (*lavistino* - ĉeĥe "pradlena") kaj ankaŭ la nocio-formoj (lavi - ĉeĥe "prát", do laŭvortaj tradukoj koincidas)

c) koincidas kaj la nocio enhavoĵoj kaj la nocio-formoj kaj la son-formoj (konvertoro - ĉeĥe "konvertor")

Tamen la koincido de la son-formoj ne ĉiam signifas ankaŭ la koincidon de la nocio enhavoĵoj (la ĉeĥa "trafika" ne estas trafiko, sed tabakvendejo), ankaŭ la koincido de nocio-formo (mizero - ĉeĥe "bída") ne ĉiam signifas la koincidon de la nocio enhavoĵo (ĉeĥe "bídáĵ" ne estas mizerulo, sed kanajlo).

La plej grava kvalito de terminoj estas ilia sistema aranĝo, kio estas ofta kaŭzo, kial Esperanto forlasas konatajn internaciajn vortojn, kiuj rompas la sistemecon, kaj anstataŭigas ilin per propraj sistemaj esprimoj (*transformilo* anstataŭ *transformatoro*, *informadiko* anstataŭ *informatiko*, *homoidoj* anstataŭ *hominoidoj* ktp.).

Kiu volas serioze kunlabori pri la evoluigado de la fakaj terminaroj, tiu devas konatiĝi kun la terminologiaj principoj pli detale. La diletanta elpensado de terminoj "laŭokule" povas al nia movado nur malutili. Ĉi tiu artikolo nur celas montri, ke la terminologia laboro ne estas facila kaj ke neniu povas ĝin fari sen serioza sinpreparo.



MORFOLOGIO

5.1. Vortspecoj.

En Esperanto ekzistas jenaj vortspecoj:

- a) substantivo: *domo, strato, penso, belo*
- b) adjektivo: *bona, bela, doma, pensa*
- c) pronomo: *mi, mia, tio, io, ĉiu*
- d) numeralo: *unu, tria, duono*
- e) verbo: *pensi, labori, beli, kuri*
- f) adverbo: *nun, hodiaŭ, bele, surstrate, kiam, tial*
- g) prepozicio: *antaŭ, sub, super, al*
- h) konjunkcio: *kaj, aŭ, nek, sed*
- i) subjunkcio: *ke, se*
- j) interjekcio: *ho! fi! ve! miaŭ*

La limoj inter la unuopaj vortspecoj ne estas ĉiam precizaj. Multaj vortoj fakte apartenas al du vortspecoj havante iliajn proprecojn. Ekzemple la pronomoj "*mia, tia*", la numeraloj "*kelkaj, multaj, dua*", la verboj „*laboranta, kaptita*” estas samtempe adjektivoj, la numeraloj "*due, trioble*” kaj la verboj "*laborante, kaptite*” estas ankaŭ adverboj. La demandaj korelativoj (*kiu, kiam*) servas ankaŭ kiel subjunkcioj. En la frazoj "*mia kara ne venis - ami estas pli noble ol malami - ĉiu li havas sian ŝi - via morgaŭ estos pli feliĉa ol mia hieraŭ*” estas la adjektivo, verbo, pronomo kaj adverbo uzitaj en la funkcio de substantivo.

5.2. Substantivo.

La substantivo esprimas ideon de konkreta aŭ abstrakta estaĵo: *hundo, Petro, penso, muziko, knabo, kuro, salto*.

5.2.1. Nomoj komunaj kaj propraj. La diferenco inter ili ne estas ĉiam strikta. En fabeloj kaj fabloj la komunaj nomoj estas ofte konsiderataj kiel propraj (*patro Urso kaj patrino Ursino, onklino Vulpino, Forto mokis Saĝon* ktp.). La komunaj nomoj "suno, luno, tero" el la astronomia vidpunkto estas nomoj propraj (*Suno, Luno, Tero*). Sub la influo de la angla oni skribis majuskle ankaŭ la nomojn de tagoj kaj monatoj (*Lundo, Januaro*), sed nun estas preferata minuskla skribo (*lundo, januaro*). La nomoj de nacioj estis skribataj majuskle (*Slavo, Ruso*) en la komenca periodo de nia movado, poste enradikiĝis skribo minuskla (*slavo, ruso*), ĉar esti ekz. *franco* ne estas pli individua eco ol esti *barbulo* aŭ *belulo*. Tamen lastatempe en PIV kaj PAG reaperis opinioj, ĉu ne estus pli bona la skribo majuskla por ne riski konfuzi *Romano* kun *romano*, *Ligo* kun *ligo*, *Parto* kun *parto*, *Medo* kun *medo* ks. Pro simila kaŭzo oni diferencigas la vortojn *Esperanto, Ido* (lingvoj) kaj *esperanto* (kiu esperas), *ido* (infano). (Pri la propraj nomoj vidu ankoraŭ la artikolojn 3.6. kaj 3.7.)

5.2.2. Genro kaj sekso. La gramatika genro en Esperanto ne ekzistas. Tamen ekzistas rimedoj por diferencigi la sekson de vivaj estaĵoj. Ĉe la personoj la vira sekso ne havas specialan afikson (*patro, junulo, kantisto, Paŭlo, Karolo, Mario*), dum la ina sekso alprenas la sufikson -ino (*patrino, junulino, kantistino, Paŭlino, Karolino*), ĉe la propraj nomoj pli ofte la finaĵon -a (*Paŭla, Karola, Maria, Johana, Eva, Ana, Katarina* k.s.). La karesnomojn oni kreas per la sufikso -eto (*junuleto, junulineto*), ĉe la propraj nomoj kaj nomoj de familianoj en la vira sekso per la sufikso -ĉjo (*Joĉjo, paĉjo*), en la ina sekso per la sufikso -njo (*Manjo, panjo*). Ekzistas ankaŭ vortoj, kiuj montras nur virinojn (*amazono, najado, nimfo, damo, matrono, primadono* k.s.), kaj vortoj, kiuj tute ne indikas la sekson (*homo, persono, bebo, infano, ĝemelo*). Ĉe kelkaj vortoj (ekz. ĉe la profesi-nomoj) ne estas la sufikso -ino deviga (*Nia prezidanto estas sinjorino Nová, profesoro de gimnazio, mia bona amiko = Nia prezidantino estas sinjorino Nová, profesorino de gimnazio, mia bona amikino*).

Ĉe la bestoj la vira sekso havas la prefikson vir- (*virbovo, virĉevalo, virhundo, virkoko*), kiu en la komenca periodo de la movado estis uzata ankaŭ sufikse (*kokviro, hundviro*), sed la sufiksa uzo kaŭzis konfuzojn (*kaproviro = faŭno, ĉevalviro = centaŭro*), tial ĝi ne plu estas uzata (tamen oni povas renkonti ĝin en la malnova literaturo). La ina sekso estas esprimata per la sufikso -ino (*bovino, ĉevalino, hundino, kokino*). Nemultaj vortoj esprimas nur unu sekson (*masklo = virseksulo, femalo = inseksulino, stalono = virĉevalo, boko = virkapro aŭ vircervo, taŭro = virbovo, okso = kastrita bovo, kapon = kastrita virkoko*). Por kastritaj estuloj oni uzis la prefikson eks- (*eksvirbovo, ekstaŭro, eksbovino, eksstalono, ekskokino, eĉ eksviro kaj eksvirino* k.s.), kio estas maltaŭga, ĉar ankaŭ kastrito apartenas ĉiam al sia seksularo - la seksa aktiveco ne estas unu sola distingilo por masklo kaj femalo. Tial estis proponita la sufikso -uko (*bovuko, bovinuko*), kiu nun nur klopodas pri akceptiĝo (*tirita el eŭnuko = kastrita viro*).

La senafiksaj bestnomoj ne indikas la sekson, nek kastritecon, sed sole la zoologian specion: *Mi havas katon* (povas esti aŭ virkato aŭ katino). Tamen la senafiksaj bestnomoj per sia karaktero estas pli proksimaj al la sekso vira, tial sufiĉas diri "*kato kaj katino, koko kun dek kokinoj, patro urso kaj patrino ursino* ktp.", sed ne eblas "*virkato kaj kato, virkoko kun*

dek kokoj, patro virurso kaj patrino urso". Pro tio en la fabeloj kaj fabloj estas preferindaj esprimoj "sinjoro Lupo, sinjorino Lupino, fraŭlo Vulpo, fraŭlino Leporino, frato Fiŝo, fratino Fiŝino", ne "sinjorino Vulpo, fratino Fiŝo", kvankam oni uzas ankaŭ tiun ĉi manieron sub influo de la gepatraj lingvoj (se "vulpo" kaj "fiŝo" estas en la patrolingvo de la parolanto ingenraj; tamen por tiuj, en kies patrolingvo ili estas virgenraj, tio ŝajnas nenatura). Sole ĉe la personigitaj ideoj kaj objektoj eblas apliki ambaŭ seksojn laŭplaĉe: *sinjoro Luno* aŭ *sinjorino Luno, frato Forto* aŭ *fratino Forto, knabo Kverko* aŭ *knabino Kverko*.

5.2.3. Nombro. Esperanto havas du gramatikajn nombrojn: la singularon, kiu esprimas nur unu estaĵon aŭ aferon kaj havas la finaĵon -o (*amiko, tablo, ideo*), kaj la pluralon, kiu esprimas du aŭ plurajn estaĵojn aŭ aferojn kaj havas la finaĵon -oj (*amikoj, tabloj, ideoj*). Por esprimi grandan nombron de objektoj aŭ aferoj havas E-o ankaŭ aliajn rimedojn. La prefikso ge- indikas personojn de ambaŭ seksoj (*geamikoj* = amiko kaj amikino aŭ amikoj kaj amikinoj), ĉe la bestoj ĉiam nur unu paron (*gekolomboj* = virkolombo kaj kolombino). La sufikso -aro esprimas kolekton de samspecaj ekzistaĵoj (*homaro, arbaro, vortaro, brutaro, hararo*), ĉe la vivaj estaĵoj ĝi jam enhavas informon pri ambaŭ seksoj (*junularo*, ne *gejunularo*). La sufikso -ado povas esprimi vicon da agoj (*pafado* = vico da pafoj, *saltado* = vico da saltoj, *martelado* = vico da martelbatoj). Ekzistas vortoj, kiuj ĉiam indikas multajn unuopulojn (*grupo, popolo, nacio, lando, grego, armeo*). Dupartaj objektoj havas formon aŭ pluralan (*okulvitroj*) aŭ singularan (*biciklo, tondilo, pantalono, okulvitro*).

Komparu jenajn frazojn: *Sur la tablo kuŝis tri tondiloj kaj du paroj da okulvitroj* (aŭ: *du okulvitroj*). *Ĉiuj levis la kapon* (ne kapojn, ĉar ĉiu havas nur unu kapon). *Ĉiuj levis la manon* (ĉiu levis nur unu sian manon). *Ĉiuj levis la manojn* (ĉiu levis ambaŭ siajn manojn). *La tri pomoj havas sian arbon en nia ĝardeno* (ĉiuj tri pomoj devenas de unu arbo). *La tri pomoj havas ĉiu sian arbon en nia ĝardeno* (ili devenas el tri arboj).

5.2.4. Deklinacio. En Esperanto estas jenaj kazoj: la nominativo havanta la finaĵojn -o, -oj (*domo, domoj*) kaj la akuzativo aldonanta la finaĵon -n (*domon, domojn*). La ceteraj kazoj estas esprimitaj per prepozicioj starantaj antaŭ la nominativo (*en la domo, pri la domoj*), ili do estas kazoj prepoziciaj, nomataj ankaŭ prepozitivoj. Se prepozitivo akceptas la akuzativan finaĵon, ne temas pri speciala kazo, sed pri direkto (*en la domon, antaŭ la domojn*). La kazo alparola nomata vokativo en Esperanto koincidas kun la nominativo, sed ĉiam sen la artikolo (*Knabo, venu al mi.*) La nominativa singulara finaĵo -o estas elizebla kaj anstataŭigebla per la apostrofo, plej ofte en la poezio (*Mi amas vin, ho mia karulin'.*)

5.2.5. Artikolo. La nedifina artikolo en Esperanto ne ekzistas. La vortoj estas nedifinitaj per si mem (*Venis virino kaj volis paroli kun vi*). La nedifinitecon oni povas emfazi per la nedifinaj pronomoj (*iu virino, ia virino*), eventuale per la numeralo "unu" (*unu virino*), sed la uzo de la numeralo en la funkcio de nedifina artikolo estas evitinda.

La difina artikolo havas la formon LA por ambaŭ nombroj kaj por ĉiuj kazoj. Post la vokale finiĝantaj prepozicioj la artikolo povas esti kurtigita kaj apostrofita (*ĉe l' tablo, pri l' patro, pro l' malsano, de l' patrino*), kion aplikas precipe la poezio. Malrekomendinda estas la

apostrofado post aliaj vortspecoj (*ke l' homo, se l' virino, kvazaŭ l' infano, doni l' panon*) kaj antaŭ la vortoj vokale komenciĝantaj (*l'amo, l'afero, l'avo*) pro facila konfuzeblo (*lamo, la fero, lavo*).

La artikolo estas la ĉefa determinilo de la substantivoj. Ĝia signifo estas simila al TIU, TIUJ, sed malpli emfaza, sen fingromontrado. La artikolo atentigas, ke oni parolas pri konata estaĵo aŭ afero, pri konkreta individuo, pri kiu oni jam antaŭe parolis aŭ kiun oni havas antaŭ la okuloj aŭ kiu estas unu sola, unika en la mondo, simple kiu estas precize determinita.

La uzo de la artikolo estas simila kiel en la angla, franca, germana kaj aliaj lingvoj, sed ankaŭ en tiuj lingvoj la uzo de la artikolo ne ĉiam precize koincidas. En Esperanto ekzistas situacioj, en kiuj la artikolo devas esti uzita, situacioj, en kiuj ĝi ne devas esti uzita, kaj situacioj, en kiuj oni povas la artikolon uzi aŭ ne uzi laŭ persona gusto aŭ laŭ nacilingva kutimo. En dubaj kaŭzoj estas malpli granda eraro ne uzi la artikolon.

5.2.5.1. La artikolo estas uzata:

a) se oni parolas pri io jam antaŭe menciita, pri io kuŝanta antaŭ niaj okuloj, simple pri io, pri kies identeco estas nenia dubo: *Fine mi mendis la robon* (diras edzo pri la robo, pri kiu lia edzino jam parolas duonjaron). *Mi aĉetis ĉapelon* (anoncas la edzino neatendite). *Donu al mi la panon* (diras oni ĉe la tablo, sur kies kontraŭa flanko kuŝas ia pano). *Donu al mi panon* (diras oni, se sur la tablo troviĝas nenia pano). *Kie estas la ĵurnalo?* (diras la patro pri la hodiaŭa ĵurnalo dezirante legi ĝin). *Donu al mi ĵurnalon* (diras la patrino al siaj infanoj pri iu ajn ĵurnalo, ĉar ŝi volas nur bruligi la fajron). *Mi ne loĝas en tendo, se en kabano* (oni parolas pri la maniero de loĝado). *Mi ne loĝas en la tendo, sed en la kabano* (oni vidas la tendon kaj la kabanon antaŭ siaj okuloj).

b) se la artikolo anstataŭas la refleksivon ĉe vestaĵoj, korpopartoj kaj parencoj: *Mi demetis la jakon* (mian jakon). *La knabo frotis al si la okulojn* (siajn okulojn). *Li loĝas ĉe la gepatroj* (ĉe siaj gepatroj).

c) se la substantivo ne montras konkretan individuon, sed reprezentanton de sia kategorio: *La historio estas pli arto ol scienco.* (Sed: *Rakontu al mi belan historion*). *La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas pli blanka.* (Sed: *Sur la tablo kuŝas blanka papero*). *La hundo estas fidela amiko de la homo = La hundoj estas fidelaj amikoj de la homoj.* - Ĉe abstraktaĵoj kaj materialoj sen epiteto aŭ suplemento la artikolo ne estas deviga: *(La) Lakto estas pli nutra ol (la) vino.* *(La) Vitro estas rompebla kaj travidebla.* *(La) Malfeliĉo kunigas la homojn, (la) feliĉo disigas ilin.* - Sed: *La fero el Svedujo estas bona* (suplemento). *La grandaj malfeliĉoj estas silentaj* (epiteto).

d) se temas pri ĉiuj partoj de la tuto: *Oni traserĉis la domojn en la strato* (ĉiujn domojn). *Oni traserĉis domojn en la strato* (ne ĉiujn domojn). *Jen staras la infanoj de mia amiko* (ĉiuj liaj infanoj aŭ tiuj el la infanoj, pri kiuj ni jam parolis). *Jen staras infanoj de mia amiko* (nur kelkaj el liaj infanoj). *Tie iras filo de sinjoro N* (unu el liaj filoj). *Tie iras la filo de sinjoro N* (tiu el la filoj, pri kiu ni jam antaŭe parolis, aŭ sinjoro N havas sole unu filon).

e) se temas pri io unika, sola de sia speco: *la suno, la luno, la ĉielo, la tero, la mondo, la alteco de domo* (ĉiu domo havas nur unu altecon), *la longeco de la ekvatoro, la tria etaĝo* (ĉiu domo havas nur unu trian etaĝon). Ankaŭ la adjektiva relativa superlativo montras unikaĵon: *La plej rapida aŭtomobilo de la mondo. Vi estas la plej bela knabino, kiun mi konas. Li estas la plej bona studento de nia lernejo* (tia studento estas nur unu en la tuta lernejo). La artikolo ne estas uzata ĉe la superlativo absoluta. Komparu: *Ŝi surhavis plej valorajn juvelojn* (= treege valorajn). *Ŝi surhavis la plej valorajn juvelojn el ĉiuj ĉeestantaj damoj.*

f) antaŭ adjektiva aŭ substantiva epiteto: *la fama kapitano Cook, la malgranda Petro, la stulta Johana, la granda Parizo, Karolo la Kvara, Amoro la Arkpafanto, la Sankta Virgulino la Nemaĵita, la instruisto Novotný, la urbo Praha, la rivero Vultavo, la frato Fabiano, la sinjoro doktoro.* - La artikolo ne estas uzata antaŭ titoloj kun nomoj (sen epiteto): *sinjoro doktoro Novák* (la bona sinjoro doktoro Novák), *profesorino Ondrová, fraŭlino Cerná, kapitano Smith, kardinalo Richelieu.*

g) antaŭ poseda pronomo, se ĝi anstataŭas substantivon: *via libro kaj la mia* (= libro). *Tiu libro estas (la) mia.*

h) antaŭ la vorto TUTA: *en la tuta domo, mi prenis la tutan panon*

i) se la preparolata afero koncernas jam menciitan aferon: *Vi veturas al Brno. Ĉu vi jam aĉetis la bileton?* (la bileton por Brno)

j) kutime antaŭ plurvortaj nomoj: *la Unua de Majo, la Monto Blanka, la Ruĝa Maro, la Renkontiĝo de Pacdefendantoj*

k) antaŭ la verbaj substantivoj montrantaj ĵus faritan agon, reprezentanton de sia kategorio aŭ se ilin sekvas DE: *Ĉu vi aŭdis la krion? Mi ne komprenis la aludon. Fininte la skribadon, li kaŝis la paperon. La kantado estas agrabla okupo. La hirundoj anoncis la alvenon de la printempo. Min tre ĉagrenas la perdiĝo de tiu letero. La irado de la aferoj.*

l) kutime antaŭ substantivo, al kiu rilatas predikativo: *Li pentris la sinjorinon sidanta* (en sida pozo). *La okulojn li havas bluaj. La knabinoj dancis nudpiedaj. Li trovis la vinon bona* (ke ĝi estas bona). - Sed kun epiteto: *Li pentris sidantan sinjorinon* (sur la bildo estas ia nekonata sidanta sinjorino). *Li pentris la sidantan sinjorinon* (tiun sinjorinon, kiu ĉi tie antaŭ niaj okuloj sidas, kvankam sur la bildo ŝi eble staras). *Vi havas bluajn okulojn. Tie dancis nudpiedaj knabinoj* (nekonataj). *Tie dancis la nudpiedaj knabinoj* (pri kiuj ni jam parolis, aŭ kiujn ni ĝuste nun rigardas, kvankam tiam ili povis danci piedvestitaj). *Li trovis bonan vinon* (pri kiu li ne sciis). *Li trovis la bonan vinon* (kiun li tiom serĉis).

5.2.5.2. La artikolo ne estas uzata:

a) antaŭ propraj nomoj kaj iliaj titoloj, se ili ne havas epiteton: *Petro, Novák, Vultavo, Parizo, Bucefalo, kapitano Brown, sinjoro majoro Lee* (Sed: *la stulta Petro, la urbo Parizo, la ĉevalo Bucefalo*)

b) se la substantivo estas jam determinita per pronomo: *mia frato, tiu domo, kiu urbo, iu*

knabo, ĉiu homo, tia laboro, kia domaĝo, ia libro, ĉia klopodo, ties infanoj, nia plej granda sukceso ktp.

c) se la superlativo estas uzita en absoluta senco, sen komparado: *La lernejon vizitadis plej bonaj knabinoj* (ne la plej bonaj knabinoj en la urbo, sed simple tre bonaj, altkvalitaj knabinoj)

d) se la afero ankoraŭ ne estis menciita: *Proksime de ĉi tie estas lernejo* (ia lernejo). - Sed: *La lernejo estas proksime de ĉi tie* (en ĉi tiu frazo estas nova informo "proksime de ĉi tie", sekve "la lernejo" devas esti informo malnova, jam konata).

e) oni ne uzas la artikolon tiam, kiam oni ne estas certa, ĉu ĝin uzi. La artikolo fakte konfirmas, ke oni efektive parolas pri tiu difinita, jam konata afero, pri kiu la aŭskultantaro pensas. Se oni ekzemple dirus "hodiaŭ brilis suno", la aŭskultantoj povus prave opini, ke ne temas pri nia, al ĉiuj konata suno, sed pri iu alia suno, ankoraŭ ne observita. Se la aŭskultantoj ne povas scii, pri kio temas, tiam oni ne uzas la artikolon. Se oni diras "sur la tablo kuŝas libro", oni supozas, ke la aŭskultantoj konas la tablon, sed ne la libron.

5.3. Adjektivo.

La adjektivo esprimas ideon pri kvalito, rilato aŭ determino: *bela, tabla, certa*.

5.3.1. Deklinacio. La singulara nominativa finaĵo -a alprenas en la pluralo la finaĵon -j kaj en la akuzativo la finaĵon -n (*bela, belaj, belan, belajn*). Kiel epiteto ĉiu adjektivo havas la saman formon kiel la substantivo, al kiu ĝi apartenas: *bona amiko, bonaj amikoj, bonan amikon, bonajn amikojn*. Se la adjektivo apartenas al pluraj substantivoj, ĝi devas esti en pluralo, same kiel substantivo, al kiu apartenas pluraj adjektivoj: *bela domo kaj ĝardeno* (sole la domo estas bela), *belaj domo kaj ĝardeno* (ambaŭ estas belaj), *la angla kaj franca lingvoj* (temas pri du lingvoj), *la Ŝekspira kaj Bajrona lingvo* (temas pri unu lingvo, la angla).

5.3.2. Signifo de la adjektivo. La adjektivo povas esprimi:

a) kvaliton - ĉi tiuj adjektivoj estas plej ofte originaj (*bela knabino, saĝa viro*) aŭ derivitaj per -ema, -inda (*laborema knabo, skribinda letero*), escepte derivitaj ankaŭ el substantivoj aŭ verboj (*fantazia filmo, bombasta reklamo, efika laboro, loga propono*).

b) rilaton - ĉi tiuj adjektivoj estas plej ofte derivitaj el substantivoj kaj verboj (*pastra domo, subtegmenta ĉambro, ligna tablo, labora tago, porĉiama amo*).

c) determinon - krom la veraj adjektivoj (*certaj homoj*) havas la adjektivan determinan funkcion ankaŭ la participoj (*venintaj infanoj, kaptitaj kanajloj*), la artikolo (*la libro*), la numeraloj (*tri pomoj, tria pomo*) kaj kelkaj pronomoj (*mia libro, tiu plumo, iu sinjoro*).

Kelkaj adjektivoj povas laŭ situacio esprimi aŭ kvaliton aŭ rilaton aŭ determinon: *certa sukceso* = senduba sukceso (kvalito); *certa sinjoro* = iu sinjoro (determino); *reĝa trono* = trono de la reĝo (rilato); *reĝa donaco* = bela kaj valora donaco (kvalito); *nutra programo* = programo

pri nutrado (rilato); *nutra manĝo* = altkvalita manĝo (kvalito) ktp.

5.3.3. Komparacio. Por la komparacio estas uzataj la adjektivoj de kvalito (*tre bela kampo, pli bela kampo*, sed ne: *pli tabla lampo*). La komparacio ekzistas **relativa**, kiu komparas kvalitojn de du aŭ pluraj aferoj aŭ estaĵoj, kaj komparacio **absoluta**, kiu nur akcentas iun kvaliton sen komparado.

5.3.3.1. *Komparacio relativa.* La komparacio relativa havas tri gradojn:

1. pozitivo - *bela*
2. komparativo - *pli bela, malpli bela*
3. superlativo - *plej bela, malplej bela*

La komparativo komparas malegalaĵojn per **PLI OL, MALPLI OL** (*Li estas pli riĉa ol mi, mi estas malpli riĉa ol li.*) kaj egalaĵojn per **TIEL-KIEL, TIOM-KIOM, SAME-KIEL, SAMGRADE-KIEL** (*Li estas tiel rapida, kiel lertmova. Ŝi estas tiom bela, kiom saĝa. La oranĝo estas same saniga kiel citrono. Li estas samgrade inteligenta kiel forta.*) La komparadon eblas akcenti per aliaj adverboj (*Li estas konsiderinde pli granda ol vi. Petro estas nur iom malpli forta ol Johano. Petro estas ĝuste tiom alta kiel Paŭlo.*) Komparante du estaĵojn, la komparativo havas la valoron de la superlativo kaj postulas la artikolon (*Li havas du filinojn; Maria estas la pli juna. Li levis la pli grandan el la tranĉiloj* - evidentas, ke la tranĉiloj estis du). Esperanto ne uzas la komparativon en absoluta senco (*mi aĉetis malpli novan ŝrankon*), sed preferas aliajn rimedojn (*mi aĉetis ne novan ŝrankon, fortranĉi konsiderinde grandan pecon da viando, esti ne tro inteligenta, esti ne sen riĉaĵoj; esti sufiĉe saĝa; ne tro junaj personoj* ktp.).

La superlativo esprimas, ke iu aŭ io posedas kvaliton pli aŭ malpli ol ĉiuj aliaj. Tia estaĵo estas ĉiam siamaniere unika, tial ĝi postulas la artikolon (*Li estas la plej bona amiko, kiun mi havas. Li estas mia plej bona amiko. Li estas la plej bona mia amiko. Li estas la plej bona el inter miaj amikoj. Li estas la plej bona lernanto de nia lernejo. Mi volas tiun plej bonan el la libroj.*) La superlativon eblas akcenti per **MULTE** (*Li estas la multe plej fama verkisto en sia lando.*) Sen la artikolo ĝi estas uzata en la funkcio absoluta (*Sur la tablo troviĝis plej bongustaj dolĉaĵoj. Plej malgranda infano tion scias.*)

5.3.3.2. *Komparacio absoluta.* La komparacio absoluta estas esprimata per adverboj antaŭ la adjektivo (*tre bela, malmulte saĝa, iom, ete, normale, vere, multe, ege, treege, ekstreme, perfekte, terure, tute, diable, tro, kiel eble plej, superhome* ktp. *forta*), per afiksoj (*duonvarma, varmeta, varmega*), per diversaj frazturnoj (*obstina kiel azeno; longa distanco, kiel stulta li estas; kresko mamuta, sed saĝo liliputa*) kaj per la superlativo sen la artikolo (*ŝi surhavis plej valorajn juvelojn = tre valorajn; plej malgranda infano tion scias*). Sed ne uzu en la absoluta senco la komparativon (*venis ia pli aĝa sinjoro*); apliku aliajn metodojn (*venis ia ne plu juna sinjoro; mi aĉetis ne novan ŝrankon*).

5.3.4. Substantiva uzado de adjektivoj: *Mia kara, venu! Tiom da knabinoj, sed la plej ĉarma mankas. La malsana restis hejme. El la du tranĉiloj prenu la pli akran.*

5.4. Pronomo.

La pronomo anstataŭas substantivon aŭ adjektivon aŭ determinas ĝin: *mi, via, tiu, ĉio* ktp.

La pronomoj estas personaj (personaloj), posedaj (posesivoj) kaj tabelaj (korelativoj), kiuj plu dividiĝas je montraj (demonstrativoj), rilataj (rilativoj), demandaj (interogativoj), nedifinaj (indefinitivoj), neaj (negativoj) kaj kolektivaj (kolektiv-pronomoj).

5.4.1. Personaloj.

a) La personaloj finiĝas per -i (*mi, ci, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili, si, oni*), en la akuzativo ili alprenas -n (*min, vin, sin, onin . . .*) kaj povas ilin antaŭi prepozicioj (*pri mi, de vi, al ili*).

b) La nedifinita personalo ONI rilatas al homoj (*Oni ne kredus, ke tio estas ebla*), escepte al bestoj (*En la ĝangalo oni mortigas sin reciproke*), sed neniam al la senviva naturo (*Pluvas. Estas malvarme.*). Rilate al ONI estas uzeblaj kaj la singularo (*Oni estas certa, ke la afero sukcesos*) kaj la pluralo (*Oni estas certaj, ke la afero sukcesos*), sed la singularo estas preferinda.

c) La refleksivo SI estas uzata sole ĉe la triaj personoj de ambaŭ nombroj: *Petro lavis sin. Petro lavis lin* (iun alian). *Ana kaj Eva aĉetis panon al si. Ana kaj Eva aĉetis panon al ili* (al aliaj personoj). Sed: *mi lavas min, vi aĉetis al vi, ni kantas por ni mem.*

d) La personalo CI neniam estis destinita por ĝenerala uzo, nur por literaturo (precipe por traduki verkojn, en kiuj la ci-dirado rolas specialan taskon). En la komencaj jaroj de la movado oni provis ĝin en la ampozio aŭ en prozo por alparolado de infanoj kaj bestoj, sed montriĝis, ke la pronomo, ne uzata en la ĉiutaga vivo, malhavas emocian forton, kiun tiaj verkoj bezonas. Tial ankaŭ en la literaturo venkis VI inter geamantoj, ĉe infanoj kaj eĉ ĉe bestoj, same kiel en la komuniza lingvo; necesas nur atenti la nombron: *vi estas prava* (al unu persono), *vi estas pravaj* (al pluraj personoj). En la literaturo kelkaj aŭtoroj ankoraŭ uzas CI de tempo al tempo, ekzemple por emfazi insultojn (*ci kanajlo!*). Konsiderinde ofte estas uzataj la verboj *cii* (ci-diri) kaj *vii* (vi-diri).

e) La personalo LI signas virseksan personon, ŜI inksan kaj ĜI objekton aŭ beston. Parolante pri "homo, persono, infano, bebo" uzu LI (*Se venos ia persono, gastigu lin.*), sed ne tiam, kiam oni certe scias, ke temas pri ino (*Suzanjo alkuris al mi; mi prenis la infanon sur la brakojn kaj balancis ŝin.*). Ĉe "bebo, infano" eblas uzi ankaŭ ĜI (*la bebo rampis sur la planko; subite ĝi ekploris*). Parolante pri "grupo, nacio, armeo" ks. estas uzata ĜI (*li levis la manojn al la popolo kaj benis ĝin*), escepte ankaŭ ILI (*La juna paro sidis sur la benko; ili kisis unu la alian*). Ĉe la bestoj estas regule uzata ĜI, eĉ se estas indikita la sekso (*Mi havas hejme virkaton, mi tre amas ĝin*). Tamen ekzistas situacioj, kiam eblas esceptoj. Ekzemple kiam necesas distingi la sekson (*Mi kondukis kapron kun kaprino al foiro; subite ŝi haltis, dum li trotis plu*) aŭ se la posedanto volas montri sian amon al la besto (*Mi havas pudelon; li nomiĝas Azoro*). En la fabeloj kaj fabloj estas ofte personigitaj bestoj, floroj, objektoj aŭ abstraktaĵoj, tiam necesas uzi LI kaj ŜI, ĉe la floroj kaj objektoj laŭplaĉe (*li Forto - ŝi Forto*), ĉe la bestoj prefere laŭsekse (*li Kuniklo - ŝi Kuniklino*).

f) La personalo ĜI parte sinonimas kun la demonstrativo TIO: *Ĝi estas virino mezaĝa. / Tio estas virino mezaĝa. - Ĝi ne estas io grava. / Tio ne estas io grava.* Sed absolute sinonimaj ili ne estas: *Li skribis la leteron, mi vidis ĝin* (= la leteron). *Li skribis la leteron, mi vidis tion* (= la skribadon). *Li rakontis la historion; ĝi estas vera* (= la historio). - *Li rakontis la historion; tio estas vera* (= ke li rakontis).

g) Evitu uzadon de personaloj, kiam ili povas rilati al du substantivoj (*La knaboj venis al la knabinoj; ili donis al ili pomojn*), sed esprimiĝu pli klare (*La knaboj venis al la knabinoj kaj donis al ili pomojn - La knaboj venis al la knabinoj, kiuj donis al ili pomojn*).

h) La personalojn emfazas la adverbo MEM staranta tuj post la emfazita vorto (*faru ĝin por vi mem, faru tion vi mem, prenu mem la akvon, tio estas komprenebla per si mem, li amas sin mem*). Distingu: *Mi mem vidis tion* (mi persone, propraokule) - *Mi sola vidis tion* (neniu alia vidis tion).

i) La personalo MI povas esti uzita substantive, en la sama senco ankaŭ MEM, ambaŭ kun la o-finaĵo aŭ sen ĝi (*mia propra mi = mia propra mio = mia propra mem = mia propra memo*).

5.4.2. Posesivoj.

a) La posesivoj formiĝas el la personaloj per la adjektiva finaĵo -a (*mia, cia, lia, ŝia, ĝia, nia, via, ilia, sia, onia*). En la pluralo ili alprenas -j (*viaj, siaj*), en la akuzativo -n (*mian, miajn*).

b) La refleksiva posesivo SIA estas uzata sole en la tria persono de ambaŭ nombroj: *Li havas sian libron - Li havas lian libron* (= de aliulo). *Ili havas siajn librojn. Oni havas sian libron. - Mi havas mian libron. Vi havas viajn librojn. Ni havas niajn librojn.*

c) La nedifinita posesivo ONIA estas preskaŭ neuzata: *La onia parolo diras, ke la prezoj malaltiĝis.*

d) Antaŭ posesivo anstataŭanta substantivon oni uzas la artikolon: *Ĉi tie kuŝas mia libro kaj tie la via. Viaj poŝtmarkoj al mi pli plaĉas ol la miaj.*

e) La posesivo sufiĉe determinas la substantivon, tial la artikolo estas superflua: *via hundo, mia plej bona amiko*. Se oni ŝanĝas la vortordon, ĉefe en la poezio, la artikolo estas uzata: *la plej bona mia amiko, mia amiko la plej bona, la voko via ne atingis min, via hundo la rapida.*

f) La posesivoj estas kombineblaj kun aliaj vortoj: *unu mia konato, iu mia amiko, lia unua verko, la unua el liaj verkoj, ĉia lia klopodo, tiuj miaj amikoj, kelkaj liaj libroj, du miaj bildoj, unu el miaj kamaradoj ktp.*

g) Anstataŭ LIA, ŜIA, ĜIA, ILIA eblas uzi en subpropozicio la demonstrativon TIES rilatanta al la lasta substantivo de la ĉefpropozicio: *Petro venis kun sia frato, sed ties helpo ne plu estis bezonata* (helpo de la frato). *Petro venis kun sia frato, sed lia helpo ne plu estis bezonata* (helpo de Petro). - Ĉe diferenca sekso de la personoj tio ne estas bezonata: *Petro venis kun sia fratino, sed ŝia helpo ne plu estis bezonata.*

5.4.3. Korelativoj.

a) Al la korelativoj apartenas la demonstrativoj (*tiu, tia, tio, ties*), indefinitivoj (*iu, ia, io, ies*), rilativoj-interogativoj (*kiu, kia, kio, kies*), kolektivaj pronomoj (*ĉiu, ĉia, ĉio, ĉies*) kaj negativoj (*neniu, nenia, nenio, nenies*).

b) La formoj finiĝantaj per -ES estas senŝanĝaj. Ili determinas substantivon: *ies kapo, ĉies favoro, ties mano, nenies afero, kies hundo*. La formoj per -O ekzistas sole en la singularo, havas la akuzativon (*ion, tion . . .*) kaj staras ĉiam memstare (*tio estas vero*), neniam antaŭ substantivo. La formoj per -A, -U havas ambaŭ nombrojn kaj ambaŭ kazojn (*iu, tiujn, kiaj, neniajn*) kaj povas stari aŭ memstare (*Kia li estas? Tiu ne venos.*) aŭ determinante substantivon (*Kiu urbo ĝi estas? Ĉia homo povos tion fari.*)

c) Al la demonstrativoj oni povas aldoni la adverbos ĈI: *ĉi tiu libro, tiu ĉi libro* (ne: *tiu-ĉi, ĉi-tiu*), *ĉi tio*. - Ankaŭ ĉe ĈIO oni uzas ĝin: *ĉi ĉio efektiviĝis* (pli bona ol: *tio ĉio efektiviĝis*). - Al la pronomoj rilataj, nedifinaj kaj kolektivaj eblas aldoni AJN: *Kiu ajn vi estas, estu bonvenigita. Mi bezonas helpon de iu ajn = de ĉiu ajn*. - KIU AJN estas uzinda en subpropozicioj: *kiu ajn volas, tiu ankaŭ povas*. - IU AJN similas al "almenaŭ unu", ĈIU AJN proksimas al "ĉiuj, kiuj eblas": *Mi volas legi iun ajn libron* (= almenaŭ unu libron, ne gravas kiun). *Mi volas legi ĉiun ajn libron* (= ĉiujn librojn, kiujn mi povos akiri). - Al la demonstrativoj kaj rilativoj eblas aldoni JEN: *Jen tiu knabino al mi plaĉas. Jen kion mi faris!*

d) La pronomoj komenciĝantaj per KI- povas servi jen kiel demandaj (*Kiu vi estas? Kiu libro al vi plaĉas? Kies estas la hundo? Kion vi faras? Kian laboron vi deziras?*), jen kiel rilataj (*Mi aĉetis libron, kiun mi bezonas. Mi faras, kion mi volas. Tio estas la knabo, kies fratino al mi plaĉas. Ŝi havas okulojn, kiajn neniu alia*).

e) La U-formoj uzitaj memstare montras la homojn, dum la bestoj kaj objektoj estas esprimitaj per la O-formoj (*Kiu falis? Kio falis? Iu aperis. Io aperis. Ĉiu ridas. Ĉio perdiĝis. Neniu kredas. Nenio okazis. Tiu respondis. Tio estas vero.*) Demandante pri la profesio aŭ sekso oni uzas KIO ankaŭ ĉe la personoj (*Kio vi estas? Mi estas instruisto. Mi estas viro.*). Respondante al "Kiu estas ...?" eblas uzi TIO, kvankam temas pri personoj (*Kiu estas tiu sinjorino? Tio estas sinjorino Brown = Ĝi estas sinjorino Brown = Ŝi estas sinjorino Brown*). Male, se oni povas subkompreni aĵon aŭ beston el konkreta nombro, estas uzata la U-formo ankaŭ ĉe la animaloj kaj objektoj (*Vi havas multajn hundojn; kiu ĉinokte tiom hurlis? Mi havas kvin bildojn, ĉiuj estas belegaj. Mia libro kaj tiu de mia frato*). Demandante pri pluraj personoj oni uzas la vorton KIU singulare (*Kiu estas tiuj homoj? Ili estas gesinjoroj Brown*).

f) Determinante substantivon, la pronomoj KIU, TIU montras specon, la pronomoj KIA, TIA kvaliton (*Kiu urbo ĝi estas? Prago, tiu urbo estas Prago. Kia urbo ĝi estas? Granda kaj bela, tia urbo kiel Prago ne povas esti malbela. Kiun libron vi legas? Tiun ĉi: la Faraonon. Kian libron vi legas? Tre interesan. Mi ne estas tia, kia vi. Sidis tie grandaj birdoj, kiajn mi neniam antaŭe vidis. Mi miras, kia bruoj estas ĉi tie. Rigardu, kiajn okulojn ŝi havas! Ne skribu al mi tiajn longajn leterojn. Kiun informon vi havas, la novan aŭ la malnovan? Kian nomon vi havas? Belan.*) En kelkaj situacioj la pronomoj KIU - KIA estas uzataj sinonime (*Kiun aĵon vi havas? = Kian*

aĝon vi havas? Mi estas tridekjara. Kiun libron vi legas? = Kian libron vi legas? La Faraonon. Kiun nomon vi havas? = Kian nomon vi havas? = Kia estas via nomo? = Kio estas via nomo? Petro). - Se eblas diri KIU EL, neniam uzu KIA (*Kiun libron de Dickens vi legis? = Kiun el la libroj de Dickens vi legis? Oliver Twist*). - Male, se oni demandas pri kvalito, devas esti sole KIA (*Kian libron de Dickens vi legis? Tre interesan, historian, aventuran*).

g) Determinante substantivojn la pronomoj IU, NENIU havas la signifon de IU EL, NENIU EL (el limigita nombro), dum IA, NENIA parolas pri nombro nelimigita: *Ĉu vi alportis iun libron?* (= iun el la atendataj?). *Ne, mi alportis neniun libron* (= neniun el la atendataj). *Ĉu vi alportis al mi ian libron?* (= ian ajn libron?) *Ne, mi alportis nenian libron* (= absolute nenian). *Ĉu vi vidis iun serviston?* (= iun el la hotela personaro?) *Ne, mi vidis nenian serviston* (= nek hotelan, nek alian serviston).

h) Determinante substantivon la pronomo ĈIU havas la signifon de ĈIU EL, dum ĈIA montras kvaliton aŭ maldifinon: *Ĉiu lernanto devas bone lerni* (= ĉiu el la lernantoj). *Ĉiu libro estas valora* (= ĉiu el la libroj). *Ni ekskursos en ĉia vetero. Ĉia dono estas bono. Nun ĉia bubo povas min moki. Tio perdas ĉian signifon. Tio forigas ĉian dubon. Li kontentigis ĉiajn postulojn / Li kontentigis ĉiujn postulojn metitajn sur lin* (= ĉiujn el la postuloj). Anstataŭ ĈIUJ DU oni uzas AMBAŬ (*Ili ambaŭ foriris*). Ofte preskaŭ sinonimas ĈIUJ kaj LA TUTA (*ĉiuj homoj = la tuta homaro, per ĉiuj fortoj = per la tuta forto*).

i) Memstare uzita TIA indikas specon, dum TIU konkretan individuon: *Vi kredis min profesoro, sed mi ne estas tia, mi estas laboristo.* - *Vi kredis min la profesoro, sed mi ne estas tiu, mi estas alia profesoro. Mi serĉis pinglon, sed en la tuta domo ne estas tia, ni havas nenian pinglon.* - *Mi serĉis la oran pinglon, sed en la tuta domo ne estas tiu, nur aliaj pingloj.*

j) Memstare uzitaj KIO, TIO anstataŭas la tutan frazon, dum KIU, TIU kaj ĜI konkretan individuon: *Li sportas, kio al mi plaĉas* (lia sportado). *Li skribis leteron, kion mi vidis* (la skribadon). *Li skribis leteron, kiun mi vidis* (la leteron). *Li skribis leteron, mi vidis tion* (la skribadon). *Li skribis leteron, tiun mi vidis = mi vidis ĝin* (la leteron). - Tamen tre ofte TIO kaj ĜI sinonimas: *Tio estas vero = Ĝi estas vero. Mi vidis tion = Mi vidis ĝin.*

k) Maldifinon de substantivo oni povas esprimi per manko de la artikolo (*Estis foje reĝo*), per la adjektivo CERTA (*Serĉis vin certa sinjoro*), per IU el limigita nombro (*iu mia amiko, iu verko de Goethe*) kaj per IA ĉe maldifina kvanto (*Serĉis vin ia knabo. Tiu biero estas ia abomenaĵo*).

l) De tempo al tempo estas uzata ALIA en la korelativa formo (*diru tion al aliu; diru al mi alion; tio estas alies ĉapelo*) kaj KELKIUJ (= kelkaj homoj) kaj MULTIUIJ (= multaj homoj). La formoj "aliu, alio, alies" estas malrekomendindaj.

5.5. Numeralo.

La numeralo determinas nombron precizan (*du, trioble*) aŭ neprecizan (*kelkaj, pluraj, multaj*). La numeraloj estas bazaj, ordaj, multiplikaj, kolektivigaj kaj frakcioj.

5.5.1. Bazaj numeraloj. La bazaj numeraloj estas: 0 nul, 1 unu, 2 du, 3 tri, 4 kvar, 5 kvin, 6 ses, 7 sep, 8 ok, 9 naŭ, 10 dek, 100 cent, 1000 mil, 13 dek tri, 30 tridek, 333 333 tricent tridek tri mil tricent tridek tri.

Ĉi tiuj numeraloj estas nevariaj, deklinaciataj estas sole la substantivoj: *tri homoj, donu al mi kvin pomojn* ktp.

Pro naciaj kutimoj la pli grandaj numeraloj ricevis substantivan formon, post kiu oni uzas la prepozicion DA: *miliono da homoj, du miliardoj da steloj, biliono, kvadriliono* ktp. Ankaŭ la ceteraj numeraloj povas havi la substantivan formon: *nulo, unuo, duo, dek-trio, trimil-tricent-tridek-trio* ktp. Komparu: *cent soldatoj* (= precize cent soldatoj) - *cento da soldatoj* (= proksimume cent soldatoj). La numeralaj substantivoj havas du signifojn: ili estas nomoj de ciferoj (4 = kvar) aŭ montras grupojn (kvaroj da homoj = kvaropo da homoj).

Rigardu la uzon de DA kaj de la akuzativo en la jenaj ekzemploj: *Da ĉevaloj ili havis 739 = Ĉevalojn ili havis 739. Da ni estis kvin = Ni estis kvin. Mi havas sescent mil kronojn. Ŝi havas ses milionojn da kronoj. Jen kuŝas ses milionoj kaj ses miloj da kronoj = Jen kuŝas ses milionoj ses mil kronoj. Li havas ses milionojn kaj ses milojn da kronoj = Li havas ses milionojn ses mil kronojn (du akuzativoj!). Da fratoj li havis du = Fratojn li havis du = Li havis du fratojn (Sed ne: Li havis du da fratoj!). Oni ŝtelis 2 000 000 da kronoj. Oni ŝtelis 2 300 000 kronojn.*

La akuzativo de substantivoj ne malaperas, se prepozicioj rilatas ne al la substantivo, sed al la numeralo: *La koncerto daŭris tri horojn. La koncerto daŭris ĉirkaŭ tri horojn = La koncerto daŭris horojn ĉirkaŭ tri. La vino kuŝis ok ĝis naŭ jarojn. Ili sendis kontraŭ ni inter cent kaj ducent soldatojn. Sed: Oni konstruis barilojn ĉirkaŭ tri ĝardenoj (= ĉirkaŭ ĝardenoj, kiuj estis tri).*

Ĉe la grandaj numeraloj atentu, ke diversaj landoj uzas diferencajn sistemojn. La angla-germana sistemo: 106 *miliono*, 109 *miliardo*, 1012 *biliono*, 1018 *triliono*, 1024 *kvadriliono*, 1030 *kvintiliono* ktp. En la usona-franca-itala sistemo: 106 *miliono*, 109 *biliono*, 1012 *triliono*, 1015 *kvadriliono*, 1018 *kvintiliono* ktp. Aperis provo formi Esperantan sistemon: 106 *miliono*, 109 *miliardo*, 1012 *duiliono*, 1015 *duiliardo*, 1018 *triiliono*, 1021 *triiliardo*, 1024 *kvariliono*, 1027 *kvariliardo*, 1030 *kviniliono*, 1033 *kviniliardo* ktp. La sufikso -iliono montras la potencon de miliono (triiliono = miliono³ = 1018), la sufikso -iliardo signifas mil -ilionojn (triiliardo = 103 · miliono³ = 1021). La eksponenton oni elkalkulas facile: dekduiliono (12 × 6 = 72) = 1072. dekduiliardo (12 × 6 + 3 = 75) = 1075.

5.5.2. Ordaj numeraloj. La ordaj numeraloj estas formataj el la bazaj per la adjektiva finaĵo -a: *deka, dek-sepa, tricent-kvindek-oka* ktp. Per la adverba finaĵo -e eblas krei numeralajn adverbojn: *unue, dek-kvare, tricent-kvine* ktp.

La ordaj numeraloj estas uzataj precipe por montri horon kaj daton: *Kioma horo estas? Estas la tria horo kaj kvindek minutoj. = Kioma estas? Estas la tria kaj kvindek. Mi venos je la kvara. - Estas la sesa de oktobro. (Se mankas la verbo "estas", oni uzas la akuzativon.) Mi venos la sesan de novembro. Prago, la kvaran de majo. (Eblas skribi nur ciferon, araban aŭ romanan, kun la finaĵo -a, kiu povas, sed ne bezonas esti apartigita per dividstreko: la 6-an de oktobro,*

la 6an de oktobro, Karolo la IV-a, sur la 33a paĝo ktp.

5.5.3. Multiplikaj numeraloj. La multiplikaj numeraloj estas kreataj per la sufikso -obl-: *triobla, trioblo, trioble, trioblige, triobliĝi, kelkoble, multoble, cent-dek-triobla*. Ne konfuzu la sufikson kun la tempa adverbo FOJE aŭ kun la kolektiviga sufikso -op-: *Oni dufoje pligrandigis mian salajron* (ekz. en aprilo kaj oktobro). *Oni duoble pligrandigis mian salajron* (ekz. mi havis 5 mil, nun mi havas 10 mil). *Trioblige fadenon* (fari ĝin trioble pli longa). *Triopigi fadenon* (kunplekti tri fadenojn en unu).

5.5.4. Frakcioj. La frakcioj estas formataj per la sufikso -on-: *duono, duone, duona, duonigi, duoniĝi, centono, dek-triono, milono* (0,001), *milionono* (0,000001). Post frakcioj estas uzata DE: *duono de horo, kvarono de pomo*.

DUON- kaj KVARON- estas uzataj prefikse: *duonhoro, kvaronhoro, kvaronluno, duonfermita fenestro*. Sed eblas diri ankaŭ: *horduono, horkvarono, lunkvarono, jarduono* (La prefiksa uzo estas pli ofta, kvankam malpli logika).

5.5.5. Kolektivigaj numeraloj. La kolektivigaj numeraloj estas kreataj per la sufikso -op-: *unuope, duopo, duope, dek-duopo, grupope, multope, kvaropiĝi, kvaropigi la infanojn, kvaropige faldita papero, triopigita fadeno* (tri fadenoj en unu kudriltruo). Temas ĉiam pri unu grupo: *marŝi triope* (sole tri homoj). Se la grupoj estas pluraj, oni uzas la prepozicion PO aŭ LAŬ: *marŝi potriope, laŭtriope, po triopoj, laŭ triopoj, triope en vicoj*.

5.5.6. Distribuo. La distribuon esprimas la prepozicio PO: *Ŝi vendis siajn tridek pomojn po tri* (= ŝi vendis la pomojn al pluraj homoj, ĉiu aĉetis tri). *La patrino donis al la infanoj po tri pomoj*. La prepozicio PO distribuas:

a) prezon, valoron: *fumi cigaredojn po unu krono*

b) distancojn kaj tempmezurojn: *veturi po 50 kilometroj en horo (hore); labori po 8 horoj en tago (tage)* - (Sed ne: *veturi 50 kilometrojn po horo, labori 8 horojn po tago!!!*)

c) aĵojn, personojn, bestojn: *vendi cigaredojn po dudek, la instruisto ekzamenis la lernantojn po tri, li ligis la hundojn po du*.

Povas aperi kvar situacioj:

c1) vendi cigaredojn po dudek (cigaredoj); vendi pomojn po kvin (pecoj); sendi la soldatojn po kvin (personoj);

c2) vendi pomojn po kilogramo; distranĉi drapon po tri metroj; vendi lakton po litro.

c3) vendi cigaredojn po tri skatoloj; aĉeti vinon po du boteloj, po du bareloj; gastoj alvenadis po grupo (ĉiam nur unu grupo); gastoj alvenadis po grupoj (ĉiam pluraj grupoj samtempe); vendi cigaredojn poskatole (po unu skatolo); aĉeti vinon pobotele, pobarele (po unu botelo, barelo); gastoj alvenadis pogrupe (po unu grupo); aĉeti pomalgrande, poiome; podetale;

c4) trupoj po cent soldatoj; li kunŝtelis sian bibliotekon po libro; oni kolektis la monon po kvin kronoj;

d) prezon kaj kvanton samtempe: *vendi cigaredojn po unu krono por peco; vendi cigaredojn po 8 kronoj por skatolo; mi fumis cigaredojn po 20 rubloj por paketo; ŝi ricevis lecionojn po 20 kronoj por horo;*

Rimarko I: La prepozicion PO oni povas kombini kun aliaj prepozicioj: *La tri gastoj sidis apud po unu tablo* (ĉiu gasto sidis sole ĉe unu tablo). *Po tri gastoj sidis apud la tabloj* (ĉe ĉiu tablo sidis tri gastoj). *Mi kolektis dudek frankojn de po du membroj* (ĉiuj du membroj donis komune unu frankon). *Mi kolektis dudek frankojn po du de membro* (ĉiu membro donis du frankojn). *Mi kolektis dudek frankojn de du membroj* (ĉiu el la du membroj donis dek frankojn). *Mi kolektis po dudek frankoj de du membroj* (ĉiu el la du membroj donis dudek frankojn).

Rimarko II: El la prepozicio PO oni kreas ankaŭ verbon: *Al ĉiu infano pois tri pomoj.*

Rimarko III: La prepozicio PO estas anstataŭigebla per la pronomo ĈIU: *Mi donis al la infanoj po tri pomoj = Mi donis al ĉiu infano tri pomojn. Po tri gastoj sidis apud la tabloj = Apud ĉiu tablo sidis tri gastoj.*

Rimarko IV: PAG kaj PIV asertas, ke post PO oni devas restigi la akuzativon, ĉar la prepozicio rilatas al la numeralo, ne al la substantivo: "vendi pomojn po tri", tial ankaŭ "vendi po tri pomojn". Sed tia analizo estas malĝusta, ĉar necesas subkompreni la vorton "peco": "vendi pomojn po tri pecoj (ne pecojn!)". Tial: *vendi po tri pomoj* (ordinara konstato) - *vendi po tri pomojn* = vendi po tri pecoj pomojn (oni simple akcentas, ke temas pri pomoj, ne pri piroj).

5.5.7. Kelkaj kaj pluraj. La diferenco estas jena: *kelkaj* = nemultaj; *pluraj* = pli ol unu: *venis kelkaj gastoj* (malpli ol oni atendis); *venis pluraj gastoj* (pli ol oni atendis).

5.5.8. Matematikaj formuloj.

a) adicio: *adiciato + adiciato = sumo*

$3 + 4 = 7$ tri plus kvar faras sep (tri kaj kvar estas sep)

b) subtraho: *malpliigato - subtrahato = diferenco*

$10 - 6 = 4$ dek minus ses faras kvar (ses el dek estas kvar)

c) multipliko: *faktoro x faktoro = produto (multiplikato x multiplikanto)*

$2 \times 6 = 12$ duoble ses faras dek du (du obligite per ses)

Simile: formato 14 x 20 cm - formato dek kvar obligite per dudek centimetroj

d) divido: *dividato : dividanto = kvociento*

$8 : 4 = 2$ ok dividite per kvar faras du

frakcio: *numerato / denominato = kvociento*

$3/7$ tri seponoj

35/100 tridek kvin centonoj

30/500 tridek kvincentonoj

30 5/100 tridek kaj kvin centonoj

decimala frakcio:

0,2 nul komo du

0,08 nul komo nul ok (nul komo ok centonoj)

3.007 tri komo nul nul sep (tri komo sep milonoj)

e) potencigo:

eksponento

potencato = potenco

$2^4 = 16$ la kvara potenco de du faras dek ses

f) elradikado:

radikindico

radikato = radiko

4

$625 = 5^4$ = la kvara radiko de sescent dudek kvin estas kvin

g) ekvacio: nekonato = ekvacia radiko

$x = 1$

$3 + x = 4$ tri plus ikso faras kvar

5.5.9. Kelkaj matematikaj esprimoj: numero (*numero de tramo, domo, gazeto, telefono ks.*); nombro (*la nombro kvar estas pli granda ol la nombro tri*); entjero (*ĉiu el la nombroj . . . -2, -1, 0, 1, 2, 3...*); frakcio ($3/4, 5/100$); decimala frakcio ($0,06; 5,8$); primo (*ĉiu el la nombroj 2, 3, 5, 7, 11, 13 . . .*); para nombro ($2, 4, 6, 8, 10, 12 . . .$); nepara nombro ($1, 3, 5, 7, 9, 11 . . .$); pozitiva nombro ($2; 3,7. 5 \frac{1}{2}$); negativa nombro ($-3; -5,6; -3/4$); egalaĵo ($3 + 5 = 8$); neegalaĵo ($3+5 \neq 9$).

5.5.10. Kelkaj frazoj kun numeraloj:

a) aĝo - *Kian aĝon vi havas? Kia estas via aĝo? Kiomjara vi estas? Kiom vi aĝas? Kiom da jaroj vi havas? - Mi havas 34 jarojn. Mi estas 34jara. Mi estas en mia 34-a jaro. Li havis la aĝon de ĉirkaŭ 25 jaroj. Ŝi estas deksepjarulino. Ĉijare li festos sian sepdekjariĝon.*

b) tempo - *Kioma horo estas? Kioma estas? - Estas la tria kaj tridek minutoj. Estas la tria kaj duono. Estas la tria kaj tri kvaronoj. Estas la tria kaj kvindek minutoj. Estas kvarono antaŭ la kvara. Estas dek minutoj antaŭ la kvara. Veni je la kvina kaj dek.*

c) dato - *Kioman tagon ni havas hodiaŭ? Kia dato estas hodiaŭ? Kioma tago estas hodiaŭ? - Hodiaŭ estas lundo. Prago, la 3-an de aŭgusto 1983. Li venis la sepan de julio mil naŭcent okdek du. Mi venos dimanĉe la 5-an de marto je la 18-a horo, sed ŝi venos nur en aprilo. Mi faros tion lunde.*

5.6. Verbo.

La verbo esprimas agon aŭ staton de ia subjekto.

5.6.1. Divido.

5.6.1.1. *Laŭ la ago kaj stato.*

a) ag-verboj: *ami, bati, pensi*

b) stat-verboj: *sani, sidi, taŭgi*

c) kopuloj: *esti, aspekti, iĝi, ŝajni* (ili esprimas rilaton inter estaĵo kaj ĝia kvalito: *via frato aspektas saĝa*)

d) modaj helpverboj: *voli, devi, povi*

5.6.1.2. *Laŭ la transitiveco.*

a) transitivaj: *fermi ion, startigi aŭton, vidi iun, mortigi iun* (ili bezonas rektan objekton en la akuzativo; apartenas al ili ĉiuj verboj kun la sufikso -igi)

b) netransitivaj: *sidi, morti, fermiĝi, vidiĝi, aŭto startas* (ili ne povas havi rektan objekton; apartenas al ili ĉiuj verboj kun la sufikso -iĝi)

c) ambiguaj: *fumi cigaredon - la cigaredo fumas; bati la sesan horon - la sesa horo batas; la infanoj ludas* (sen objekto) - *la infanoj ludas pilkon - li ludas violonon - la violono ludas melodion - li ludas la melodion per violono* (ĉi tiuj verboj estas nur nemultaj esceptoj penetrantaj en la lingvon internacian sub influo de naciaj lingvoj).

5.6.1.3. *Laŭ aspektoj.* La verbaj aspektoj montras la agon en ĝia daŭro (*li iris*) aŭ rezulto (*li alvenis*), en ĝia komenciĝo (*li eklegis la libron*) aŭ ripetiĝo (*li relegis la libron*), en ĝia momenteco (*ekfulmis*) aŭ ofteco (*fulmadis*). La plej gravaj aspektoj estas la daŭra kaj la rezulta, sen kiuj ne povas ekzisti la ceteraj: *li finlegis la libron* (rezulto), *li estis finleganta la libron* (daŭro). Tial la aspektoj daŭra kaj rezulta estas bazaj, dum la ceteraj estas aspektoj suplementaj.

A. Laŭ la bazaj aspektoj eblas klasi la verbojn en kvar kategoriojn:

a) *la verboj de daŭro sen rezulto (nura daŭro): ami, vivi, koni, scii* k.a. Ĉi tiuj verboj ne havas la rezultan aspekton (la ago longe daŭras, sed ne restigas ian rezulton), nur la daŭran, tial iliaj preteritaj participoj ne esprimas rezulton, sed ĉeson de daŭro, ili enhavas sencon de "ne plu": *aminta = ne plu amanta; amita = ne plu amata; vivinta = ne plu vivanta*. Escepte oni povas uzi ĉi tiujn participojn kiel epitetojn de substantivoj: *amataj kaj amitaj infanoj; vivantaj*

kaj vivintaj aŭtoroj. Sed en la kompleksaj tempoj ne uzu ilin: li estis amata (ne: li estas amita), li estis konata (ne: li estas konita), li estis vivanta (ne: li estis vivinta).

b) la verboj de rezulto sen daŭro (nura rezulto): *perdi, forgesi, atingi.* Ĉi tiuj verboj montras agon kun tre mallonga daŭro, preskaŭ kun nenia, tial oni ricevas tuj la rezulton. Tre ofte oni rimarkas la agon nur post la konstato de la rezulto (la ŝlosilo mankas, do ĝi estas perdita). Iliaj prezencaj participoj ne esprimas la daŭran aspekton, sed oftan ripetadon de la rezulto (*perdata ŝlosilo* - oni perdas ĝin ofte; *forgesata afero* - oni forgesas ĝin ofte aŭ iom-post-iome). Kelkaj verboj de ĉi tiu kategorio montras per prezenca participo provon aŭ klopodon realigi la agon (*kaptante fiŝojn li post du horoj sukcesis kapti nur unu karpon*).

c) la verboj de daŭro kun rezulto: *skribi, konstrui.* Ili montras agon, kiu daŭras certan tempon kaj restigas ian rezulton: post longa skribado restas letero, post longa konstruado restas domo. Ĉi tiuj verboj per la prezenca participo esprimas daŭran aspekton (*homo skribanta leteron, longe konstruata domo*), per la preterita participo la rezultan aspekton (*homo skribinta leteron, jam konstruita domo*). La daŭra aspekto nur informas, ĉu la ago okazis aŭ ne, sed ne diras, ĉu la ago estis sukcese finita, dum la rezulta aspekto informas ĝuste pri tiu sukceso aŭ malsukceso: *la letero estis skribata* (sed ankoraŭ ne finita), *la letero estis skribita* (jam finita).

d) la verboj hibridaj: *kovri, ilustrati, okupi.* En Esperanto estas nemultaj verboj, kiuj havas du signifojn, el kiuj unu estas rezulta kaj la alia daŭra: *kovri* = 1. meti kovrilon (rezulto); 2. kuŝi kovrante (daŭro); *ilustrati* = 1. desegni bildojn por libro (rezulto); 2. esti en libro por ornami (daŭro); *okupi* = 1. preni en posedon (rezulto); 2. teni en posedo (daŭro). *Oni kovris la plankon per tapiŝo* - nun la tapiŝo kovras la plankon. *La pentristo ilustris libron per bildoj* - nun la bildoj ilustras la libron. *La patro okupis la seĝon* (eksidis) - nun li okupas ĝin (sidas sur ĝi). *La planko estas kovrita per tapiŝo aŭ kovrata de tapiŝo, la libro estas ilustrita per bildoj aŭ ilustrata de bildoj, la seĝo estas okupita kaj ankaŭ okupata de la patro.* La praktiko preferas la preteritajn formojn (*kovrita, ilustrita, okupita*).

Rimarku la funkcion de la prepozicioj: *per tapiŝo* (la tapiŝo estas uzita kiel instrumento) - *de tapiŝo* (la tapiŝo kovras mem).

B. Laŭ la suplementaj aspektoj eblas klasi la verbojn en kvin kategorioj:

e) la verboj de la komenca aspekto: *la suno ekbrilis, mi eklegis libron, mi sidiĝis sur seĝon, mi enamiĝis al ŝi* ktp. La komenca aspekto estas kreata per la afiksoj ek- kaj -iĝi, sed ne ĉiuj iliaj derivaĵoj montras la komencan aspekton: *ruliĝi, fulmo ekbrilis, pordo fermiĝis.*

f) la verboj de la fina aspekto: *finlegi libron, alpelii bruton, formanĝi panon, tralerni lernolibron, ellerni lingvon, satmanĝi fruktojn, tutplenigi aliĝilon* ktp. La fina aspekto estas kreata per diversaj prefiksoidoj.

g) la verboj de ripeta aspekto: *relegi libron, rediri prelegon, revidi amikojn, reverki romanon* ktp. La ripeta aspekto signifas "fari ion ankoraŭfoje" kaj estas derivata per la prefikso re- (sed ne konfuzu ĝian signifon kun la signifo de "reen": *redoni, reveni*).

h) la verboj de momenta aspekto: *fulmo ekbrilis, li ekstremis. ekmoviĝu* ktp. La momenta aspekto estas kreata per la prefikso *ek-* same kiel la komenca.

i) la verboj de ada aspekto: *legadi librojn, sidadi en la parko, la koro batadis, fulmadi, tremadi* ktp. La ada aspekto esprimas agon multfoje kaj ofte ripetatan: *sidadi* - ofte *sidi*, *legadi* - ofte *legi*, *batadi* - multfoje *bati* (koro) aŭ ofte *bati* (patro filon). Ĝi povas signifi ankaŭ unu agon longe daŭrantan sen interrompo (*sidadi, legadi, batadi* - longe *sidi, legi, bati*), sed pli bone estas uzi la prezencajn participojn (*esti longe sidanta, leganta, batanta*). Tamen la substantiva formo montras longan daŭron: *sidado, legado, batado, fulmado, tremado* ktp. La participoj de ĉi tiuj verboj ne estas uzataj pro siaj pezeco kaj malbelsoneco: *sidadanta, legadata* (prefere: *ofte sidanta, ofte legata*).

5.6.2. Konjugacio. La verbo estas karakterizata

a) per modaloj - la verbo rolas aŭ kiel pura verbo (finitivo) aŭ kiel substantivo (infinitivo) aŭ kiel adjektivo (participo)

b) per modoj - la ago estas aŭ konstatata (indikativo) aŭ supozata (kondicionalo) aŭ ordonata (volitivo)

c) per tempoj simplaj - la ago okazas en estanteco (prezenco) aŭ en estinteco (preterito) aŭ en estonteco (futuro)

d) per tempoj kompleksaj - la ago esprimas aŭ daŭron (imperfekto) aŭ rezulton (perfekto) aŭ intencon (predikto)

e) per voĉoj - la subjekto la agon aŭ plenumas (aktivo) aŭ suferas (pasivo) aŭ kaŭzas (faktitivo) aŭ reagis sur ĝin (medialo)

I. La aktivo

A. Infinitivo: *kapti*

B. Finitivo (simplaj tempoj)

1. Indikativo

a. Prezenco: *kaptas*

b. Preterito: *kaptis*

c. Futuro: *kaptos*

2. Kondicionalo: *kaptus*

3. Volitivo: *kaptu*

C. Participo

1. Adjektiva

a. Prezenco: *kaptanta*

M. MALOVEC: Gramatiko de Esperanto

b. Preterito: *kaptinta*

c. Futuro: *kaptonta*

d. Kondicionalo: *kaptunta* (neoficiala)

2. Adverba (gerundio)

kaptante, kaptinte, kaptonte, kaptunte

3. Substantiva

kaptanto, kaptinto, kaptonto, kaptunto

D. Kompleksaj tempoj

1. Imperfekto: *esti kaptanta*

2. Perfekto: *esti kaptinta*

3. Predikto: *esti kaptonta*

II. La pasivo

E. Participo

1. Adjektiva

a. Prezenco: *kaptata*

b. Preterito: *kaptita*

c. Futuro: *kaptota*

d. Kondicionalo: *kaptuta* (neoficiala)

e. Volitivo: *kaptenda*

2. Adverba (gerundio)

kaptate, kaptite, kaptote, kaptute, kaptende

3. Substantiva

kaptato, kaptito, kaptoto, kaptuto, kaptendo

F. Kompleksaj tempoj

1. Imperfekto: *esti kaptata*

2. Perfekto: *esti kaptita*

3. Predikto: *esti kaptota*

III. La faktivo

G. 1. Sinteza formo: *kaptigi*

2. Analiza formo: *igi kapti*

IV. La medialo:

H. 1. Sinteza formo: *kaptiĝi*

Rimarkigo: De tempo al tempo aperas provoj pri sintezaj formoj *kaptanti, kaptinti, kaptonti, kaptati, kaptiti, kaptoti* (= esti kaptanta, kaptinta kaptota), sed ili ne estas rekomendindaj. Ili impresas peze kaj neklare, kutime la leganto devas dismeti ilin en la animo en analizan formon (ili manĝitis = ili estis manĝitaj) por kompreni ilian sencon.

5.6.3. Praktika uzo.

5.6.3.1. La infinitivo estas uzata:

a) Anstataŭ volitivo: *ne fumi! ne paroli! Li venis por helpi.* (Anstataŭ: *ne fumu! ne parolu! Li venis, por ke li helpu.*)

b) En demandaj kaj hezitesprimaj frazoj: *Kion fari? Ĉu esti aŭ ne esti? Tiel longe malsani! Mi scias, kion diri.*

c) Kiel objekta predikativo: *Li sentis sin fali. Mi vidis ŝin paroli kun li.*

d) Kiel substantivo: *Labori estas devo kaj ĝojo* (subjekto). *Vi ŝatas legi. Li ordonis al ili silenti* (objekto). *Kontroli ne signifas ne kredi* (subjekto - predikativo). *Preta morti. Estas tempo por manĝi* (suplemento). *Mi venis helpi* (adjekto).

Rimarko: La infinitivon kaj la substantivon oni ne povas interŝanĝi meĥane:

ĉiam diri la veron = la ĉiama dirado de la vero

scii la sekreton = la sciado de la sekreto

deziro venĝi = deziro de venĝo

preta venĝi = preta je venĝo

estas tempo por morti = estas tempo por morto

anstataŭ paroli = anstataŭ parolo

antaŭ ol veni = antaŭ la veno

5.6.3.2. La indikativo estas uzata:

a) Se temas pri ago reale okazanta, okazinta, okazonta: *Mi dubas pri tio* (mia dubo estas reala). *Mi alvenos morgaŭ. Mi aĉetis la libron.*

b) Se temas pri nur ebla ago dependanta aŭ ne de kondiĉo: *Mi iros teatron, se ne pluvos. Vi devas al mi helpi. Li certe venos. Povas esti, ke vi eraras. Ĉu eblas, ke vi ne kredas al mi?*

5.6.3.3. La prezenco estas uzata:

a) por esprimi tion, kio okazas en la momento de parolo: *"Li pravas", ŝi diris. Li kriis, ke li estas malsata.*

b) por esprimi tion, kio estas kutima, ordinara: *en vintro oni hejtas la fornojn*

c) por esprimi tion, kio okazas certan tempon ĝis nun: *jam tri jarojn mi lernas angle; ekde aprilo li estas malsana*

d) por esprimi tion, kio estas vera en kiu ajn tempo: *la vero ĉiam venkas; du kaj tri faras kvin; la suno estas grandega*

e) por esprimi tion, kio jam okazis, sed kion oni prezentas pli vive, kvazaŭ ĝi okazus nun: *Herodoto rakontas en sia historio, ke . . . ; Li proksimiĝis al la arbaro - subite eksonas pafo.*

Rimarko: Esperanto neniam uzas la prezencon anstataŭ la futuro: *mi forvojaĝos morgaŭ* (ne: *mi forvojaĝas morgaŭ*)

5.6.3.4. La preterito estas uzata por esprimi:

a) tion, kio okazis antaŭ la momento de parolo: *hieraŭ li vizitis min; Sokrato mortis ĉirkaŭ la jaro 400 antaŭ nia erao; li diris, ke ŝi ĵus venis*

b) tion, kio kutime okazis en la pasinteco, sed ne plu okazas: *dufoje en tago li devis gimnastiki*

5.6.3.5. La futuro estas uzata por esprimi:

a) tion, kion oni opinias okazonta post la momento de parolo: *li venos morgaŭ; li diris, ke li helpos al ŝi postmorgaŭ*

b) tion, kion oni volas, ke iu faru: *venu, ni vendos ĝin; prenu la libron, vi portos ĝin al la avo*

c) tion, kies okazivecon oni antaŭvidas: *se pluvos, restu hejme; se iu ŝtelos, estu punita*

5.6.3.6. La kondicionalo:

a) montras agon nerealan, fiktive imagitan: *se estus varme, mi irus naĝi; Dio ne estas homo, ke li mensogus; estus pli bone, se mi forirus*

b) esprimas deziratan, sed neblan agon: *ho! se li venus!*

c) estas uzata en ĝentila demando, kiun oni prezentas kvazaŭ fiktiva: *mi dezirus unu kilogramon da pomoj; ĉu mi povus trarigardi la gazeton? Mi volus scii, ĉu vi komprenis la klarigon.*

d) en simpla formo estas uzata por ĉiuj tempoj en la buŝa parolo: *mi farus tion* (hieraŭ, nun, morgaŭ). En la literaturo oni komencis distingi la pasintan kondicionalon per la kompleksa tempo ESTUS + -INTA: *mi estus farinta tion hieraŭ*. Tamen ankaŭ tiu formo ne estas preciza, ĉar la participo insistas pli pri la rezulto ol pri la pasinteco (*mi estus farinta tion* = la farado jam estus finita), sed ĉi tiu rezulto povus okazi kaj en la pasinteco kaj en la estanteco kaj en la estonteco. Pli preciza estus la kompleksa formo de la helpverbo (*hieraŭ mi estus estinta farinta - hodiaŭ mi estus estanta farinta - morgaŭ mi estus estonta farinta*), sed ĉi tiuj formoj estas tro pezaj kaj preskaŭ ne uzataj. Por la praktiko sufiĉas en la parolo la simpla formo kaj en la literaturo plie la formo "estus + -inta" en la valoro de la kondicionalo pasinta.

Rimarko: La formo ESTUS + -INTA estas en literaturo ofte kunmetata al -INTUS. La aŭtoroj poste uzas -US por la kondicionaloj prezenca kaj futura, dum -INTUS por la kondicionalo preterita: *Se mi tion sciintus, mi ne irintus tien. Mi devintus tion fari! Ho, se mi povintus ricevi ĝin!*

d) montras ĉe DEVI kaj POVI malobeon de devo aŭ povo: *Mi devis kaj povis labori, tial mi laboris. Mi estus devinta kaj povinta labori, sed mi ne laboris. Mi devas kaj povas labori, tial mi laboras. Mi devus kaj povus labori, sed mi ne laboras. Mi ne devis kaj ne povis labori, tial mi ne laboris. Mi ne estus devinta kaj povinta labori, sed mi laboris. Mi ne devas kaj ne povas labori, tial mi ne laboras kaj ne laboros. Mi ne devus kaj ne povus labori, sed mi laboras kaj laboros.*

5.6.3.7. La volitivo estas uzata:

a) se temas pri ago, kies plenumiĝon oni deziras kaj konscias ebla: *iru for! li venu, kaj mi pardonos al li; ho, venu la espero!*

b) se temas pri ago nereala, sed ebla kaj petata, volata, ordonata de iu aŭ trudata, necesigata de io: *ordonu al li, ke li ne babilu; permesu al malriĉa homo, ke li ion petu de vi; estas necese, ke vi iru tien; jam ne multe mankis, ke mi eraru*

c) se temas pri ago ne reala, probable aŭ ne, kiu plenumiĝos eventuale pro ies volo: *Kiun lokon mi legu al vi? Kial mi perdu vin ambaŭ en unu tago? Ĉu ni restu aŭ foriru? Vi volas tion fari, do kial tion ne faru mi?*

d) se temas pri ago celata kaj intencata, kiu kaŭzis kaj eldevigis alian agon: *Mi venis, por ke mi helpu al vi. Ili diras tion, por ke ili kuraĝigu vin.*

5.6.3.8. La modaj helpverboj (voli, devi, povi) havas jenajn specialaĵojn:

a) ilin sekvas ĉiam la infinitivo (post VOLI estas subkomprenata HAVI): *mi volas (havi) panon; vi devas foriri; ni povis resti*

b) POVI kaj DEVI havas neregulan pasivon: *estas eble, eblas* (anstataŭ: *estas povate*), *estas necese, necesas* (anstataŭ: *estas devate*).

c) DEVI havas dusence uzatan negacion: *mi ne devas fari tion* = 1) mi ne bezonas fari tion (neniu kaj nenio devigas min fari tion); 2) mi havas malpermeson fari tion. Pli logika estas la unua signifo: *mi devas* = mi havas devon - *mi ne devas* = mi ne havas devon. Sed en la praktiko estas pli ofte uzata la dua signifo, kiun enkondukis Zamenhof mem sub influo de la angla, kaj kiu devus pli logike aspekti jene: *mi devas ne fari tion*. La duan signifon konfirmas ankaŭ la kondicionalo, uzata por esprimi malobeon de devo: *mi ne devintus kaj ne devus fari tion* (sed mi faris kaj faras, do mi malobeas devon, neceson aŭ malpermeson, t.e. ordonon ne fari). Por esprimi, ke ne ekzistas ia devo, neceso aŭ ordono, estas uzata - ankaŭ sub influo de la angla - la verbo "ne bezoni": *mi ne bezonas fari tion* (= ne ekzistas ia devo, neceso nek ordono, kiu devigus min fari tion, do mi povas decidiĝi propravole). Kelkaj esperantistoj klopodas enkonduki la verbon "darfi = havi permeson", kies negacio identus kun la dua signifo de "ne devi": *mi ne darfas* = *mi ne devas*. Sed multaj gramatikistoj

rifuzas tiun verbon, kaj grandaj vortaroj (PIV, Bokarev, Krause, Minnaja) ignoras ĝin, eĉ la germana, kvankam "darfi" devenas el la germana lingvo (ich darf = mi povas, ĉar mi havas permeson). Similan signifon havas la verbo "rajti", sed ne precize, ĉar oni ofte povas fari ankaŭ tion, pri kio oni ne havas leĝan rajton (ekz. invitito povas eniri fremdan loĝejon, ĉar li havas permeson, sed ne rajton).

d) laŭ la plenumoteco de la ago ili similas al la volitivo, sed la volitivo esprimas eksteran volon kaj ordonon (*Li diris al mi: "Faru tion."*), dum la modaj helpverboj esprimas sian sencon el la vidpunkto de la subjekto, kiu sentas la devon, povon, volon (*mi devas, povas, volas fari tion*). Tamen ankaŭ per ili eblas esprimi la eksteran volon: *li diris, ke mi devas tion fari; estas necese, ke mi tion faru; mi ne estas devigita fari tion; li devis fiaski* (la cirkonstancoj devigis lin) e) per DEVI oni esprimas probablon: *tio devas esti vero = tio certe estas vero = tio plej probable estas vero; tion li ja devis scii = tion li certe sciis; tio devas sukcesi = tio verŝajne sukcesos*

5.6.3.9. La participo (sen la helpverbo) estas uzata:

a) kiel objekta predikativo: *mi vidis lin forlasita*

b) kiel adjekto: *promenante sur la strato mi falis* (tempo); *ili kantis naĝante* (maniero); *ne vidate li enŝteliĝis* (maniero); *li observis la aŭton, dezirante ĝin aĉeti* (kaŭzo); *kvankam forlasite de sia edzo, ŝi estis feliĉa* (koncedo); *havante (havunte) monon, mi estus pli feliĉa* (supozo)

c) kiel epiteto: *aĉetanta homo; forlasita hejmo; amita infano = ne plu amata infano; mono havata estas pli grava ol havita* (= ne plu havata); *leteroj ankoraŭ skribotaj; skribenda artikolo*

d) kiel substantivo: *aĉetanto, kaptito, ekzamenanto, ekzamenotoj* (homoj); *kaptitaĵo, bojanto, blekanto* (bestoj); *estinto, subtrahato, dividanto* (abstraktaĵoj)

5.6.3 10. La kompleksaj tempoj:

a) montras, ke du agoj okazis samtempe, aŭ ke unu okazis post finiĝo de la alia ago aŭ antaŭ ĝia komenciĝo: *Kiam mi venis hejmen, la domo estis balaata* (la alveno kaj la balaado okazis samtempe). *Kiam mi venis hejmen, la domo estis balaita* (la alveno okazis post la balaado). *Kiam mi venis hejmen, la domo estis balaota* (la alveno okazis antaŭ la balaado). *Kiam mi venis hejmen, vi estos lernanta* (samtempeco). *Kiam mi venis hejmen, vi estos lerninta* (alveno post lernado). *Kiam mi venis hejmen, vi estos lernonta* (alveno antaŭ lernado)

b) montras rezulton (staton post la ago), daŭron (staton dum la ago) kaj intencon (staton antaŭ la ago). REZULTO: *La firmo estas bankrotinta. Li estas mortinta. La suno jam estas leviĝinta. La letero estas skribita. La pordo estis fermita. La ŝlosilo estos perdita. Lia vivo estus perdita. Estu malbenita!* DAŬRO: *Li estis mortanta. Ŝi estas malrapide alvenan ta. La letero estis longe skribata. La domo estis konstruata tri jarojn.* INTENCO (aŭ stato antaŭ la ago): *La domo estis jam falonta. Li estis skribonta leteron. La letero estis skribota. Liaj lipoj ekstremis, kvazaŭ li tuj estus ridonta.*

c) Ofte ambaŭ principoj aperas en la frazo samtempe: *Kiam mi venis hejmen, la ĉambro estis*

balaita (rezulto okazinta antaŭ la alveno). Sed ne ĉiam estas tiel: *La kamiono alveturis kaj la ŝranko estis surmetita* - la surmeto okazis post la alveturo, tamen estas uzita la preterita participo, ĉar oni volis montri la rezulton (surmetita), ne la daŭron (surmetata) nek la intencon (surmetota). Ĉi tiu ekzemplo pruvas, ke la ideo pri la rezulto, daŭro kaj intenco estas pli grava ol la ideo pri la samtempeco, posttempeco kaj antaŭtempeco. Simile estas ankaŭ en la aktivo: *La kamiono alveturis kaj ili estis surmetintaj la ŝrankon*.

d) En la aktiva voĉo la kompleksaj tempoj estas uzataj nur escepte. Oni preferas uzi simplajn formojn kun precizigaj aŭ aliaj vortoj: *Mi manĝis TIAM, kiam vi vokis min* (= mi estis manĝanta). *Kiam mi venis, li ANGONIIS* (= li estis mortanta). *Mi JAM finis, kiam sonis la kvina* (= mi estis fininta). *Li JAM falis, kiam mi alkuris* (= li estis falinta). *Kiam oni ALportis bieron, li verŝis al si* (= oni estis portanta). *Li ĴUS venis* (= li estas veninta). *Mi JAM rakontis, kiam vi venis* (= estis rakontanta). *Mi JAM ANTAŬE rakontis, kiam vi venis = POST KIAM mi rakontis. vi venis = ANTAŬ OL vi venis, mi rakontis = ANTAŬ via alveno mi rakontis = POST mia rakontado vi venis* (= mi estis rakontinta). *Mi PROJEKTAS (VOLAS, INTENCAS) vojaĝi al . . .* (= mi estas vojaĝonta). *Esperanto ANKORAŬ NE aperis* (= estis aperonta). *Ŝi HAVIS ANKORAŬ multajn jarojn de vivo* (= estis vivonta). *La muro BALDAŬ disfalos* (= estas disfalonta) - La verboj de nura daŭro ne bezonas precizigan vorton: *Mi konis lin, kiam li estis infano* (= mi estis konanta lin)

e) En la pasiva voĉo ne ekzistas simplaj formoj, tial ĉe la pasivo oni ĉiam devas decidi pri du tempo-distingiloj: de la helpverbo kaj de la participo. La verboj de nura daŭro ne havas la perfektan (*ŝi estis amata, ne ŝi estis amita*), dum la verboj de nura rezulto preskaŭ ne uzas la imperfekton (*la ŝlosilo estis ofte perdata*), sed preferas la perfektan (*la ŝlosilo estis perdita hieraŭ*). El la frazo "*La ŝlosilo estis perdita, kiam vi vizitis nin*" ne evidentas, ĉu la perdo okazis antaŭ, dum aŭ post la vizito. Tial necesas precizigo: *La ŝlosilo estis JAM perdita, kiam vi vizitis nin. - La ŝlosilo estis perdita TIAM, kiam vi vizitis nin. - La ŝlosilo estis perdita, POST kiam vi vizitis nin*. La verboj de daŭro kun rezulto esprimas per la imperfekto daŭron (*la letero estis skribata*) kaj per la perfekto rezulton (*la letero estis skribita*). La hibridaj verboj esprimas per la perfekto sian rezultan signifon (*la planko estis kovrita per tapiŝo*), per la imperfekto sian daŭran signifon (*la planko estis kovrata de tapiŝo*). Senviva objekto servas en la perfekto kiel instrumento (*per*), en la imperfekto kiel aganto (*de*). Escepte ĝi povas esti aganto en ambaŭ kazoj: *tero kovrita kaj kovrata de neĝo* (la neĝo falis mem).

f) Tre ofte la perfekto esprimas ne nur la rezulton, sed ankaŭ la staton, kiu estiĝis post la finiĝo de la ago, kaj la predikto montras la staton antaŭ la ago. Tiuj formoj povus esti nomataj stataj tempoj: *Lia kapo sur la bildo estas iom klinita flanken* (oblikva). *Li estas ruinigita* (mizera). *Mia mano estis ĉiam malfermita por suferantoj* (preta doni). *La pordo estas ŝlosita* (ne trairebla). *Li estas bankrotinta* (mizera). *La domo estas falonta* (kaduka). *Aŭtune la kampo estos plugota* (preta por esti plugata). *La vendejo estas rekonstruota* (fermita).

5.6.3.11. La voĉoj:

a) *La aktivo* estas sistemo, en kiu la verbo esprimas agon aŭ staton plenumatan de la

subjekto. Oni devas tre atenti la transitivecon de la verboj. El la transitivaj verboj oni kreas la netraktivajn per -ĜI (*fermi la pordon - la pordo fermiĝis*), el la netraktivaj la transitivajn per -IGI (*morti - mortigi iun*), sed ankaŭ per -UMI (*pendi - pendumi iun*) kaj per PRI- (*la lampo lumas en la ĉambro - prilumi la ĉambro*). Tamen ne ĉiu derivaĵo per -UMI estas transitiva (*serpentumi*). Ekzistas pluraj verboj uzataj kaj transitive kaj netraktivaj (*fumi cigaredon - la cigaredo fumas*), kelkaj transitivaj verboj povas esti uzitaj sen objekto, absolute, kvazaŭ ili estus netraktivaj (*mi vidas kaj aŭdas bone = mi ne estas blinda nek surda; la infanoj ludas = la infanoj amuziĝas*). Nemultaj netraktivaj verboj povas havi rektan objekton formitan el la sama aŭ sinonima radikoj (*dormi profundan dormon, vivi mizeran vivon, lukti malesperan lukton, ĵuri honestas ĵuron, iri longan vojon, plori krokodilajn larmojn* ktp.). Tiu maniero estas nomata etimologia figuro. Ĉar la finaĵo -n indikas ankaŭ direkton, tempon kaj mezurojn, ĝi povas aperi ankaŭ post netraktivaj verboj (*iri Pragon, dormi tutan nokton, kuŝi du horojn, alti preskaŭ du metrojn* ktp.). De tempo al tempo aperas provoj, plej ofte en la poezio, uzi anstataŭ nerekte objekto (*koleri kontraŭ la patro, sidi sur seĝo, pensi pri ekskurso*) objekton rektan (*koleri la patron, sidi seĝon, pensi ekskurson*), sed tia uzo ne estas rekomendinda.

b) **La pasivo** estas sistemo, en kiu la ago estas suferata de la subjekto kaj plenumata de iu alia. La pasivo akcentas la agon pli forte ol la aktivo (*ŝi estis vestata de la servistino - la servistino vestis ŝin; oni fermis la pordon - la pordo estis fermata*). Ĝenerale eblas diri, ke la pasivaj participoj estas krebblaj sole el la transitivaj verboj (*amata virino, sed ne mortata virino*). Tamen, kiel jam estis montrite ĉe la aktivo, ekzistas situacioj, kiam eĉ netraktivaj verboj povas esti sekvata de la akuzativo. Tiam la netraktivaj verboj povas havi la pasivon (*la dormo estis profunde dormata, mizere vivata vivo, longe irota vojo, sidata seĝo, kolerata patro*), kun prefikso por montri rezulton (*alvenita celo, tradormita nokto, trakuŝita tempo*). Ĉar la sufiksoj de la pasivo jam enhavas informon pri la transitiveco, ne estas necese (laŭ la principo de neceso kaj sufiĉo) kombini ilin kun la sufikso -IGI, sed sole ĉe la substantivaj vortradikoj (*kavo - kavigi trunkon - kavigita aŭ kavita trunko; lumo - lumigi fenestron - lumigita aŭ lumita fenestro; - sed: morti - mortigi hundon - mortigita hundo*). En la nepersona maniero de esprimado la pasivo ofte respondas al ONI aŭ -ĜI (*la artikolo estas uzata - oni uzas la artikolon - la artikolo uziĝas*), sed ne ĉiam (*la ŝtono estas rulata = iu rulas ĝin; la ŝtono ruliĝas - de si mem*)

c) **La faktitivo** estas sistemo, en kiu la ago estas trudata de la subjekto al iu, kiu ĝin plenumas aŭ suferas. La faktitivo estas esprimata per IGI, kiu povas esti aŭ memstara (analiza formo) aŭ kiel sufikso (sinteza formo).

Ĉe la netraktivaj verboj la kaŭzanta ago povas esti nur aktiva (*dormigi = igi dormanta*), dum ĉe la transitivaj ĝi povas esti aŭ aktiva (*manĝigi ĉevalojn per fojno = igi ĉevalojn manĝantaj fojnon*) aŭ pasiva (*manĝigi ĉevalojn al tigroj = igi ĉevalojn manĝataj de tigroj*). Plej ofte ĝi estas pasiva (*vidigi = igi vidata; konstruigi = igi konstruita; fermigi = igi fermata*).

Se oni volas distingi la du diferencojn, oni povas uzi partecipant elementon (*manĝantigi*

ĉevalojn, manĝatigi ĉevalojn). Tiujn formojn oni uzas nur escepte, ekzemple por montri la futuran tempon (*okazontigi la aferon, devontigi sin pagi grandan sumon*).

Ĉe la sinteza formo estas uzataj jenaj rimedoj por distingi la ordonanton de la plenumanto de la ago: *Paŭlo konstruigis domon PER Petro - La domo konstruita de Petro estis konstruigita DE Paŭlo - La domo estis konstruigita DE Paŭlo PER Petro* (Paŭlo ordonis, Petro plenumis). *Ili lernigis SIAN langon paroli. Li atentigis ŝiN. Mi sentigos AL vi mian vipon. Li havigis AL si la libron PER agento. Li konstruigis AL sia amatino belan domon PER fama arkitekto. Ŝi kombigis AL si la harojn PER servistino KUN ora kombilo* (= la servistino havis oran kombilon; ke ŝi uzis ĝin, necesas diveni el la teksto).

Ĉe la analiza formo post IGI sekvas la subjekto de la kaŭzata ago, en la akuzativo, poste sekvas verbo en la infinitivo kaj fine ĝia objekto: *Li igis lin legi la libron. Li igis ĉevalon manĝi fojnon. Li igis (onin) tajlori veston*.

Ĉe la analiza formo la kaŭzata ago estas aktiva. Komparu: *konstruigi domon per arkitekto* (= igi domon konstruita per arkitekto) - *igi arkitekton konstrui domon* (= igi arkitekton konstruanta domon).

La analizan formon oni uzas ankaŭ tiam, kiam la kaŭzata ago jam estas esprimata per derivaĵo kun la sufikso -IGI: *Li igis (onin) purigi la veston. Li igis pintigi la krajonon*.

Rimarku, kiel grava estas la vortordo: *Ili igis la soldatojn mortigi* (= ke la soldatoj mortigu iun). *Ili igis mortigi la soldatojn* (= ke la soldatoj estu mortigitaj de iu). La analiza formo ne estas uzata ĉe la netransitivaj verboj: *starigi tablon* (ne: igi tablon stari). Tre similan signifon kiel la memstara IGI havas LASI, sed estas inter ili diferencoj: IGI montras volon, deziron, ordonon, dum LASI signifas "ne malhelpi": *ŝi lasis lin foriri* (ŝi ne malhelpis, ke li foriru), *ŝi igis lin foriri* (ŝi sendis lin for).

d) **La medialo** estas sistemo, en kiu la subjekto faras la agon pri si mem, estas subjekto kaj objekto samtempe. La medialo estas esprimata per -ĜI kaj estas parenca al la aktivo kun la refleksivo (*ĵetiĝi - ĵeti sin*). La diferenco estas, ke la refleksivo esprimas agon faratan vole, konscie, dum la medialo esprimas agon faratan sen decido de konscia volo (*la knabo rulas sin sur la tapiŝo - la ŝtono ruliĝas*). Tamen sufiĉe ofte la praktiko preskaŭ ne atentis la diferencon (*tie sin trovas - troviĝas multaj domoj; li sidigis sin - sidiĝis sur la seĝon*).

Oni ne devas konfuzi la medialon kun la pasivo: *la ŝtono ruliĝas* (per si mem) - *la ŝtono estas rulata* (de iu), *li laŭdas sin - li estas laŭdata de iu* (sed ne: li laŭdiĝas), *la letero estas skribata* (ne: la letero skribiĝas), *la bildo estas pentrata* (ne: la bildo pentriĝas). Tamen eblas: *la libro facile legiĝas* (la legado estas amuza kaj senpena), *antaŭ liaj okuloj malrapide pentriĝis la bildo de la pejzaĝo* (ne temas pri artverko, sed pri la vidaĵo el la fenestro de vagonaro).

5.6.4 La aspektismo kaj tempismo (ATA/ITA-problemo).

a) En Esperantujo oni jam plurajn jardekojn furioze diskutas (kaj disputas), ĉu la participoj havas tempan-aspektan karakteron

(esprimas tempojn kaj aspektojn samtempe) aŭ nete tempan karakteron (esprimas nur tempojn kaj neniajn aspektojn). Okazis eĉ simpozioj pri la problemoj kaj estis verkitaj tutaj libroj de ambaŭ flankoj. Kvankam la Akademio aprobis la "aspektismon", la "tempistoj" ne ĉesas batali plu, eĉ interne de la Akademio. Ĉiu homo kutimiĝis en sia gepatra lingvo al certaj pensmanieroj kaj aŭtomate utiligas ilin ankaŭ en Esperanto, eĉ ne rimarkante, ke alinacia samideano povas kompreni la uzitan formon diference, ol la aŭtoro celis. Al ĉiu ŝajnas, ke nur lia sistemo estas logika, natura, sanmensa kaj sekve sole taŭga por lingvo internacia. En la literaturo ni senĉese povas renkonti formojn de ambaŭ skoloj, iam kiel intencan provokon, sed plej ofte kiel tute subkonscian aplikon de la nacilingvaj kutimoj. Tial estas bone koni la problemon, ne por riproĉi la parolanton, sed por lin kompreni.

b) La verbaj formoj ne estas absolute precizaj. Precizigas ilin la situacio, ĉirkaŭteksto aŭ la nacilingvaj kutimoj, ofte la precizeco simple ne gravas. Jen kelkaj ekzemploj:

Hieraŭ li skribis leteron - ĉu li skribis la tutan leteron, kiu sekve estas jam finita kaj fermita, aŭ ĉu li nur dediĉis certan tempon al skribado, sed la letero estas ankoraŭ ne finita kaj ne fermita? *Morgaŭ li skribos leteron* - ĉu tutan aŭ nur parton?

Pasintjare mi konstruis domon - ĉu la domo estas finita aŭ ne? Ĉu mi laboris kiel aŭtoro de la domo aŭ nur kiel unu el dungitaj laboristoj?

Matene mi kaptis fiŝojn - ĉu mi nur klopodis ilin kapti aŭ ĉu mi efektive sukcesis? *Kaptota fiŝo* - ĉu fiŝo, kiun oni provos kapti aŭ kiun oni efektive kaptos? Se antaŭhieraŭ policianoj preparis sin por hieraŭ ĉasi krimulon, sed ni hodiaŭ scias, ke ili ne sukcesis, ĉu ni rajtas diri, ke antaŭhieraŭ la krimulo estis *ĉasota/kaptota*?

Morgaŭ ni manĝos laktokremon, kiun oni batos kelkajn minutojn antaŭ la surtabligo. Ĉu ni hodiaŭ skribu *Morgaŭ ni manĝos batotan kremon* aŭ *batitan kremon*? Ĉu la batadon rilatigi al la hodiaŭo, kiam ni parolas kaj kiam la batado ankoraŭ ne okazis, aŭ al la morgaŭa surtabligo de la kremo, kiu okazos post la batado? Nun la kremo estas *batota*, sed en la momento de surtabligo ĝi estos jam *batita*. Ĉu la frazo *Morgaŭ ni manĝos batotan kremon* signifas, ke la kelnero alportos kremon *nebatitan*, kiun la gastoj mem devos bati?

La vendejo estis malfermita je la oka matene - ĉu oni malfermis ĝin precize je la oka (ŝanĝo de stato) aŭ pli frue, do alveninto trovis ĝin je la oka **jam** malfermita (konstato de stato)? *La vendejo estis malfermata je la oka matene* - ĉu tio signifas, ke je la oka akurate okazis la celata ago, ŝanĝo de la stato, do malfermo, aŭ ĝi signifas, ke oni **nur komencis** malfermi, sed ne finis, do malfermata, sed fine ne malfermita? Aŭ ĉu ni montru la stat-ŝanĝon prefere per alia helpa verbo (*La vendejo iĝis malfermita je la oka matene*)?

La knabo estis naskita la duan de majo - ĉu li naskiĝis la unuan de majo, ĉar la duan li estis **jam** naskita, aŭ ĉu li naskiĝis iam dum la dua de majo kaj simple estis naskita antaŭ ol la tago finiĝis? Ĉu la naskiteco rilatu la komenciĝon aŭ la finiĝon de la priparolata tago? *La knabo estis naskata la duan de majo* - ĉu la naskado okazis en tiu tago aŭ daŭris la tutan tagon aŭ eble eĉ ne sukcesis? Ĉu ni precizigu denove: *La knabo iĝis naskita la duan de majo* - ?

Sur la strato kuris viro; liaj gamboj estis forŝiritaj de bombo - ĉu sur la strato kuris sengamba viro aŭ ĉu li unue kuris kaj nur poste la bombo forŝiris liajn gambojn? *Sur la strato kuris viro; liaj gamboj estis forŝirataj de bombo* - ĉu viro kun forŝirataj gamboj povas ankoraŭ kuri? Ĉu forŝirado okazis post la kurado? Ĉu la forŝirado estis nur komencita, sed ne finita? *Sur la strato kuris viro; liaj gamboj estis forŝirotaj de bombo* - ĉu *forŝirota* signifas, ke lin minacis danĝero de forŝiro aŭ ĉu ĝi efektive plenumiĝis?

konstruita domo - ĉu domo finita ĝis kompleteco, do ni priskribas ĝian **aspekton**, aŭ nur *ne plu konstruata domo*, do ni parolas nur pri la pasinta **tempo** de la ago (konstruado), sciante nenion pri la nuna aspekto de domo, nenion pri ĝia kompleteco aŭ nekompleteco? Do: ĉu la participoj havas **nete tempan** karakteron, aŭ esprimas **tempon kaj aspekton**?

En 1960 estis la domo konstruota - *La domo estis konstruota en 1960*. Laŭ teorio de **emfazo** estas ambaŭ frazoj sinonimaj, nur en la unua estas emfazita la participo (*konstruota*), en la dua la dato (*en 1960*). Laŭ teorio de **priparolata tempo** la unuan frazon ni diras el vidpunkto de homoj en 1960, kiuj tiam preparis la konstruadon, sekve la konstruado mem komenciĝis post 1960 (ekz. en 1961, 1965 ktp.), dum la duan frazon ni diras el vidpunkto de homoj ekz. en la jaro 1955, kiuj tiam planis, ke ili konstruos la domon en 1960.

Morgaŭ la letero estos forsendita - *La letero estos forsendita morgaŭ*. Laŭ la teorio de emfazo denove estas ambaŭ frazoj sinonimaj, akcentante foje participon, foje daton, sed en ambaŭ kazoj oni forsendos la leteron morgaŭ. Laŭ la teorio de priparolata tempo la unua frazo estas formulita el vidpunkto de morgaŭo, kiam la letero estos jam forsendita (do oni devas ĝin forsendi ankoraŭ hodiaŭ!), dum la alia frazo estas formulita el vidpunkto de la hodiaŭo kiel plano por morgaŭ, sekve la uzo de *-os -ita* estas logika sensencaĵo kaj necesas ĝin ŝanĝi al *-as -ota* por ricevi sencohavan frazon: *La letero estas forsendota morgaŭ*.

c) Jen vi legis kelkajn tipajn ekzemplojn, pri kiuj polemikas tempistoj kaj aspektistoj. Ĉar plej ofte temis pri demando, ĉu uzi it-formon aŭ at-formon, oni nomas la polemikon ankaŭ *ata/ita-problemo*. Ĉiu komprenas la menciitajn formojn aŭtomate laŭ kutimo de sia gepatra lingvo, sed tiuj kutimoj en ĉiu lingvo diferencas. Montriĝis, ke ofte eĉ du tempistoj aŭ du aspektistoj ne akordiĝas en kompreno de la sama verba formo, ĉar ambaŭ konceptoj havas plurajn subvariantojn. En dialogo nek parolanto nek aŭskultanto havas tempon science esplori konkretan priskribatan situacion kaj ambaŭ subkonscie uzas al kutimiĝintajn aŭtomatigojn. Necesas do scii, ke la verbaj formoj estas plursencaj, ke ili havas pli multajn signifojn, ol kiel ilin komprenas nia nacia lingvo, kaj ke nur el la ĉirkaŭteksto ni povas kompreni, kiun el la eblaj signifoj la parolanto celis - se tia detalo havas por ni ian gravecon.

d) La tempistoj vidas pruvon, ke Esperantaj participoj havas "nete tempan" karakteron en terminologio de la *Fundamento*, kie oni parolas pri participoj de *tempo estanta* kaj de *tempo estinta*, sed pri neniam aspektoj, rezultoj, daŭroj aŭ intencoj. La aspektistoj oponas, ke la terminologio estas tute sama en ĉiuj aspektismaj lingvoj (ekz. slavaj, kiujn parolis Zamenhof) kaj ke la *Fundamento* ankaŭ ne mencias antaŭtempecon, samtempecon kaj

posttempecon. Sekve la terminologio mem diras nenion, kiel kompreni la signifon de la terminoj *tempo estanta*, *tempo estinta*. Kiam ni esploras, kiel la *Fundamento* tradukis la kvar tiklajn participojn (*faranta*, *farinta*, *farata*, *farita*) en la kvin lingvojn (franca, angla, germana, rusa, pola), sole la rusa ilin vere tradukas per kvar rusaj participoj (*delajuŝĉij*, *sdelavŝij*, *delajemij*, *sdelannij*), dum en la ceteraj lingvoj aperas frazoj kun proksimuma klarigo. Zamenhof montris, ke al la participoj en Esperanto estas plej proksime la participoj en lia denaska lingvo.

La tempistoj rimarkis, ke pluraj ekzemploj en *Ekzercaro* malakordas kun ilia koncepto, tial ili asertas, ke *Ekzercaro* ne estas propra parto de la *Fundamento*, nur ĝia nedeviga komento, kaj sekve eblas ĝin korekti, dum la aspektistoj tiajn korektojn rifuzas kaj opinias male *Ekzercaron* la plej grava parto de la *Fundamento*.

La praktiko montris, ke ankaŭ la tempistoj kutime komprenas la esprimon *konstruita domo* kiel domon komplete finitan, ne ĉesigitan meze de konstruado, do ankaŭ ili atribuas al la formo rezulton. La diferencoj en kompreno ne koncernas la rezulton mem, sed la momenton, kiam la rezulto okazis. La solvo verŝajne venos mem, kiam ambaŭ partioj klopodos sin kompreni, ne superforti unu la alian.

5.7. Adverbo.

La adverbo esprimas lokon (*tie*), tempon (*nun*), manieron (*tiel*), gradon (*tre*) aŭ mezuron (*iom*). La adverbojn oni povas dividi en du klasojn: primitivaj kaj derivitaj. La primitivajn oni povas plue dividi en tri subklasojn: tabelaj, aŭ-adverboj kaj unusilabaj.

5.7.1. Tabel-adverboj.

a) Al la tabel-adverboj apartenas la nedifinaj (*ie*, *iam*, *ial*, *iel*, *iom*), la montraj (*tie*, *tiam*, *tial*, *tiel*, *tiom*), la demandaj-rilataj (*kie*, *kiam*, *kial*, *kiel*, *kiom*), la kolektivaj (*ĉie*, *ĉiam*, *ĉial*, *ĉiel*, *ĉiom*) kaj la negativaj (*nenie*, *neniam*, *nenial*, *neniel*, *neniom*).

b) La adverboj "*ial*, *ĉial*, *nenial*, *ĉiel*, *ĉiom*, *neniom*" preskaŭ ne estas uzataj. "*Ĉiom*, *neniom*" signifantaj "la tuta kvanto, tute nenia kvanto" estas pli emfazaj ol "*ĉio*, *nenio*".

c) Al la lok-adverboj oni povas almeti la direktan -N (*ien*, *tien*, *kien*, *ĉien*, *nenien*).

d) Ĉe "*tie*, *tien*" oni povas uzi "*ĉi*" (*ĉi tie*, *ĉi tien*, *tie ĉi*, *tien ĉi*). Zamenhof foje uzis "*ĉi*" en senco de "*ĉi tie*" (*Ĉi ludas infanoj. Legu ĉi en la ĉambro.*) Nuntempe oni ne uzas tiun manieron (*Ĉi tie ludas infanoj. Legu tie ĉi en la ĉambro.*)

e) Ĉe la adverboj nedifinaj, demandaj kaj kolektivaj oni povas uzi "*ajn*" (*ie ajn*, *kie ajn*, *ĉie ajn*, *iam ajn*, *kiam ajn*, *ĉiam ajn*, *iel ajn*, *kiel ajn*, *ĉiel ajn*).

f) Post la kvant-adverboj oni uzas DA (*iom da pano*, *iom da floroj*, *kiom da homoj*, *tiom da geknaboj*). Sed: *tiom belaj knabinoj*, *tiom multaj geknaboj*. Komparu la diferencon: *tiom sagacaj knaboj* - *tiom da sagacaj knaboj*.

g) KIOM-TIOM antaŭ adjektivo estas pli fortaj ol KIEL-TIEL (*Li estas tiel stulta! Li estas tiom*

stulta! Kiel stulta li estas! Kiom stulta li estas!). Ili povas servi por distingi emfazon disde la komparado (*Li estas tiom stulta kiel bovo*).

h) El kelkaj tabel-adverboj eblas krei substantivojn kaj adjektivojn (*kialo, iometo, tiea, ĉitiera, tiama, iama, kioma, iom-post-ioma, tiela* = pli forta ol "tia").

i) De tempo al tempo oni uzas ankaŭ "*aliam*" (alitempe), "*aliom*" (alia kvanto), "*aliel*" (alie, alimaniere), "*kelkiom*" (pli akcenta nedifineco ol ĉe iom). Ĉi tiuj formoj ne estas rekomendindaj. Krome oni devus atenti la dusencecon de "*alie*" (1. alimaniere, 2. aliloke).

j) Kelkaj tabel-adverboj formas duopojn (*iom post iom, tien kaj reen, tie kaj tie, tie kaj tie ĉi, tiam kaj tiam*).

5.7.2. Aŭ-adverboj.

a) Al pluraj adverboj Zamenhof donis la finaĵon -aŭ. Tempaj: *ankoraŭ, baldaŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ*. Manieraj: *adiaŭ, almenaŭ, ankaŭ, apenaŭ, kvazaŭ, preskaŭ*.

b) KVAZAŬ kaj APENAŬ povas servi ankaŭ kiel subjunkcioj (*Apenaŭ li finis la laboron, li sentis sin tiel laca, kvazaŭ li estus mortanta*).

c) Komparaciebla estas sole BALDAŬ (*Mi venos baldaŭ, marde. Ne, venu pli baldaŭ. Venu kiel eble plej baldaŭ*).

d) El la aŭ-adverboj oni povas derivi (*baldaŭa, hieraŭa, morgaŭo, adiaŭi, preskaŭa* ktp.).

e) ANKORAŬ montras: 1) daŭron, nefiniĝon de la ago aŭ stato (*la lampo ankoraŭ brulis*); 2) denove, plie (*li diris ankoraŭ kelkajn vortojn; diru tion ankoraŭ unufoje*); 3) malpli akcentan EĈ (*la infano estis ankoraŭ pli pala*); 4) ANKORAŬ NE signifas, ke io ĝis nun ne okazis (*mi ankoraŭ ne konas lin; ankoraŭ neniam mi vidis lin*). Neniam diru NE ANKORAŬ, sed ĉiam ANKORAŬ NE.

f) ANKAŬ staras ĉiam antaŭ la vorto, kiun ĝi akcentas: *Ankaŭ mi promenis en la parko* (Kiu alia promenis en la parko?). *Mi ankaŭ promenis en la parko* (Kion alian mi faris krom la promonado?) *Mi promenis ankaŭ en la parko* (Kie aliloke mi promenis krom en la parko?) - En la fino de la frazo ĝi staras tiam, kiam ĝi apartenas al la demandvorto: *Kiu ŝin konas ankaŭ?* (ne: Ankaŭ kiu ŝin konas?)

5.7.3. Unusilabaj (nesimetriaĵ) adverboj.

a) Multaj adverboj ne ricevis la finaĵon -aŭ kaj restis unusilabaj. Lokaj: *ĉi, for*. Tempaj: *jam, ĵus, nun, plu, tuj*. Manieraj: *ajn, ĉu, eĉ, ja, jen, ĵes, mem, ne, tre*. Kvantaj: *ju - des, pli, plej, tro*. Eblas aldoni memstariĝintajn prefiksojn: *ek, dis, re, retro*.

b) EĈ signifas 1) pli forta ANKAŬ: *ne nur - sed eĉ; li donis al li ne nur konsilon, eĉ monon; eĉ sur la suno troviĝas makuloj*. - Tamen distingu: *Mi alportis donacon ankaŭ por vi* (mi ne forgesis vin). *Mi alportis donacon eĉ por vi* (kvankam vi ne meritas ĝin); 2) pli forta ANKORAŬ: *Ĉi tiu ĉambro estas eĉ pli granda; mi sentas min eĉ pli malbone ol antaŭ la kuracado*;

3) pli forta MALGRAŬ: *EĈ kun lia helpo mi ne sukcesis*; 4) EĈ NE signifas ABSOLUTE NENIA: *Eĉ ne unu vorton plu! Mi ne diros eĉ unu vorton. Li havas nenion, eĉ ne pecon da pano*; 5) post negacia frazo ĝi signifas MALE, KONTRAŬE: *Li ne estas geniulo. Eĉ, oni povas nomi lin idioto. - Li ne estas antialkoholulo. Eĉ! (li drinkegas). Ĉu vi ne venos? Eĉ! (mi venos).*

c) JAM signifas 1) ke daŭra ago aŭ stato jam komenciĝis: *La libro estas jam preta. Li jam laboras*; 2) ke momenta ago jam finiĝis: *Li jam foriris*; 3) JAM NE signifas. ke daŭra ago jam finiĝis: *Li jam ne vivas*; 4) JAM NE signifas ankaŭ, ke atendata ago ne okazis kaj ne okazos: *Li jam ne venos. Ni atendis lin ankaŭ dimanĉe, sed li jam ne venis* (ĉi tiu signifo ekzistas sole en la preterito kaj futuro; 5) NE JAM estas uzata en la senco de ANKORAŬ NE, sed tia uzo ne estas rekomendinda: *Li ne jam faris tion = Li ankoraŭ ne faris tion*; 6) antaŭ temp- aŭ lok-adjekto JAM signifas NE PLI MALFRUE, NE PLI MALPROKSIME: *jam en la unua klaso; jam je la tria horo; jam morgaŭ; mi loĝas jam je la dua etaĝo, dum li nur je la sepa; jam en la unua vilaĝo.*

d) JEN signifas proksimume RIGARDU!: *Jen kion mi proponas! Jen kial li venis. Jen kiel mi faros la taskon. Jen kia li estas. Jen prenu. Jen tiu sinjoro vin serĉis.* - Ofte estas uzataj derivaĵoj de la adverbo: *Mi donos al vi jenan konsilon: . . . Tiam li respondis al mi jene: . . . Faru jenon: . . .*

e) ĴUS signifas ANTAŬ MOMENTO: *Li ĵus foriris. Li foriris ĵus, kiam mi alvenis* (momenton antaŭ mia alveno). *Li foriros ĵus, kiam mi alvenos. Li alvenis ĵus, kiam mi foriris* (li alvenis momenton antaŭ mia foriro). *Li alvenis, kiam mi ĵus foriris* (li alvenis momenton post mia foriro). - Ne eblas la prezenco. Se temas pri la samtempeco, necesas ĜUSTE: *Li ĝuste foriras* (ne: *Li ĵus foriras*). *Li foriris ĝuste, kiam mi alvenis* (mi estis alvenanta kaj li foriranta). - Aliaj aplikoj: *ĵus diritaj vortoj; ĵusnaskito; lia ĵusa forveturo surprizis min.*

f) NUR signifas 1) ke io estas unika, izola: *Nur du homoj venis* (neniu plu). *Nur mi promenis tie* (neniu alia). *Mi nur promenis tie* (farante nenion alian). *Mi promenis nur tie* (nenie aliloke). *Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Li forveturis malsaĝa kaj revenis nur pli aĝa.* (NUR ĉiam staras antaŭ la vorto, al kiu ĝi apartenas). 2) ke io estas malrespektinda, ne grava: *Li estas nur stulta knabo! Ĝi estas nur imitaĵo. Tio estas nur ŝerco. Li estas nur dekjara. Li estas nur simpla homo.* - Kelkfoje eblas ambaŭ klarigoj samtempe: *La domo estas nur el ligno* (1. neniu alia materialo estis uzita; 2. ĝi ne estas bona domo, ĉar ĝi ne estas el brikoj, sed nur el ligno). La unuan signifon eblas precizigi per SOLE: *La domo estas sole el ligno*; 3) antaŭ temp- kaj lok-adjektoj NUR signifas NE PLI BALDAŬ, NE PLI PROKSIME: *Mi revenos nur je la oka horo. Laŭdu tagon nur vespere. Ni priparolos la aferon nur hejme. La lifto ne funkcias kaj mi loĝas nur je la oka etaĝo!* Denove eblas precizigo per SOLE: *Mi venos sole dimanĉe* (ne alian tagon). *Mi venos nur dimanĉe* (ne pli baldaŭ). - Derivaĵoj: *Tie estas nuraj esperantistoj* (eĉ ne unu neesperantisto). *Li faris tion pro nura kaprico. Tie estas nura eraro. Tie kolektiĝas nuraj friponoj. La nura bleko de leono timigis ĉiujn bestojn. Lia ununura infano.*

g) PLEJ signifas 1) antaŭ adjektivo aŭ adverbo la superlativon: *la plej bela, plej rapide; plej multe*; 2) memstare anstataŭ PLEJ MULTE: *Mi plej amas Peĉjon. Mi pleje amas Peĉjon* (emfazita formo). - Uzata estas ankaŭ la malo: *Mi malplej(e) amas Joĉjon. La malplej bela*

knabino. - Derivaĵoj: *la pleja denso, la malpleja denso*.

h) PLI estas uzata 1) por la komparativo: *Ŝi estas pli bela ol mi. Li rapidas pli haste ol mi. Ni estas malpli lertaj ol ili. Ili komprenis tion malpli bone ol vi*; 2) memstare anstataŭ PLI MULTE: *Vi estimus lin pli, se vi konus lin pli. Vi timus malpli, se vi sciis pli*. 3) PLI . . . OL ĉe unu subjekto signifas "pli precize dirite": *Li estas pli malgranda ol granda* (Pli precize dirite li estas malgranda, ne granda). - Derivaĵoj: *unu plia murdo, unu murdo plie. Plie, li dirus, ke . . .* (= Krome, li dirus, ke . . .)

i) PLU signifas 1) daŭrigon: *Iru plu, ŝi legis plu, li iris kelkajn paŝojn plu*. 2) NE PLU signifas ĉesigon de daŭra ago aŭ stato: *Mi ne legas plu la libron. Li ne vivas plu*. La uzo de JAM NE en tiu senco estas emfaza: *Li jam ne vivas = Li jam ne vivas plu. Mi jam ne legas la libron. = Mi jam ne legas la libron plu*. Plej ofte ne estas kialo por tia emfazo, tial JAM NE estas sentata kiel superflua, kiel ĉeĥismo. Oni simple preferas la uzon de NE PLU. Alia afero estas, se la atendata okazantaĵo ankoraŭ ne okazis. Komparu: *Li jam ne venos, hodiaŭ. Li ne plu venos, neniam*. - Derivaĵoj: *Iru plue* (= Iru plu, sed pli emfaze), *iru pluen* (ankoraŭ pli emfazita formo, sed nelogika, ĉar PLU ne estas loko, al kiu oni povus direktiĝi). *Plua parolo* (daŭrigita). - Komparu: *Parolu plu* (daŭrigu). *Parolu ankoraŭ* (aldonu ion). *La afero plu klariĝos* (la klarigado estos daŭrigita). *La afero pli klariĝos* (la afero estos pli klara).

j) NE havas du funkciojn - 1) nege respondas tutan demandon: *Ĉu vi venos? Ne!* 2) negas kiel nereala la vorton, antaŭ kiu ĝi staras: *Ne mi vidis la patron. Mi ne vidis la patron. Mi vidis ne la patron. Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni. Li devas ne fari tion* (ĉikaze oni preferas nelogikaĵon: *Li ne devas fari tion*). - En la Esperanta frazo povas esti nur unu negacio: *Mi neniam ion diros al iu = Mi ne diros iam al iu ion = Al neniu mi iam diros ion = Mi nenion iam diros al iu*. - Per du negacioj la frazo refariĝas pozitiva: *Li ne povas ne fari tion = Li devas fari tion*. - Alia negacio povas esti esprimata per MAL- aŭ SEN-. *Li petis ne sen timo. Ĝi ne kostis malmulte*. - Sole en la kunordita rilato du negacioj ne detruas unu la alian: *Neniam kaj nenie mi vidis ion similan*. - Necesas atenti, ĉu NE negas nur vorton aŭ la tutan frazon: *Tiu libro estas certe malbona. Ne legu ĝin./Ne, legu ĝin*. - Pli bone estas: *Ne, trankvoile legu ĝin*.

k) TRE povas esti anstataŭigita per EGE aŭ TERURE: *Li estas tre alta. Ŝi estas ege stulta. Tio terure doloras*.

5.7.4. Derivataj adverboj.

a) La adverbojn oni povas derivi per la finaĵo -e preskaŭ el ĉiuj vortspecoj: substantivoj (*matene, nokte, dimanĉe, home, patre, patrine*), adjektivoj (*dekstre, bone, facile*), numeraloj (*due, duoble, duone, duope*), verboj (*parole, skribe, skribante, sekve, salte*), adverboj (*tiele, fore, plie*), prepozicioj (*antaŭe, apude, kune, poste, sube*) kaj interjekcioj (*fie, vee*). Kelkaj adverboj estas laŭ origino primitivaj, tamen Zamenhof donis al ili pro praktikaj motivoj finaĵon, do laŭ formo ili apartenas al la derivataj (*ofte, parkere, supre, nepre, spite*),

b) La adverboj estas kreeblaj ankaŭ el vortgrupoj: *en bona stato - bonstate; ĉiun semajnon - ĉiusemajne; tra la fenestro - trafenestre*.

- c) Kun prepozicio formas adverbo prepoziciaĵon: *manke de = sen; spite al malgraŭ*.
- d) La lok-adverboj ricevas la akuzativan finaĵon -n por montri direkton: *sidi hejme - iri hejmen; esti antaŭe - celi antaŭen*.
- e) DOMAĜE, KE. . . kaj BEDAŬRINDE havas tre proksimajn signifojn: *Domaĝe, ke mi ne povas iri kun vi - Bedaŭrinde mi ne povas iri kun vi*.
- f) PROPRE signifas "pli bone dirite": *Pri tio propre mi ne bezonas paroli. Kio propre levis la homon super aliajn animalojn?*
- g) SPITE bezonas prepozicion aŭ la akuzativon: *spite de tio, spite al tio, spite tion*. - Simile KONCERNE: *koncerne tion*.
- h) FOJE estas uzebla kun la bazaj kaj ordaj numeraloj: *du fojojn = = dufoje; la trian fojon = triafoje*. - *Mi estis tie jam tri fojojn kaj nun mi venis la kvaran fojon = Mi estis tie jam trifoje kaj nun mi venis kvarfoje*. - *Kelkfoje, plurfoje, multfoje*.
- i) La adverbojn oni komparacias same kiel la adjektivojn, sed sen la artikolo en la superlativo: *rapide, pli rapide, plej rapide, malpli rapide, malplej rapide, rapidege, tre rapide, terure rapide, kiel eble plej rapide ktp*.

5.8. Prepozicio.

5.8.1. La prepozicioj en Esperanto finiĝas aŭ per -aŭ (*antaŭ, anstataŭ, laŭ, malgraŭ*) aŭ per konsonanto (*por, en, ekster*) aŭ per vokalo (*da, de, je*).

5.8.2. La prepozicioj povas kuniĝi kun prefikso (*malantaŭ, ekde*), kun alia prepozicio (*el sub, de sur, el inter*) aŭ formi prepoziciaĵon kun adverbo (*dekstre de, depende de, fronte al, renkonte al, kompare kun, kune kun*).

5.8.3. La prepozicioj povas stari antaŭ adverbo (*por ĉiam, de eterne, ĝis ĉi tie*), antaŭ pronomo (*anstataŭ vi, laŭ mi, sen tio*) aŭ antaŭ substantivo (*al la patro, en libro*).

5.8.4. La prepozicion ĉiam sekvas la nominativo. La akuzativa finaĵo post prepozicio aperas ne pro la akuzativo mem, sed pro la direkto (*sur la tablo - sur la tablon, antaŭ mi - antaŭ min*). La regulo ne validas por AL kaj ĜIS, kiuj ĉiam indikas la direkton (*al la urbo, ĝis la domo*).

5.8.5. Esperanto havas jenajn prepoziciojn: *al, anstataŭ, cis, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, dum, ekster, el, en, far, ĝis, inter, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, per, po, por, post, preter, pri, pro, sen, sub, super, tra, trans*.

5.8.6. Multaj prepozicioj estas uzeblaj kiel prefiksoj: *eniri, eliri, kuniri, preteriri ktp*.

5.8.7. El la prepozicioj estas deriveblaj novaj vortoj: *antaŭo, antaŭa, antaŭe, antaŭen, antaŭulo, posta, poste, posteulo, postaĵo, anstataŭi, anstataŭigi*.

5.8.8. AL havas du funkciojn: a) direkton (*iri al Prago*); b) gramatikan rilaton post verbo (*diri al la patro*), substantivo (*sopiro al la patrio*), adjektivo (*ĝentila al damoj*) kaj adverbo

(*dank' al tio, spite al tio*). - Derivaĵoj: *aligi rideton al sia gesto, aliĝi al la kurso*.

5.8.9. ANSTATAŬ - a) povas stari ankaŭ antaŭ infinitivo kiel subjunkcio: *anstataŭ manĝi, gimnastiku*; b) post ANSTATAŬ konserviĝas la deklinaciaj kazoj: *Mi diris tion al la patro anstataŭ al la patrino. Mi batis lin per la mano anstataŭ per vipo*. - Komparu: *La patrino batis la filon anstataŭ la patron*. - *La patrino batis la filon anstataŭ la patro*. (En la unua frazo la patro meritis ricevi la batadon, en la dua frazo estis lia devo doni la batadon). - Se la senco ne estas konfuzebla, oni preferas ne uzi la akuzativon post ANSTATAŬ: *Mi aĉetis bulkojn anstataŭ pano* (= anstataŭ panon). - Se la akuzativo montras direkton, ĝi devas resti: *Mi iras kinejon anstataŭ teatron*. - Derivaĵoj: *anstataŭa ŝlosilo, ni anstataŭigis balailon per polvosuĉilo kaj nun la polvosuĉilo anstataŭas la balailon, kuiristo uzis pomojn kiel anstataŭon por piroj*.

5.8.10. ANTAŬ - a) estas uzata loke kaj tempe: *antaŭ la domo, antaŭ la tria horo, antaŭ du horoj*; b) ĝi povas montri preferon: *Mi ŝatas lin antaŭ vi. Avantaĝo de aŭto antaŭ biciklo*. - c) la direkto estas foje montrenda, foje ne: *Mi iras antaŭ la domon* (kien?). *Mi promenas antaŭ la domo* (kie?). *Oni metis la teleron antaŭ mi* (kie?) aŭ *antaŭ min* (kien?) - d) ANTAŬ OL formas subjunkcion: *Mi venos antaŭ ol vi foriros. Antaŭ ol foriri mi salutos vin = Antaŭ la foriro mi salutos vin*. - e) MALANTAŬ estas uzata sole loke: *malantaŭ la domo, malantaŭ la domon*. - Derivaĵoj: *antaŭa, antaŭe, antaŭen, via horloĝo antaŭas, li antaŭiĝis je tuta horo, niaj antaŭuloj, antaŭo kaj malantaŭo de domo, veturi dorsantaŭe (sidi kontraŭ la direkto), la policisto kurantaŭiĝis el la pelanta amaso*.

5.8.11. APUD signifas "proksime sen tuŝo": *Mi staras apud la patro. Mi sidas apud la tablo. Ni konstruis nian domon apud la via. Vilaĝo apud Prago. Li havis glavon ĉe la femuro kaj lanĉon terpikita apud si*. - Derivaĵoj: *apuda domo, la apude pendanta penetraĵo, apudesti al interparolo*.

5.8.12. CIS signifas "sur ĉi tiu flanko" (la malo estas TRANS): *La bieno sterniĝis cis la rivero ĝis la ŝoseo. Restu cis tiu linio! Cisalpa, cisdanuba*.

5.8.13. ĈIRKAŬ - a) sen la akuzativo ĝi signifas "en la ĉirkaŭaĵo": *La ĝardeno situas ĉirkaŭ la domo. Ili kuris ĉirkaŭ la domo*. - b) kun la akuzativo ĝi signifas "al la ĉirkaŭaĵo de": *Ili alkuris ĉirkaŭ la domon* (= al la ĉirkaŭaĵo de la domo). *Ŝi ĵetis la manojn ĉirkaŭ lian kolon. Ŝi metis la jupon ĉirkaŭ siajn koksojn*. - c) antaŭ temp-adjekto aŭ numeralo ĝi signifas "proksimume": *ĉirkaŭ la vespero, ĉirkaŭ la tempo de tagmanĝo, ĉirkaŭ la mezo de nia jarcento, ĉirkaŭ dudek homoj*; - Post la prepozicioj ne devas esti la vera (nedirekta) akuzativo, sed ĈIRKAŬ rilatas al la numeralo, ne al la substantivo (*donu kronojn ĉirkaŭ dek*), tial eblas uzi aŭ ne uzi la akuzativon laŭ persona gusto: *La ĉemizo kostis ĉirkaŭ ducent kronoj(n). Donu al mi ĉirkaŭ du kilogramoj(n) da terpomoj. Ili mortigis ĉirkaŭ dek mil viroj(n)*. - Sed: *Oni donis al mi pomojn ĉirkaŭ cent pecoj* (ne pecojn!). - Derivaĵoj: *ĉirkaŭa arbaro, lupoj ĉirkaŭis cervon, ĉirkaŭaĵo de la urbo, ĉirkaŭigi la kolon per punktoj*.

5.8.14. ĈE signifas a) tre proksime en la spaco: *sidi ĉe la tablo, ĉe la komenco de la vojo, kapti iun ĉe la brako, restu tajloro ĉe sia laboro*. - b) parolante pri la homoj, ĈE signifas "sur la korpo, en la korpo, sub ies instruo, en ies domo, en iu ŝtato, en ies verko, en institucio": *Ĉe iu elfalis haroj. Seriozeco anstataŭis ĉe ŝi gajecon. Mi lernis ĉe tajloro. Mi loĝas ĉe mia frato. Ĉe*

Cervantes oni trovas erarojn. Profesoro ĉe la universitato. Ĉe ni estas belaj montaroj. - c) la samtempecon de ago kaj cirkonstanco: *Li malfermis ĉe mia alveno. Li ne kuraĝis paroli ĉe la alesto de la majstro.* - d) "hejme": *Mi estas ĉe mi. Mi iras ĉe min.* - e) ke oni ion kunportas: *Ĉu vi havas ĉe vi alumetojn? Mi ne havas ĉe mi kombilon.* - Derivaĵoj: *ĉeesti, ĉemane, ĉebrusto* (= mamoj).

5.8.15. DA esprimas nombron de nedifinitaj objektoj aŭ kvanton de nedifinita materialo. Parolante pri difinitaj (per la artikolo aŭ pronomo) objektoj aŭ materioj oni uzas DE: *glaso de la vino, glaso de tiu vino, glaso de mia vino, glaso de ĉiu vino* ktp. En ĉi tiuj kazoj estas klare, ke la glaso estas plena de tiu difinita vino. Sed se oni diras nur "*glaso de vino*", tiam ĝi signifas "*glaso por vino, vina glaso, vinglaso*". Por montri, ke temas pri glaso plena de ia nedifinita vino, oni uzas la prepozicion DA: *glaso da vino*. Simile: *barelo de biero* (= bierbarelo, plena aŭ malplena) - *barelo da biero* (barelo plena de biero, ĝi eĉ ne bezonas esti vera bierbarelo) - *barelo de la biero* (= barelo plena de la jam priparolita biero); *grupo da homoj* (Kiom da homoj? Grupo, ne taĉmento) - *grupo de homoj* (Kia grupo? De homoj, ne de bestoj) - *grupo de la homoj* (Kia grupo? Konsistanta el la jam priparolitaj homoj. Kiom da jam priparolitaj homoj? Grupo.) Oni ne uzu DA post frakcioj (*duono de pano*), nek se la mezuraĵo estas difinita per la artikolo (*peco de la pano*) aŭ per pronomo (*peco de tiu pano, peco de lia pano, peco de ĉiu pano*), nek se ĝi mem estas preciza mezuro (*parto de jaro* - la jaro estas preciza mezurunuo; *grupo de kvin homoj*; - sed: *kelke da jaroj* - jam nepreciza). - Se la substantivo estas precizigita per adjektivo, oni uzas plej ofte DE, ĉar temas pri kvalito: *pecoj de riĉa ŝtofo* (kiaj pecoj?); *grupo de bonaj homoj* (kia grupo?). Nur se oni akcentas la mezuron, estas DA: *tutaj pecoj da riĉa ŝtofo* (kiom da riĉa ŝtofo? tutaj pecoj!); *tutaj grupoj da bonaj homoj* (kiom da bonaj homoj?). Akra diferenco inter DE kaj DA estas ĉe ujoj (glaso, barelo, botelo, skatolo, kesto ktp.), ĉar temas pri ilia pleneco aŭ malpleneco, malpli granda diferenco estas ĉe tiuj mezuroj, kiuj formiĝas nur per la kunmeto de la objektoj mem (bukedo, grupo, aro, grego ktp.), ĉar ili neniam povas esti "malplenaj". - DE insistas pri la kvalito (*bukedo de rozoj* - kia bukedo?), DA insistas pri la kvanto (*bukedo da rozoj* - kiom da rozoj?).

5.8.16. DE montras - a) apartenecon: *frato de Petro, ĉapelo de la patrino.* - b) kvanton de difinita materio aŭ nombron de difinitaj objektoj: *glaso de la lakto, bukedo de tiuj rozoj.* - c) aganton post pasiva participo: *salutita de la soldato per la mano; tero kovrita de neĝo* (la neĝo falis mem, do ĝi estas aganto). - d) direkton kontraŭan al AL: *mi iras de la urbo al la vilaĝo; mi venis de la hejmo; li revenis de la milito.* - e) komencon tempan aŭ lokan: *mi loĝis tie de 1950 ĝis 1961; la bieno sterniĝis de la ŝoseo ĝis la arbaro.* - f) gramatikan rilaton post adjektivoj kaj adverboj: *plena de akvo; for de la mondo.* - g) ofte ĝi kombiniĝas kun aliaj vortoj por esti pli preciza: *ekde la milito, de post la milito, de antaŭ la milito; nutrado de infanoj fare de ilia patrino; la ĉapo falis de sur lia kapo, li estis kantisto detempe de sia infanaĝo.* - h) DE estas ofte anstataŭigebla per alia prepozicio: *la kongreso de (en) Vieno, la fruktoj de (el) la ĝardeno, plena de (je) akvo, riĉa de (je) herbo.*

5.8.17. DUM signifas "en la daŭro de...": *Dum la parolado li dormis. Fleksu arbon dum ĝia*

juneco. Dum la regado de reĝo Petro. - DUM estas uzata ankaŭ kiel subjunkcio: Vi iros, dum mi restos. - Derivaĵoj: mi kuiras, dume vi ordigu la ĉambron; lingvo artefarita estas regula, dume en lingvoj naciaj regas ĥaoso; kuirado kun duma ordigado.

5.8.18. EKSTER signifas - a) malinterne: *Mi staras ekster la domo. Barakti kiel fiŝo ekster la akvo. Tio estas ekster ĉia dubo. - b) kiel sinonimo de KROM: Ekster tio, el la diritaj vortoj rezultas, ke . . . Ekster tiaj okazoj li vivas sola. - Derivaĵoj: la ekstera korto de domo; min ne tuŝas la afero, mi staras ekstere; elirigi iun eksteren; ĉe tro ĝentila ekstero mankas sincero; persono kun impona eksteraĵo; esti seneksteraĵa (sen impona eksteraĵo); eksterejo ĉe filmado; eksterigi iun el la domo; eksterigi siajn sentojn; eksteriĝi el veturilo; lernantoj-eksteruloj loĝas ekster la lernejo.*

5.8.19. EL: *Forpeli iun el la domo. Rakonto el la Biblio. Monumento el la antikva tempo. Monumento el ŝtono. Vizitanto el Parizo. Skatolo el papero. - Derivaĵoj: ĵeti ion elen, eligi fajreron el ŝtalo, varmo eliĝas.*

5.8.20. EN: *en la domo - en la domon; tio estis en lundo; en la venonta jaro; en januaro; legi libron en kvar tagoj; dek horojn en la nokto li laboris; li kuris malsupren en kelkaj saltoj; fendi ŝtipon en du partojn. - Derivaĵoj: ena parto de domo, sendi ion ĉi-ene, eniĝi en neĝon, enigi manon en poŝon.*

5.8.21. FAR evoluis el FARE DE, kiu estas pli preciza ol la simpla DE. Ĝi montras la aganton: *libro fare de Petro = libro far Petro (Petro estas la aŭtoro); libro de Petro (Petro povas esti aŭ la aŭtoro aŭ nur posedanto de la ekzemplero); trenado de ĉevalo (= 1. la ĉevalo trenas; 2. la ĉevalo estas trenata); trenado far ĉevalo (la ĉevalo trenas).* En 1986 la Akademio rifuzis aprobi ĉi tiun prepozicion.

5.8.22. ĜIS montras atingitan punkton en spaco aŭ tempo: *mi akompanis ŝin ĝis ŝia domo; li laboris ĝis la nokto; mi restos ĝis morgaŭ; vi povas tie aĉeti ĉion de bulko ĝis mantelo; ĝis revido! = ĝis! ĝis la revido! (se la renkontiĝo estas interkonsentita); ĝisi iun = diri al iu ĝis revido; tiel longe oni portas kruĉon, ĝis fine ĝi rompiĝas (subjunkcia funkcio); li povis havi tridek ĝis kvardek jarojn (ĜIS rilatas al la numeraloj, ne al la substantivo, tial la akuzativo konserviĝas).*

5.8.23. INTER montras mezan punkton: *esti inter martelo kaj amboso, inter la dua kaj tria horoj; semi malpacon inter fratoj; la pilko flugis tra inter liaj kruroj; li devis elekti el inter la geknaboj; salti inter kverelantajn knabojn. - Derivaĵoj: la interaj tavoloj, intere de la fratinoj kreskis la fileto, interaĵo de du pantranĉaĵoj.*

5.8.24. JE montras - a) tempon: *je la tria horo kaj dudek minutoj; - b) teni ion: mi prenos vin je la mano; konduki iun je la nazo; la ŝiprompiĝulo tenas sin je tabulo; - c) komparatan mezuron: mi estas je kapo pli alta ol vi; vi estas je du jaroj pli juna ol mia patro; ŝi retiriĝis je kelke da paŝoj; li restis je granda distanco malantaŭe; - d) gramatikan rilaton: riĉa je herbo, lama je unu kruro; kredi je Dio; sufero de iu je io; disŝiri ion je pecetoj; malsaniĝi je lepro; veti je 100 kronoj; aĉeti je krono; atendi je la patro (aŭ la patron).*

5.8.25. KONTRAŬ signifas - a) sur alia flanko: *Lia domo staras kontraŭ la mia. - b) inversan direkton: naĝi kontraŭ la fluo; li iras kontraŭ nian domon; frapi sin kontraŭ muron. - c) malamikan konduton: batali kontraŭ iu; iri kontraŭ iun; boji kontraŭ iu; agi kontraŭ sia*

konscienco; kuracilo kontraŭ angino; koleri kontraŭ iu; - d) ŝanĝon de varoj: ŝanĝi ĉevalon kontraŭ du kaproj; - e) preferon: mi preferas teon kontraŭ kafo. - Derivaĵoj: kontraŭa direkto, rekte kontraŭe troviĝas ĝardeno, aĝi kontraŭe al ĉia konveneco, najbaro de kontraŭe, kontraŭi al ies proponoj, rekta kontraŭaĵo de nia ideo, profunda kontraŭeco inter du sistemoj, ne kontraŭiĝu al nia feliĉo, ataki sian kontraŭulon.

5.8.26. KROM signifas - a) ekskluzivecon: *Krom mi estis tie neniu (= estis tie mi kaj neniu alia). Krom mi estis tie ĉiuj (= estis tie ĉiuj, sed mi ne).* - b) KROM.. . ANKAŬ signifas "ne nur . . ., sed ankaŭ": *Krom mi estis tie ankaŭ miaj gepatroj (ne nur mi estis tie, sed ankaŭ miaj gepatroj). Krom mia fratino diris tion ankaŭ ĉiuj ceteraj infanoj.* - c) KROM TIO = KROME signifas "ekster tio, plie": *Krom tio (krome, ekster tio, plie) ŝi estis bela.* - Derivaĵoj: *kroma ŝlosilo, krome ŝi havis ĉarman vizaĝon.*

5.8.27. KUN signifas - a) komune, en akordo: *iru kun mi; batalu kun mi kontraŭ ili;* - b) havanta: *libro kun bildoj (= libro havanta bildojn).* c) cirkonstancon: *aĝi kun kolero, persekuti kun glavo, foriri kun longa nazo.* - Derivaĵoj: *foriri kune, kunaĵo da floroj, kunigi amikojn, kuniĝo de talentoj, surkunige veldita tubo, bonaj kunuloj, ĉi-kune vi trovos ĉekon, nekunigeblaj postuloj, la geamantoj sekskuniĝis.*

5.8.28. LAŬ signifas a) malkontraŭ: *laŭ mia opinio, sed kontraŭ via volo; karesi katon laŭ kaj kontraŭ la haroj; naĝi laŭ kaj kontraŭ la fluo.* - b) laŭlonge, en akordo: *laŭ la rivero li venis al la urbo; danci laŭ ies fajfilo; veli laŭ vento; serĉi laŭ spuroj.* - Derivaĵoj: *laŭa al la kondiĉoj, laŭigi al la postuloj.*

5.8.29. MALGRAŬ: *Malgraŭ pluvo mi iris. Malgraŭ la malpermeso de la patro li faris tion. Estis ankoraŭ sufiĉe varmege, malgraŭ ke la suno staris jam malalte.* SPITE AL estas pli forta, ĝi montras intencan malobeon: *Spite al la malpermeso de la patro li faris tion.* Derivaĵoj: *malgraŭvola edziĝo.*

5.8.30. PER montras instrumenton, kio povas esti ankaŭ homo: *skribi per plumo; saluti per la mano; vidi per la okuloj; teni infanon per la mano je la kolumo; sendi leteron per servisto; faru tion per vi mem; eksvarmos la riveroj per ranoj; vivi per mizera vivo (aŭ mizeran vivon); mi vin petas per la rajtoj de nia amikeco; planko kovrita per tapiŝo (iu jam metis la tapiŝon) - planko kovrata per tapiŝo (iu ĝuste nun metas la tapiŝon) - planko kovrata de tapiŝo (la tapiŝo jam kuŝas kaj kovras la plankon); tero kovrita de neĝo (la neĝo falis mem) - tero kovrita per neĝo (iu ŝovelis la neĝon sur la teron); letero skribata de amiko per inko; - PERE DE: *Li salutis lin per ĝentilaj vortoj pere de sia amiko, kiu veturis Pragon.* - PERI: *Mi peras al vi saluton de niaj amikoj el Parizo;* - PER estas uzata en matematikaj esprimoj: *ok dividite per du faras kvar; tri obligite per ses faras dek ok; formato tridek obligite per dudek centimetroj; kg/m² - kilogramo per kvadratmetro.* - Derivaĵoj: *peri al iu oficon, pacperado, peranto de gazetoj, negocperisto, senpera kaŭzo, senpere apud la lito, senpere everti la estron.**

5.8.31. PO vidu la ĉapitron Distribuo (5.5.6.)

5.8.32. POR montras - a) celon: *mi venis por helpi; mi venis por kukoj; ni diru tion por lia laŭdo; -*

b) destinitecon aŭ adaptitecon: *glaso por vino; kuracisto por virinoj*; - c) la objekton de interŝanĝo: *aĉeti tion por unu franko; pagi po dek markoj por metro; por nenio oni faras nenion*; - d) la predikativon = kiel, kvazaŭ: *mi prenis vin por iu pli merita: li prenis la danĝeron por ŝerco; mi donos al vi la landon por eterna posedaĵo*. - e) personon, por kies profito oni agas: *voĉdoni por iu; doni monon por mizeruloj*; - f) personon, kiun rilatas la ago = rilate al: *tio estas por mi indiferenta; tio estas granda perdo por mi*: - g) estontan tempodaŭron: *forvojaĝi por tri semajnoj; foriri por eterne, por ĉiam*; - POR KE montras la celon de ago en la subpropozicio: *Mi rakontis al li la historion, por ke mi veku lian intereson. Li subtenis la kruĉon, por ke la virino povu trinki*. (Rimarko: Se ne temas pri celo, sed pri rezulto de ne intencita ago, oni ne uzas la u-modon: *Multe mankas, por ke li estus sukcesinta*). - POR estas uzata ankaŭ prefikse: *poresperanta, porpaca laboro; porinfana literaturo; porĉiama amo; porvivaĵo (= vivbezonaĵo)*.

5.8.33. POST montras - a) tempon pli malfruan: *Post tri tagoj ŝi revenos; post la deka horo li aperis; saĝa hundo post vundo; iom post iom*; - b) lokon pli malproksiman = malantaŭ: *ŝi kaŝis min post la kurteno; li iris post ŝi (en konstanta distanco); li iris post ŝin (por atingi ŝin)*. - c) rangon pli altan: *en la regno li estas la unua post la reĝo*. - Uzataj estas ankaŭ kombinaĵoj kaj derivaĵoj de POST: *de post la milito li laboras kiel hejtisto; post kiam li foriris: ŝi komencis ridi; postkolero (= venĝemo); postkuri (= persekuti): la postan respondon li ne aŭdis; poste vi povos fari, kion vi volos: li sidiĝis sur sian postaĵon; postaĵo de veturilo; niaj posteuloj vivos pli feliĉe; la persekutantaj rajdistoj batfalis la postiĝantojn (malfruiĝintojn)*.

5.8.34. PRETER montras lokon, en kies proksimeco iu pasas kaj iras plu: *Li iris preter nia domo. Li pasis preter mi sen saluto. La kuglo flugis preter mia kapo*; - Derivaĵoj: *preteratenti; preterdormi; kiam li iris pretere, ŝi ekkriis*.

5.8.35. PRI signifas "koncerne al, rilate al, teme de": *mi parolis pri vi; kontenta pri sia salajro; antaŭjuĝo pri rasoj; li trompis lin pri mono; ŝi estis certa pri tio; ŝi havis nenian scion pri arto*. - Derivaĵoj: *preparoli la demandon; priskribi la pejzaĝon; prifalĉi la herbejon*.

5.8.36. PRO montras - a) la kaŭzon aŭ motivon de ago: *pro mal sano li ne venis; mi ridas pro lia naiveco; ili buĉas nur pro viando*; - b) objekton de interŝanĝo: *kion vi donos pro tio? aĉeti ion pro dek kronoj (ĉi tiu senco estas identa kun POR)* - Inter POR kaj PRO estas delikataj nuancoj. Komparu: *morti por la patrio (entuziasmo) - morti pro la patrio (rezignacie): pagi monon por io (insisto pri akiro) - pagi monon pro io (insisto pri elspezo); oni dankas por leteroj pro ĝentileco*. - Ofte la diferencoj estas pli grandaj: *pagi monpunon pro troa rapideco (estas neeble diri: pagi monpunon por troa rapideco - tio signifus, ke la policano volas, ke la punito veturu tro rapide)*. *Mi ne koleros pro tio, ke li malsaniĝis; propeka kapo; promalĉastaj donacoj; preparoli; propeti*.

5.8.37. SEN montras mankon, foreston: *sen laboro ne venas oro: la kafo estas sen sukero; mi ne povus foriri sen adiaŭi vin; sen espero senespera; senlima: sen kaŭze; senpense; senlabora*; - *li seniĝis je zorgoj; ŝi senigis min je zorgoj; ŝi senzorgigis min; senigi birdon je plumoj = senplumigi birdon; senostigi fiŝon; senhomigi insulon; senmovigi pendolon; senkulpiĝi iun, sena je zorgoj*.

5.8.38. SUB signifas - a) la malsupran pozicion kun tuŝo: *li portis libron sub la brako; la*

knabino havis kusenon sub sia kapo; li falis sub la radojn; li trafis el sub la pluvo en riveron; - b) la malsupran pozicion sen tuŝo: la vagabondo dormis sub la tegmento; sub la libera ĉielo; la muso kuris el sub la kanapo sub la liton; li kaŝis sin sub la tendo(n). - c) la eksteran ŝajnon: ŝi aperis sub la formo de maljunulino; mi vojaĝis sub la nomo Ferdinando; - d) la dependecon: ĉio estas sub via dispono; ili venis sub la tonoj de la bela muziko; - e) nomon de domoj: la gastejo sub Kaliko; la apoteko sub Ruĝa Krankro; la vendejo sub Tri Pavoj; - Derivaĵoj: Vi ne trovis la libron, ĉar ĝi estis sube de mia ĉapelo; rigardu la noton ĉi sube; la suba ŝtofo de mantelo nomiĝas subŝtofo aŭ subaĵo; la korvo nigris sur la neĝa subaĵo; la Romianoj subigis multajn landojn al sia regado; la suno komencis subiĝi; la fiŝo subiĝis sub la akvon; subpagi iun; subaĉeti iun; submetiĝi al ekzameno; superuloj kaj subuloj.

5.8.39. SUPER montras - a) pozicion de objekto rilate al alia, kiu estas lokita pli malalte kaj ne tuŝas ĝin: *la suno estas ankoraŭ super la horizonto; tenante la manojn super la okuloj, li rigardis; levu standardon super la popoloj; la fiŝoj elsaltis super la akvon; la aerŝipo flugis super la landon; - b) pozicion de io aŭ iu, kies forto, grado aŭ rango estas pli alta: tio estas super ĉiuj homaj fortoj; havi potencon super iu; havi reganton super si; - c) staton de iu, kies atento direktiĝas al ia laboro: sidi super laboro; ŝviti super la matematiko; mediti super io; labori super la muziko; - d) pozicion de io, kio krome kovras alian kovraĵon: peza tavolo da sablo kuŝis super la preĝejo; li portas puloveron super ĉemizo. - Derivaĵoj: supervesto; supera oficisto; malsupera oficiro; superi diablon, pekon; la saĝeco havas superecon antaŭ la malsaĝeco; respekti siajn superulojn; nesuperebla malfacilaĵo.*

5.8.40. TRA: *du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malluma ĉielo; li kuris tra la koridoro; la patro elĵetis paperon tra fenestro; li veturis tra la tuta lando; la avino laboris tra la tuta nokto; - Derivaĵoj: la kavaliro tranĉis la malamikon trae per unu frapo de glavo; la fadeno ne volas traigi tra la kudriltrueto; mi ne povas traigi la kudrilon tra la ledo; trarigardi la urbon; la ursoj travintras; li tradandis la tutan nokton kaj la tutan monon; la Pragaj trafenestrigoj.*

5.8.41. TRANS montras lokon malantaŭ obstaklo: *ŝi promenis trans la rivero; ili loĝas kontraŭ nia domo, trans la strato; aŭskulti trans muro; pensoj iras trans limo sen pago kaj timo; la hirundo flugis trans la riveron; li venis trans la sojlo; ĵetu la pilkon trans la muron; iru trans la ponto; mi forkuris trans marĉojn kaj kampojn, tra nudaj bariloj kaj senfoliaj arbaroj; - Derivaĵoj: transpaŝi la sojlon; la transa mondo; la tonoj sonis transe de la densa kurteno; li regis super la tuta transo de la rivero; oni transigis ilin per boato trans la lagon; baldaŭ mi transiĝos en alian loĝejon; li ne estas ĉilokulo, sed transulo; netransigebla posedaĵo; transskribi la tekston; transmaraj landoj.*

5.9. Konjunkcio.

5.9.1. En Esperanto estas jenaj konjunkcioj: **aŭ, ĉar, do, kaj, nek, sed, tamen** - *Vespere mi rigardos televidon aŭ legos libron. La knabino sciis sorĉi, ĉar ŝi estis feino. Ekstere pluvas, do mi restos hejme kaj studos. Mi ne legas nek skribas. Mi iros, sed vi devas min akompani. Vi estas fremdulo, tamen vi plaĉas al mi.*

5.9.2. En la funkcio de konjunkcioj estas uzataj ankaŭ: **tiam, tial, tiel, alie, cetere, dume,**

fine, krome, male, malgraŭe, poste, same, nome, sekve.

5.9.3. Ekzistas ankaŭ duopaj konjunkcioj: **jen . . . jen** (*Al li naskiĝis jen filo, jen filino.*); **aŭ . . . aŭ** (*Mi iros aŭ kinejon aŭ teatron*); **ĉu ... ĉu** (*Ĉu pro timo, ĉu pro fiero*); **ĉu ... aŭ** (*Ĉu pro timo aŭ pro fiero*); **nek . . . nek** (*Nek pro timo, nek pro fiero*); **kaj . . . kaj** (*Kaj pro timo kaj pro fiero*); **ne nur ... sed ankaŭ** (*Ne nur pro mono, sed ankaŭ pro amo*); **ju pli . . . des pli** (*Ju pli granda, des pli stulta*).

5.9.4. Uzado:

a) ĈU kiel konjunkcio neniam povas esti izola, sed nur ripete aŭ kun AŬ.

b) NEK povas esti uzata ripete aŭ kun alia negacio: *Mi nek manĝas nek trinkas. Mi ne manĝas nek trinkas. Mi neniam manĝas nek trinkas. Mi neniom manĝas nek trinkas.* (Sed: *La vento kvietiĝas kaj eĉ ne unu branĉeto moviĝas.*)

c) JU - DES estas uzindaj kune kaj sekvendaj de PLI aŭ MALPLI: *Ju pli granda laboro, des pli granda ĝojo. Ju pli li atentis, des malpli li komprenas.* - Se JU mankas, oni prefere uzas TIOM: *Tion ne kapablas anĝelo, tion malpli homo.* (La Plena Gramatiko malrekomendas uzi JU . . . TIOM aŭ izolan DES.)

5.10. Subjunkcio.

5.10.1. En Esperanto estas jenaj subjunkcioj: **ĉar, dum, ĝis, ke, kvankam, kvazaŭ, se.** - *Li iris al kuracisto, ĉar li ne sentis sin bone. Li dormis, dum ŝi laboris. Ŝi maldormis, ĝis li venis. Ŝi diris, ke li venu. Li venis, kvankam pluvigis. Li iris, kvazaŭ li lamus. Mi venos, se mi povos. Mi venos, se mi povos. Mi venintus, se mi povintus.*

5.10.2. En la funkcio de subjunkcio estas uzataj: **kiu, kio, kia, kies, ĉu, kiel, kie, kien, kiom, kiam, antaŭ ol, post ol** (= post kiam).

5.10.3. Kelkaj subjunkcioj estas kombineblaj kun prepozicioj: **malgraŭ ke; por ke; krom tio, ke; kun kiu; de kiu; pro kio; de kiam** ktp.

5.10.4. DUM kaj ĜIS estas uzeblaj kaj kiel prepozicioj kaj kiel subjunkcioj: *dum la dormo de Petro - dum Petro dormis; ĝis la alveno de Maria - ĝis Maria venis.*

5.10.5. ĈAR servas jen kiel konjunkcio (se ĝia propozicio estas klarigo por la alia propozicio), jen kiel subjunkcio (se la subpropozicio estas la motivo aŭ la kaŭzo por la ĉefpropozicio): *Li estas mia kuzo, ĉar lia patrino estas mia onklino* (klarigo - konjunkcio). *Ĉar vi bone laboris, mi rekomencos vin* (kaŭzo - subjunkcio).

5.10.6. Ankaŭ ĈU servas foje kiel demanda adverbo (*ĉu mi restu aŭ foriru?*), foje kiel konjunkcio (*ĉu pro timo, ĉu pro fiero, li restis*), foje kiel subjunkcio (*mi ne scias, ĉu li restis*), foje kiel subjunkcio kaj konjunkcio samtempe (*mi ne scias, ĉu pro timo, ĉu pro fiero li restis*).

5.11. Interjekcio.

5.11.1. Nur el malmultaj interjekcioj estas deriveblaj novaj vortoj: *fi, fia, fiulo, fihomo, fiaĝo;*

ve, vei; aĥ, aĥi; miaŭ, miaŭi.

5.11.2. El multaj verbaj vortradikoj estiĝas interjekcioj: *krak! frap! help! halt! ek! paŝ-paŝ, pep-pep.*

5.11.3. Kelkajn interjekciojn oni kreas per kurtigo de verbo: *rap! rap! rapidu! - plaŭ! ŝi ensaltis en la akvon (plaŭdi) - "Mur! mur!" murmuris la urso.*

5.11.4. La alvokaj interjekcioj: *he! kion vi havas en la sako! - he ho! he ho! jen mi venas! - hola! - ho he! - ho vi ho! - uhu! - hu ho hu! - ho hoj! de la boato! - "Ts! ts! Knabeto!" li vokis - halo! (en telefonon).*

5.11.5. La forpelaj interjekcioj: *for! - hot! hoto! (peli aŭ forpeli bruton) - huŝ! tju! (fortimigi hundon aŭ birdon).*

5.11.6. La instigaj interjekcioj: *boj-boj! lu-lu! (por dormigi infanon) - bis! (por aprobi aktoron aŭ kantiston) - ek! - ĉit! ŝŝ! ts! (por silentigi) - hej! - help! - hop! - ho ruk! (por subita fortostreĉo) - halt! (por haltigi homon) - stop! (por haltigi maŝinon).*

5.11.7. La sentesprimaj interjekcioj: *ha! (ekmiro) - haha! - aj! - ba! (nekredemo) - be! (konfuziteco) - bas! (mallaŭdo) - brr! (frostiĝo) - ej! (dubo) - fi! - uf! fu! (laciĝo) - hm! - hu! - huj! aŭ! oj! ve! (sufero) - hura! - pum! bum! - pa! pa! dirlididi! (senzorgeco) - tpr! (por instigi ĉevalon).*

5.11.8. Onomatopoej = interjekcioj imitantaj sonojn: *glu-glu-glu (meleagro aŭ akvo fluanta el botelo) - kluk-kluk (kokino) - kokeriko (virkoko) - kva-kva (rano) - kŭaks-kŭaks-brekekeks (bufo) - kurre-kurre (kolombo) - kviivit-kviivit (pasero) - pep-pep (kanario) - pip-pip (muso, anasido) - put-put-put (serĉanta kokino) - bum- -bum (tamburo) - pif-paf (pafo) - tik-tik-tik (horloĝo) - tratte- ratra (trumpeto).*



SINTAKSO

La sintakso studas la manieron, laŭ kiu la vortoj estas grupigataj en la frazo. La frazo povas esti aŭ simpla (*Paĉjo venis*), kiu konsistas el unu propozicio, aŭ kompleksa (*Paĉjo venis, kiam ni manĝis*), kiu konsistas el du aŭ pluraj propozicioj. Ĉiu propozicio havas partojn nomatajn frazelementoj, kiuj povas esti strukturaj (subjekto, predikato, objekto, adjekto) aŭ karakterizaj (epiteto, suplemento). La grupiĝon de la karakterizaj frazelementoj (*tre bela, bela knabino, knabino el Parizo*) studas la vortsintakso, la rilatojn inter la strukturaj frazelementoj (*Knabino skribas leteron*) esploras la propozicio-sintakso, kaj pri la principoj de kunmetado de propozicioj en kompleksajn frazojn (*Paĉjo venis hejmen kaj alportis libron, kiun la infanoj tiom deziris, ĉar ankaŭ aliaj iliaj geamikoj havis ĝin*) instruas la fraz-sintakso.

6.2. Vortsintakso.

La karakterizaj frazelementoj, nomataj ankaŭ akcesoraj komplementoj, estas principe du: epiteto kaj suplemento. La epiteto senpere karakterizas substantivon, adjektivon aŭ adverbos esprimante ties kvaliton, nomon aŭ intensogradon (*blanka domo, tre utila, sinjoro Novák, terure malfacile*), dum la suplemento esprimas rilaton aŭ cirkonstancon (*la domo de la patro, ordono ataki, preta je ĉio, inklina akcepti, nekapabla labori*). Ilia hibrido estas la suplement-epiteto, fakte suplemento transformita en epiteton (*vendejo sur la strato - surstrata vendejo; kapablo ĉion esprimi - ĉioesprima kapablo; batite per bastono - bastone batite*).

6.2.1. Epiteto.

Se la kerno-vorto (determinato) estas adjektivo aŭ adverbo, la karakterizanta epiteto havas formon de adverbo (*tre utila, iom peza, terure malfacila - tre utile, iom peze, terure malfacile*). Se la determinato estas substantivo (aŭ anstataŭanta pronomo), la karakterizanta epiteto povas havi formon adjektivan (*la blanka domo, fluganta birdo, lingvo internacia, nenio nova, io interesa*) aŭ substantivan (*mia amiko Petro; la nomo Johano; sportistoj- esperantistoj*). Meze inter ili staras la substantivfunkcia adjektivo (*ankaŭ ni, stultaj, faris tion; la knabino, la senkulpa, sciis nenion*). La substantivaj epitetoj estas: **apozicio**, **ekvivalento** kaj **nominacio**. Pri la

apozicio (apudmeto) oni parolas tiam, kiam la dua substantivo signas pli vastan klason de objektoj kaj tiamaniere montras kvaliton de la unua substantivo (*li, la mizerulo, ne povas la aferon kompreni; la poeto, la granda filo de la nacio, verkis poemon. . .*). Pri la ekvivalentoj temas tiam, kiam ambaŭ substantivoj havas signifon kun precize sama amplekso (*la makropo aŭ kanguruo povas esti dresata*). La nominacio estas substantiva epiteto, kiu prezentas nomon de la antaŭanta anoncvorto (*la urbo Parizo*).

6.2.1.1. Adjektiva epiteto. La adjektiva epiteto havas la saman formon kiel la karakterizata substantivo (*mia bona libro, miaj bonaj libroj, mian bonan libron, miajn bonajn librojn*). Kiam unu adjektiva epiteto karakterizas samtempe plurajn substantivojn, ĝi devas mem stari en pluralo (*belaj domo kaj ĝardeno*). Sed la pluralo ne estas deviga ĉe la posesivo (*mia domo kaj ĝardeno*) kaj ĉe abstraktaĵoj (*granda laboro kaj penado por Esperanto*). Kiam pluraj epitetoj karakterizas pluralan substantivon, sed ĉiu el ili rilatas aparte nur al unu objekto, ili staras en singularo (la angla kaj franca lingvoj). La participa epiteto estas anstataŭigebla per relativa epiteta subpropozicio (*la laboranta junulo = la junulo, kiu laboras*), kaj determinante akuzativan substantivon, ĝi regule staras en akuzativo, eĉ kiam ĝi mem havus akuzativan objekton (*li prenis panon havantan rondan formon*). Tamen oni devas diferencigi: *mi vidis rokon leviĝantan el la maro* (= mi vidis rokon, kiu turas super la maro - daŭra stato de la roko) - *mi vidis rokon leviĝanta el la maro* (= mi vidis rokon, ĝuste kiam ĝi elakviĝis el la maro - ago de la roko); *mi vidis mizerulon petantan almozon* (= mi vidis mizerulon, pri kiu estas konate, ke li vivtenas sin per almozpetado) - *mi vidis mizerulon almozpetanta panon* (= mi vidis mizerulon, ĝuste kiam li petis panon de iu). Sen la akuzativo ne temas pri epiteto, sed pri predikativo.

6.2.1.2. Apozicio. La apudmeto staras precipe post pronomoj kaj propraj nomoj (*kaptu lin, kanajlon! mi, kompatindulo, ne kulpis pri tio; ĉu vi konas Rembrandton, majstron de majstroj?*), sed ankaŭ post ceteraj substantivoj (*li invitis sian amikon, tiun ŝercemulon*). Ofte ĝi estas trovebla kiel resumo (*verkado de libroj kaj artikoloj, gvidado de kursoj, redaktado de gazetoj - kia granda laboro!*). La apudmeto akordiĝas kaze kaj nombre kun sia determinato (*kaptu ilin, kanajlojn!*), sed prepozicio estas ripetata sole en patosa frazo (*por li, por mia amiko, mi faros tion*), sed ne en ordinara frazo (*por Petro, mia bona amiko, mi faros tion*). La apozicio staras en pluralo, se ĝi determinas plurajn aferojn (*mi kaj li, bonaj konatoj, iris kune*), sed kutime en singularo kiel resumo (*multaj vojaĝoj - mia granda revo*). La apudmeto povas esti tiom proksima al sia determinato, ke ĝi preskaŭ kunfandiĝas kun ĝi en unu kunmetaĵon (*kuracistoj-esperantistoj*).

6.2.1.3. Ekvivalentoj. La ekvivalentojn ligas la esprimoj "nome, alinome, aŭ, tio estas" (*Samuel Clemens, alinome Mark Twain, estis granda verkisto; lia devo, t.e. lia helpo al vunditoj, estas bezonata*). Post la ekvivalenta AŬ la artikolo ne estas ripetata (*la agrokulturo aŭ terkulturado bone prosperas*), sed post la alterna AŬ la artikolo ripetiĝas (*ĉu vi rompis la vazon aŭ la teleron?*). Post dupunkto aperas resuma ekvivalento, kiu ne resumigas elnombradon kiel la resuma apudmeto, sed ĝi resumigas difinon (*la plej nobla sento de la homo: la amo*). La ekvivalentoj ĉiam akordiĝas kaze inter si (*li faris tion por homo la plej kara, nome por sia*

patrino), eĉ ĉe la elnombrado (*mi amas ĉiujn fruktojn: pomon, piron, ĉerizon, prunon ktp.*). Por eviti tiun pezigan ripetadon de la sama kazo ĉe elnombrado eblas forigi la akuzativon intermetante "ili estas" (*mi amas ĉiujn fruktojn; ili estas: pomo, piro, ĉerizo, pruno ktp.*), simple forlasi la akuzativon de direkto (*la substantiva epiteto dividiĝas en tri partojn: apozicio, ekvivalento kaj nominacio*) kaj prepozicion nur subkompreni (*ni parolis pri du amikoj, Petro kaj Paŭlo*).

6.2.1.4. Nominacio. La nominacio ekzistas en formo de nomesperimo (*lia frato Petro*), de citaĵo (*la vorto "amo"*) aŭ de vokativo (*helpu min, Petro*).

a) **Nomesprimo.** La nomesperimo povas esti senpere ligita al la anoncvorto (*lia filo Karlo*) aŭ memstariĝinta, emfazita (*lia filo, Karlo*). La memstariĝinta nomesperimo akordiĝas kaze kun la anoncvorto (*mi renkontis lian filon, Karlon*), se ne temas pri neasimilita vorto (*mi renkontis lian filon, Charles*). La senpere ligita nomesperimo povas akordiĝi kun la anoncvorto (*mi renkontis lian filon Karlon*), sed lastatempe la lingvouzo preferas neakordiĝon (*mi renkontis lian filon Karlo; pruntedonu al mi la gazeton Starto; ili enveturis en la urbon Parizo*). La neakordiĝo faras la frazon pli klara (*li aĉetis libron Libro de amo*). En duoblaj nomesperimoj aperas ambaŭ principoj samtempe (*ŝi prezentis sian edzon, sinjoron doktoron Petro Franko*). La memstariĝo kaj senpera ligiteco de la nomesperimo povas ŝanĝi signifon de la frazo (*ni estis tie jam trian tagon, lundon - la tria tago estis lundo; ni estis tie jam trian tagon lundo - ni estis tie tri sinsekvajn lundojn*).

b) **Citaĵo.** La anoncvortoj de citaĵoj estas la vortoj "nomo, titolo, vorto" k.a., sed ofte ili estas ellasataj (*li diris: Ne! - kaj forkuris*). La citaĵo estas indikita per citiloj (*alparolu lin per la titolo "moŝto"*), per dupunkto (*prefere ne uzu la vorton: azoto*), per diferenca skribo (*la pronomo ONI*), per la poseda prepozicio (*ne ĉiuj konas la nomon de Zamenhof*), per parentezo (*la difina artikolo lal estas uzata . . .*) aŭ per nenia skriba signo, nur per simpla voĉtono (*li donis al sia filo la nomon Karlo*). La citaĵo povas esti eĉ frazo (*lia aserto "ŝi estas bela" ne estas prava*).

c) **Vokativo.** La vokativo estas ĉiam apartigita per komoj disde la cetera frazo, kaj ĝi havas formon nominativan sen la difina artikolo (Komparu: *Knabetoj, helpu min! - La knabetoj helpu min. Mi amas vin, infanoj. - Mi amas la infanojn*). La emfaza interjekcio "ho" staras enfermita inter la komoj kun la vokativo (*mi savos vin, ho mia kara*), dum la emfaza pronomo "vi" staras ekstere (*Vi, Manjo, ĉu vi amas min?*)

6.2.2. Suplemento.

La suplementoj determinas substantivojn (*knabino el Parizo*), adjektivojn (*preta je ĉio*), adverbojn (*responde vian leteron*) aŭ verbojn en infinitivo (*viziti najbaron*) aŭ en participo (*havanta amikon*). Ĉe la substantivaj determinatoj necesas distingi inter ad-substantivoj esprimantaj agon (*manĝado de la kato, frapo sur la oreton*) kaj aĵ-substantivoj (*domo de la pastro, majstro de la arto*).

6.2.2.1. Suplementoj de aĵ-substantivoj. Ili povas ricevi formon de prepozitiva substantivo

(*glaso de vino*), de adjektivo (*vina glaso*) aŭ de kunmeto (*vinglaso*). La adjektivo aŭ kunmeto estas nur ekstera formo, kiu ne ŝanĝas la sintaksan valoron de la suplemento. La suplementoj indikas posedon (*la libro de Petro; amiko de Paŭlo; la piedo de seĝo; filo de amiko; la situacio en Eŭropo; prezo de pano*), originon (*muziko de Mozart; miraklo de arĥitekturo; libro el la angla lingvo; akvo el putro; vizitanto el Londono; unu el la lernantoj*), konsiston (*bukedo de floroj; skatolo el papero; salajro de du mil kronoj; spegulo en tri pecoj rompita; spegulo el tri pecoj farita; la modo de grandaj ĉapeloj*), koncernatecon (*dresisto de leonoj; pozicio de direktoro; libro pri lingvoj; glaso por vino; profesoro ĉe universitato*), priskribon (*kampo de batalo; homo de granda talento; virino kun bluaj okuloj; homo en frako; akuzativo kun infinitivo; akuzativo sen prepozicio; kuracisto malgraŭ volo*), lokon (*la arbo antaŭ la domo; la batalo apud Prago; Frankfurto sur Majno; la vojo ĝis la rivero; la trajno al Vieno; la vojo el Varsovio*), tempon (*helpo en bona momento; kamaradoj de mia infanaĝo; la dimanĉo antaŭ novjaro; tri jarojn post la milito; la tagoj ekde dimanĉo ĝis ĵaŭdo*), mezuritecon (*peco da pano; bukedo da rozoj; 600 frankoj da rento - rento de 600 frankoj; parto de jaro; la metalo konsistas el du trionoj de oro kaj unu triono de arĝento*) kaj distribuon (*trupoj po 100 soldatoj; du premioj po cent frankoj; kvin pecoj da drapo po tri metroj kontraŭ 20 kronoj por metro*). Multaj el la suplementoj estas transformeblaj en adjektivon (*profesoro ĉe universitato = universitata profesoro*), sed ne ĉiuj (*la diagnozo de malsano # la malsana diagnozo*).

6.2.2.2. Suplementoj de ad-substantivoj. Ili akceptas formon de prepozitiva substantivo (*edukado de infanoj*), de direkta akuzativo (*veturo hejmen*), de adjektivo (*pastra beno*), de infinitivo (*deziro gajni en loterio*) aŭ de propozicio (*deziro, ke li gajnu en loterio*).

a) La **prepozitiva suplemento** plej ofte uzas la prepozicion DE (*manĝado de la kato; kondamno de la juĝisto*), sed ĉi tiu esprim-maniero ne montras, ĉu temas pri la aganto (*la kato manĝas; la juĝisto kondamnis*) aŭ pri la suferanto de la ago (*la kato estas manĝata; la juĝisto estas kondamnita*). Similan efikon havas la posedaj pronomoj (*ŝia murdo - ĉu ŝi murdis aŭ estis murdita?*). La aganton pli klare montras la esprimo FARE aŭ FAR (*manĝado fare de la kato; kondamno fare de la juĝisto; murdo fare de ŝi - manĝado far la kato; kondamno far la juĝisto; murdo far ŝi*), sed indiki la suferanton de la ago estas afero multe pli problema, kaj kvankam aperis pluraj proponoj (*manĝado la katon, manĝado de la katon; manĝado far la kato k.s.*), neniuj el la proponoj ĝis nun enradikiĝis en la praktiko. Tamen multaj verboj ebligas anstataŭigi la akuzativan objekton per prepozitiva (*danki iun - danki al iu*) kaj tiam estas preferinde uzi post la ad-substantivo la koncernan prepozicion (*abono al io; abonemo pri io; aspiro je io; atako kontraŭ iu; eduko por iu; indigno pro io; konsento kun iu; frapo sur ion; venko super iu ktp.*). Sed tiuj rimedoj ne estas aplikeblaj ĉiam (*kondamno al juĝisto, sed ne manĝado al la kato, ĉar tio estus aldona manĝo por la kato*). Oni povas indiki la aganton kaj suferanton ankaŭ samtempe (*manĝado de rato fare de kato*), ofte eĉ kun instrumento (*baro de korto per branĉoj fare de la patro*).

b) La **akuzativa suplemento** estas uzata por montri direkton (*mia vojaĝo Hispanujon; dum la irado hejmen; grimpado supren*).

c) La **adjektiva suplemento** povas esti sen prefikso (*pastra beno; mara vojaĝo*) aŭ kun

prefikso (*perŝipa vojaĝo; porinfana literaturo*) aŭ formita kiel kunmeto (*bluokula knabino*). La adjektiva suplemento estas avantaĝa ĉe kombino kun ceteraj suplementoj (*risko de aeroplana fuĝo eksterlanden*).

d) La **infinitiva suplemento** formiĝas el infinitiva objekto de alia verbo (*li ordonis ataki - lia ordono ataki*); ĝi estas pli impresa ol la suplemento substantiva (*lia ordono al atako*). Ankaŭ post verbaĵoj egalvaloraj al simpla verbo (*havi bezonon = bezoni; senti la devon = devi*) estas uzata la infinitiva suplemento (*mi havas bezonon paroli kun vi; mi sentas mian devon helpi al li*). El prepozicioj povas stari antaŭ suplementa infinitivo sole POR, SEN, ANTAŬ OL, POST OL, ANSTATAŬ (*alveno por helpi, foriro sen adiaŭi, venĝo anstataŭ danki, manĝo antaŭ ol foriri*).

e) La **prepozicia suplemento** (*la decido, ke oni ne akceptu virinojn*) estas fakte epiteta propozicio, tial ĝi estos traktata en la fraz-sintakso.

6.2.2.3. Suplementoj de adjektivoj. La suplementoj de adjektivoj povas esti adverbaj (*abisme stulta*), substantivaj (*tri paŝojn distanca de mi*), infinitivaj (*kapabla muziki*) kaj propoziciaj (*trankvila, ke ĉio estas en ordo*).

a) La **adverba suplemento** venas el substantiva radiko kaj esprimas komparon (*horloĝe akurata - akurata kiel horloĝo; urse forta - forta kiel urso*), aliaj adverboj estas ne suplementoj, sed epitetoj (*brile verda; tre agrabla*).

b) La **substantiva suplemento** havas formon aŭ akuzativan (*homo du metrojn alta; parolado du horojn longa; knabo dek jarojn aĝa; vilaĝo dek kilometrojn malproksima*) aŭ prepozitivan kun la prepozicio JE (*esti malpli peza je du kilogramoj; pli alta je tuta kapo; riĉa je herbo kripla je la dekstra mano; inda je honoro; kapabla je ĉio. feliĉa je amo*), kun AL (*avida al mono; inklina al timo; inklina al homoj; parenca al Petro*), kun DE (*malproksima de la urbo; pala de timo*), kun KONTRAŬ (*imuna kontraŭ infekto*), kun KUN (*familiara kun ĉiuj; identa kun la serĉata krimulo*), kun POR (*bezona por sportisto; kara por patrino; necesa por soldato*), kun PRI (*certa pri sukceso; kontenta pri sia faro*). Post la sama adjektivo eblas uzi laŭ la signifnuanco diversajn prepoziciojn (*aĝo responda por edziniĝo; tiuj informoj ne estas respondaj al la miaj; pri tio li estas responda antaŭ Dio*).

c) La **infinitiva suplemento** estas tre malofta (*ema paroli; inklina kredi; kapabla kanti: preta respondi; feliĉa revidi siajn amikojn; kontenta ricevi kelkajn panpecojn*).

d) La **propozicia suplemento** havas formon komparan (*same granda kiel Petro; malpli granda ol Petro*) aŭ eksplikan (*feliĉa, ke ĉio bone finiĝis*).

6.2.2.4. Suplementoj de adverboj. Ili havas formon de adverbo veninta el substantiva radiko (*infane naiva - kiel infano*), de substantivo akuzativa (*responde vian leteron; danke vian helpon*) aŭ prepozitiva (*responde al via letero; bruo kaŭze de ekstaro de ĉiuj studentoj*) kaj de propozicio (*ŝi kantas pli pure ol /kantas/ ŝia fratino; same, kiel li faris tion, ankaŭ mi subskribis la peticion*).

6.2.2.5 Suplementoj de verboj. Ili estas fakte objektoj de infinitivo aŭ participo, se ili estas uzitaj en alia funkcio ol predikata (*viziti amikojn estas afero de ĝentileco; domo havanta tri*

fenestrojn; donacinte libron al la infanoj; homo fervore laboranta; ne sciante, kio okazos ...).

6.3. Propozicio-sintakso.

La propozicio estas formo por esprimi la plej simplan agon de la spirito: la juĝon. Ĝi nepre konsistas el almenaŭ du elementoj: subjekto (pri kiu oni ion asertas) kaj predikato (kiu esprimas la asertaĵon). Ofte la du elementoj estas nur subkomprenataj: *Kiu laboras? Petro!* (= Petro laboras) - *Skribu* (= Vi skribu). - *For!* (= Vi iru for!). La **ag-propozicio** esprimas ian agon (*li laboras; rigardu tien; mi ne dirus tion*), la **ec-propozicio** atribuas al aĵo ian kvaliton (*li estas knabo; hundo ne estas birdo; la patro estas sana*). En la propozicio povas aperi ankaŭ **objektoj** (**rekta** aŭ **nerekta**), esprimantaj tion, al kio estas direktata la ago (*aĉeti libron por la patro*), aŭ diversaj adjektoj montrantaj cirkonstancojn de la ago aŭ de la atribuo (*labori vespere en la ĉambro; esti sana nun*) aŭ predikativoj atribuantaj kvaliton (*esti sana, esti reĝo*).

6.3.1. Subjekto.

La ulo aŭ aĵo, kies agon, staton aŭ ekziston oni esprimas, estas nomata la subjekto. En la aktivo ĝi estas aganto (*la tapiŝo kovras la plankon*), en la pasivo ĝi estas suferanto (*la tapiŝo estas batita*). La subjekto povas esti substantivo (*la knabo laboras*), pronomo kiel kvazaŭnomo (*ĉiu laboras*), pronomo kiel reprezentanto (*la knabo laboras, kiam li volas*), infinitivo (*labori al li ne plaĉas*), substantivigita parolelemento (*multe da knaboj laboras; ĉiu "li" havas sian "ŝi"*) aŭ tuta propozicio (*kiu emas, laboras*). Se unu subjekto havas plurajn kunorditajn verbojn, ne necesas ripeti ĝin (*li laboras, manĝas kaj trinkas, sed ne amas*), kio estas nomata **elipso**. Tamen oni ne uzu la elipson post punkto (*Li laboras, manĝas kaj trinkas. Sed li ne amas.*). Se la verbo staras en infinitivo, la subjekto ne estas esprimata, ĝin montras la ĉirkaŭteksto (*mi ne scias, kion fari = kion mi faru*). La objekto de predikata verbo povas esti samtempe subjekto de verbo nepredikata (*lasu min respiri = lasu min, por ke mi respiru; ordonu al li purigi la ŝuojn = ordonu al li, ke li purigu la ŝuojn*). La objekto-subjekto iam ne estas esprimata (*ordonu purigi la ŝuojn = ordonu al iu, ke li purigu la ŝuojn*). La verbo en formo de adverba participo (**gerundio**) havas devige la saman subjekton kiel la predikata verbo (*laborante li kantis = dum li laboris, li kantis*), dum la adjektiva participo akordiĝas kun la determinata substantivo (*la aĉetanta sinjoro perdis monujon - mi atentigis la aĉetantan sinjoron pri la perdo*). La ago povas esti esprimita ankaŭ per substantivo, tiam la subjekto de la ago havas formon de suplemento (*mia deziro famiĝi = mi deziras, ke mi famiĝu; forestado de la knabo estis rimarkita = estis rimarkite, ke la knabo forestas; oni aŭdis kantadon = oni aŭdis, ke iu kantas*).

6.3.1.1. Akordo al la subjekto. La Esperanta verbo varias nek laŭ nombro nek laŭ persono kun diversaj subjektoj. Sole la adjektiva participo en kompleksa tempo akordiĝas kun la subjekto laŭ nombro (*mi estis kaptanta - ni estis kaptantaj*). La refleksivoj SI kaj SIA ne akordiĝas kun la subjekto laŭ nombro nek kazo, se ili ĉiam rilatas al la subjekto, dum la pronomoj LI, ŜI, ĜI, ILI rilatas al iu alia ol la subjekto (*li aĉetis tion por si - li aĉetis tion por li; ŝi venis kun sia amiko - ŝi venis kun ŝia amiko*). En la unua kaj dua personoj la refleksivoj ne

estas uzataj (*mi aĉetis tion por mi - ni aĉetis tion por ni - vi aĉetis tion por vi*). Ankaŭ post KIU estas obeata la persono: *vi, kiu faris tion per vi mem* (ne: per si mem). Tamen post "kelkaj el multaj" necesas diferencigi: *du el ni alportis siajn librojn* (librojn de la du homoj) - *du el ni alportis niajn librojn* (librojn de nia tuta kolektivo). La vortkunmetoj kun SIN- ne varias laŭ persono (*mi estas singardema; via singardemo*), dum la vortkunmetoj kun SIA- akordiĝas kun la persono (*mi konsentas miaflanke; ni konsentas niaflanke; vi konsentas viaflanke; li konsentas siaflanke*). La refleksivo ne povas esti mem subjekto aŭ determini subjekton, sed ĝi povas determini suplementon de la subjekto (*Petro kaj lia frato laboris - Petro kun sia frato laboris*).

La refleksivo anstataŭas aŭ rilatas **la subjekton de la plej proksime esprimata ago**. La agon povas esprimi ankaŭ infinitivo (*la sinjoro ordonis al la servisto vesti lin* = la sinjoron - *vesti sin* = la serviston), adjektiva participo (*la komponisto vidis knabon kantanta lian kanton* = kanton de la komponisto - *sian kanton* = kanton de la knabo) aŭ ag-substantivo (*Marta akceptis de Petro konfeson pri amo al ŝi* = al Marta - *pri amo al si* = al Petro). Sed la regulo ne validas pri substantivigataj participoj, kiuj montras ne la agon, sed agantan personon (*la verkisto petas la legantojn pri ilia atento*). La reciprokeco de du aŭ pluraj subjektoj estas esprimata per "unu la alian" (*ili amas unu la alian; la popoloj batalas unuj kontraŭ la aliaj*), per "sin reciproke" (*ili amas sin reciproke; la popoloj batalas kontraŭ si reciproke*) aŭ per "inter si" (*la judoj geedziĝas inter si; vivi inter si harmonie*).

6.3.1.2. Sensubjektaj propozicioj. La sensubjektaj propozicioj havas la subjekton aŭ subkomprenatan (*legu la libron* = vi legu la libron; *ne fumi!* = oni ne fumu!) aŭ tute ne esprimatan, ĉar la koncerna ago ne vekas ideon pri la aganto (*pluvas; neĝas; hajlas; fulmas; tontras; komencas pluvi; ĉesas neĝi; tagiĝas; estas bele; necesas; temas; eblas ktp.*). Tamen kelkaj el ĉi tiuj verboj povas havi subjekton (*akvo pluvis sur lian kapon; la libro temas pri la muziko; la kugloj hajlis sur la domon; lia voĉo tontris ktp.*). Kelkaj verboj esprimas sian subjekton per subpropozicio (*ŝajnas, ke pluvas; plaĉas al mi, ke vi venis*).

6.3.2. Predikato.

La predikato esprimas en la propozicio agon aŭ staton aŭ atribuas kvaliton.

a) la ago estas plej ofte esprimata per verbo (*li laboras; ne fumu; ne elklini sin el la fenestroj*), sed ĝi povas esti esprimata ankaŭ per aliaj rimedoj (*ĉit! ŝŝ! hot! ek! for! teren! la kapoj dekstren!*). La ne normalaj ag-propozicioj uzas kiel predikaton infinitivon en demanda aŭ ekkria formoj (*Kion fari? Ĉu esti aŭ ne esti? Labori dimanĉe! Bicikli en via aĝo!*) kaj elipsan ellason de la subjekto, de la predikato aŭ de ambaŭ (*for la militon!; venis, vidis, venkis; ĉiu por si mem; multe en kapo, nenio en poŝo; bonan tagon; nur ne tion!*).

b) la predikato en la ec-propozicioj konsistas ĉiam el du partoj (*esti reĝo; trovi bona; ŝajni saĝa; esti de meza kresko*): el la predikativo, kiu esprimas la kvaliton (*reĝo, bona, saĝa, de meza kresko*), kaj el la kopulo, kio estas la verba ligilo (*esti, trovi, ŝajni*). Kiel predikativo povas servi adjektivoj (*la domo estas granda; mi trovis la vinon malbona; li ŝajnigis sin saĝa; tio estas danĝera*), substantivoj (*la hundo estas besto; Petro iĝis reĝo; tio montriĝis kiel eraro; li estis*

elektita kiel prezidanto), prepozitivoj (*mia fratino estas de meza kresko; tiu bildo estas de Rembrandt; ĉu tiu libro estas por mi?*) aŭ infinitivoj (*li ŝajnas heziti; la elekto por vi venki aŭ morti; loĝi en tiu vilaĝo estas kvazaŭ morti*). Aparta apliko estas en la kompleksaj tempoj (*mi estas skribanta; la letero estas skribita*). En la sensubjektaj propozicioj la adjektivaj predikativoj ricevas adverbajn formojn (*estas danĝere; estas skribite*), sed post "ŝajnas" estas preferinda adjektivo (*ŝajnas stranga = ŝajnas esti stranga*). Kiel kopulon oni uzas plej ofte "estas", sed ankaŭ aliajn verbojn. Tiuj verboj montras komencon de nova stato (*iĝi saĝa; fariĝi instruisto; montriĝi prava; troviĝi senpova; esti elektita, nomita, balotita kiel prezidanto*), daŭron en sia stato (*resti stultulo; konserviĝi freŝa*) aŭ ŝajnon (*aperi kiel mensoganto; aspekti malfeliĉa; ŝajni embarasita; vidiĝi trompulo; mieni kiel malsanulo*). La predikativo povas ankaŭ kuntiri du propoziciojn en unu solan (*ŝi estis nuda kaj dancis - ŝi dancis nuda*).

6.3.2.1. Atribua predikativo. La atribuado prezentas la agon ne kiel objektivan, nediskuteblan veron (*la vino estas bona; knabo estas ludanta*), sed kiel subjektivan opinion aŭ impreson de iu (*mi trovas la vinon bona; mi vidis la knabon ludanta*). La atribua predikativo karakterizas ne la subjekton, sed la objekton de la propozicio, tial ĝi estas nomata ankaŭ objekta predikativo. Ĝi povas esti aŭ rekta (*oni elektis lin prezidanto*) aŭ nerekta (*oni elektis lin kiel prezidanton*). La objekta predikativo akordiĝas kun la objekto nombre, sed kaze nur post KIEL (*oni elektis lin deputito - oni elektis ilin deputitojn - oni elektis lin kiel deputiton - oni elektis ilin kiel deputitojn*). La rekta objekta predikativo staras ĉiam en nominativo, per kio ĝi diferencas de la objekta epiteto.

La objekta epiteto montras daŭran kvaliton de la objekto, dum la objekta predikativo esprimas la subjektivan momentan impreson kaŭzitan de la ago. Komparu: *mi vidas la domon verdan* (kiu vere estas verda) - *mi vidas la domon verda* (ĝi ŝajnas al mi verda); *li pentris knabinon bluokulan* (kiu vere havas bluajn okulojn) - *li pentris la knabinon bluokula* (li pentris al ŝi bluajn okulojn, kvankam ŝi efektive havas okulojn eble brunajn); *mi vidis malriĉulon almozpetantan* (pri kiu mi scias, ke li vivtenas sin per almozpetado) - *mi vidis la malriĉulon almozpetanta* (li petis almozon de iu, ĝuste kiam mi vidis lin). La objekta epiteto estas fermebla inter la artikolo kaj substantivo, dum la atribua predikativo staras ekstere (*mi vidas la verdan domon - mi vidas verda la domon; li pentris la bluokulan knabinon - li pentris bluokula la knabinon; mi vidis la almozpetantan malriĉulon - mi vidis almozpetanta la malriĉulon*).

6.3.3. Objekto.

La objekto estas frazelemento esprimanta tion, kion la ago trafas. Ĝi povas esti substantiva (*deziri libron*), infinitiva (*deziri kanti*) aŭ subpropozicia (*deziri ke oni kantu*). La objektoj estas **rektaj** (akuzativaj), kiam la ago rekte trafas la objekton (*marteli feron; aĉeti libron; trinki lakton*) kaj **nerektaj** (prepozitivaj) kiam la ago nur koncernas la objekton (*paroli pri io; diri al iu; akcepti de iu*). La nerektaj objektoj estas **traktativaj**, kiam oni traktas pri la objekto (*paroli pri la patro; zorgi pri la infano*), **dativaj**, kiam io estas transdonata al la objekto (*diri al la patro; aĉeti al la fratino*), kaj **ablativaj**, kiam io estas apartigata aŭ forprenata de la objekto (*akcepti de iu; preni de iu*). La objektoj **fiksaj** aperas devige post certaj verboj (*aparteni al iu*;

sed ne: *aparteni iun*), dum la objektoj **alternaj** povas libere varii sen ŝanĝo de la signifo (*danki iun - danki al iu; atendi iun - atendi je iu*). La objektoj **diversaj** varias ŝanĝante la signifon (*kredi ion - kredi je iu*). La verboj transitivaj do estas **fiksobjektaj**, **alternobjektaj** kaj **diversobjektaj**. La verboj **unudirektaj** povas havi nur unu objekton, rektan aŭ nerektan (*ami iun; zorgi pri iu*), la verboj **dudirektaj** havas unu objekton rektan kaj unu nerektan (*savi iun de io; diri ion al iu*), la verboj **tridirektaj** havas unu objekton rektan kaj du nerektajn (*kredi ion al iu pri iu*). Neniu verbo povas havi samtempe du rektajn objektojn, tial kelkaj alternobjektaj dudirektaj verboj havas du eblojn de esprimiĝo (*instrui infanojn pri la matematiko - instrui la matematikon al la infanoj; peti najbaron pri pano - peti panon de najbaro; sciigi novaĵon al amiko - sciigi amikon pri novaĵo*). La infinitiva objekto povas servi en la funkcio jen de la rekta objekto (*mi permesis al li foriri = mi permesis al li foriron*), jen de la nereakta (*mi instruis lin legi = mi instruis lin pri legado*), plie ĝi mem povas havi proprajn objektojn (*mi deziras legi libron al vi*).

6.3.4. Adjekto.

La adjektoj estas frazelementoj esprimantaj la diversajn cirkonstancojn de la ago aŭ de la atribuo. Ili povas havi formon adverban (*laŭte krii; esti hejme; nevidate eniri; kanti tage kaj nokte*), akuzativan (*veturi Pragon; pendigu lin la kapon malsupren; labori du horojn; esti alta du metrojn; veni la trian de majo*), prepozitivan (*labori de mateno ĝis vespero; esti malseka de kapo ĝis piedoj; veni kun libro en la manoj; paŝo post paŝo li daŭrigis la laboron; ili iris mano en mano*) kaj infinitivan (*venigi iun helpi; iru dormi; antaŭ ol foriri adiaŭu lin; anstataŭ amuziĝi lernu*). La specoj de adjektoj:

6.3.4.1. Lokaj adjektoj. La lokaj adjektoj estas **poziciaj** (*antaŭ la domo; en la domo; apud la domo; hejme*) kaj **movaj** (*antaŭ la domon; en la domon; apud la domon; hejmen; al la domo; ĝis la domo; tra la domo; el la domo; de la domo*). Movon oni povas esprimi nur rilate ion senmovan, kio povas esti aŭ **fiksa punkto** (*iri al la domo*) aŭ **pozicio** (*iri al inter du domoj*). La pozicio estas ofte esprimata per duopaj prepozicioj (*tra inter kruroj; de antaŭ la domo; el sub la lito*), sed ne ĉiam (*flugi super tegmento; kuri preter la domo laŭ la strato*). Eblas distingi **demovon** (*veni de la kunveno; eliri el la vendejo*), **almovon** (*veni al la kunveno; eniri en la vendejon*) aŭ **tramovon** (*iri tra la vendejo; flugi preter la arbo; marŝi laŭ la rivero*).

6.3.4.2. Tempaj adjektoj. La tempaj adjektoj ekzistas **aktualaj** esprimantaj tempopunkton (*mi naskiĝis la 6-an de marto; mi venos marde; ĝi okazis ĉe la tagmanĝo; neniam li faros tion*), paseon (*ĝi okazis antaŭ tri semajnoj*), futuron (*mi venos post tri tagoj*) aŭ daŭron (*dormi la tutan nokton; en la daŭro de kelkaj minutoj*), **komencaj** (*de nun; de tiam; ekde la milito; de antaŭ la milito; de post la milito; labori de ĉirkaŭ la sesa matene*), **finaj** (*mi ne forgesos vin ĝis la morto; ĝis antaŭ du monatoj; ĝis post Kristnasko; diboĉi ĝis ĉirkaŭ noktomezo*) kaj **nombraj** (*mi estis tie ĉi jam dufoje, nun mi venis triafoje kaj mi esperas veni ankoraŭ multfoje*).

6.3.4.3. Stataj adjektoj. La stataj adjektoj karakterizas la staton de la subjekto (*li rajdis kun ĉapelo sur la kapo*) aŭ de la objekto (*li vidis ŝin kun granda hundo*). Ili povas havi formon de la identiga subspeco (*ŝiaj haroj pendis en pezaj plektoj - la haroj kaj la plektoj montras la saman*

aĵon, ili identas) aŭ de la **rilatiga subspeco** (li agis en granda kolero - inter li kaj lia kolero ekzistas rilato, sed ili ne identas). La **originaj** adjektoj esprimas staton antaŭ ia ŝanĝo (*forĝi el glavo plugilon; deveni el nobela familio; vekti iun el dormo*), dum la **rezultaj** la staton post ŝanĝo (*nomumi iun kiel redaktoron; fariĝi sekretario; la feino ŝanĝiĝis en floron; profundiĝi en legadon; luli en dormon*). Ankaŭ la predikativoj povas servi kiel rezultaj adjektoj (*fariĝi kuracisto*). La **situaciaj** adjektoj montras la staton en kvin formoj: la **societaj** esprimas, kun kio okazas la ago (*mi manĝis la ovon kun pano; li murdis la virinon kune kun ŝiaj infanoj; kun ŝi li vivus feliĉe*), la **separativaj** diras, sen kio la ago okazas (*sen fajro ne brulas eĉ pajlo; ekster tiaj okazoj li vivis sola; escepte de la supo al li plaĉis ĉio; li donis al mi konsilon anstataŭ helpo; sen via helpo mi ne sukcesus*), la **stat-indikaj** klarigas, en kia stato troviĝas la subjekto aŭ la objekto (*lia biblioteko konsistas el modernaj verkoj; la neĝo falas en grandaj flokoj; li venis kiel delegito; en via situacio mi ne hezitus; veni en akompano de iu; pritrakti sub la titolo ...; kisi iun kun senhonta vizaĝo; ŝi dancis nuda*), la **kondiĉaj** montras, ke la stato influas la agon favore (*vi, kiel prezidanto, intervenu; ĉe lia lerteco li povus ricevi pli grandan taskon*) kaj la **koncedaj** sciigas, ke la stato influas la agon malfavore (*kvankam kanajlo, li amas ŝin; ĉe mia plej bona volo mi ne povas alkutimiĝi; malgraŭ viaj petegoj, li ne estus vin pardoninta; spite ĉiujn argumentojn li rifuzis*).

6.3.4.4. Modalaj adjektoj. La modalaj adjektoj karakterizas la agon mem. Eblas distingi la manierajn, kaŭzajn kaj celajn. La **manieraj** estas **manier-indikaj** (*kuraĝe paroli; leone batali; paroli sen senco; fermi la pordon kun bruo; fermi la pordon sen bruo; aperi sub alia formo; tremi per la tuta korpo; eltrinki per unu tiro; stari vizaĝo kontraŭ vizaĝo. atingi la celon paŝo post paŝo; kribi el sia mizero; danci laŭ ies fajfilo. kondukti kvazaŭ bruto*), **instrument-indikaj** (*bati per martelo; vidi per okuloj; kompreni per helpo de vortaro; sendi leteron per servisto; pentrigi sian portreton per fama artisto; la pordo fermiĝis per vento; desegni el la memoro; esti malpermesita sub severa puno; ekkoni arbon laŭ fruktoj; kalkuli sur fingroj; geedziĝi pere de anonco; sukcesi dank' al ies helpo; aranĝi ion helpe de tri amikoj; bati martele; peti iun per la ĉielo*), **mezur-indikaj** (li kuris tridek kilometrojn; la prezo plialtiĝis ĝis 5 frankoj; vendi cigaredojn po dek; de kapo ĝis piedoj). La **kaŭzaj** adjektoj esprimas la kaŭzon aŭ motivon de la ago (*svarmi de homoj; sveni de teruro; resti hejme pro malsano; venĝi al iu pro io. timi pri la urbo; fari ion el malĝojo; mi estas ĉi tie laŭ la ordono de mia estro*). La **celaj** adjektoj esprimas la celon de la ago (*vojaĝi por plezuro; diri ion por ies laŭdo; riski sian vivon por duba rezultato; erari por sia bono; voĉdoni por iu; tio ne servas por uzo, sed por ornamo; al E. V. por signo de profunda estimo*).

6.3.4.5. Koncern-adjektoj. La koncern-adjektoj esprimas ion, kion la ago koncernas aŭ rilatas. Ili similas al nerektaj objektoj (*kaj parte identas kun ili*), sed laŭ la senco de la verbo ili montras lokon aŭ manieron de la ago. Ili estas **traktativaj** (*silenti pri io; sukcesi en io; partopreni en io; ĉe li estas nenio certa; vidi en iu anĝelon; preferi ion al io; en liaj okuloj tio estas peko; abundi je herbo*), **dativaj** (*certe okazis al li malfeliĉo; esti konata al iu; porti donacon por iu; faru ion kontraŭ tio; mi faros pri li, kiel vi ordonis; paroli kun iu; humiliĝi antaŭ iu; efiki sur iun*) kaj **ablativaj** (*tio restis el lia tuta gloro; trinku el ĉi tiu vino; elekti inter du malbonoj; senigita je ĉiuj rajtoj; fuĝi antaŭ iu*).

6.3.5. Plurfunkcieco de frazelementoj. Kiel ni jam vidis, la limoj inter la unuopaj specoj de frazelementoj ne estas absolute striktaj. Ekzemple la predikativoj kaj objektoj povas esti konsiderataj ankaŭ adjektoj (adjektaj predikativoj, adjektaj objektoj), ĉar ili montras ankaŭ manieron de la ago (*ŝi dancas nuda; li fariĝis heroo; ili silentis pri lia kulpo; ni elektis lin kiel prezidanton*). Rekta objekto ofte servas kiel subjekto de alia verbo (*mi vidis lin labori; mi vidis lin laboranta*). La sama frazelemento povas esti laŭ sia pozicio en la frazo jen suplemento (*skatolo el papero*), jen adjekto (*oni faris la skatolon el papero*), jen epiteto (*li havas blujajn okulojn*), jen predikativo (*la okulojn li havas blujaj; li havas blujaj la okulojn*). Laŭ senco de la predikata verbo temas jen pri adjekto (*li iras promeni* - kien li iras?), jen pri objekto (*li deziras promeni* - kion li deziras?), laŭ la uzo de la artikolo jen pri suplemento (*mi manĝis viandon kun terpomoj* - kian viandon?), jen denove pri adjekto (*mi manĝis la viandon kun terpomoj* - kiamaniere mi manĝis ĝin?) ktp.

6.3.6. Specoj de la propozicioj. La frazelementoj grupiĝas en propoziciojn, kiuj laŭ la valoro povas esti **indikaj** (*mi havas aŭtomobilon; kiom da laboro mi havas!*), **deziraj** (*se nur mi havus aŭtomobilon! se ankoraŭ vivus la patrino! se vi almenaŭ helpus al mi! ke mi nur ne malsaniĝu! se mi nur ne malsaniĝos!*), **ordonaj** (*lumigi! lumigu! bonvolu lumigi! ne lumigu! gardu vin lumigi!*) kaj **demandaj** (*kien vi iras? ĉu mi povas lumigi?*). Laŭ la enhavo ekzistas primitivaj propozicioj, konsistantaj sole el la subjekto kaj predikato (*la hundo bojas*) kaj komplementitaj propozicioj, havantaj ankaŭ komplementojn (*la granda hundo trinkas akvon sur la korto*). La kuntiritaj frazoj havas plurajn samspecajn frazelementojn (*liaj vangoj kaj okuloj ardis; la arbaro zumis, susuris, flustris*). La kunfanditaj frazoj formis frazelementon el subpropozicio (*mi aĉetis libron, kiun verkis Balzac - mi aĉetis libron verkitan de Balzac*).

6.3.7. Vortordo. En Esperanto la vortordo ne estas ligita nek absolute libera. Ekzistas certaj kutimoj, konformaj al la natura irado de la penso, kiuj prezentas la vortordon de normala, emocie neŭtrala esprimado. Se oni ŝanĝas la vortordon, la frazo ricevas emocian nuancon, iu el la frazelementoj estas akcentita. Krome ekzistas nemultaj vortoj kaj situacioj, kiuj bezonas vortordon ligitan. Ĉefa regulo estas klopodi pri klareco kaj bonsoneco.

6.3.7.1. Ordinara vortordo. La norma vortordo estas: subjekto, predikato, rekta objekto, nereakta objekto, adjekto (*la patro donis libron al sia filo lunde*). Plej firme interligitaj estas la subjekto kaj la predikato, inter kiujn eblas meti nur adverban adjekton (*la hundo avide trinkas*). Ĉe la postmetitaj frazoj citantaj okazas inversigo de la subjekto kaj predikato ("*mi venos*", *diris la knabo*). La rekta objekto staras antaŭ la nereakta, krom la okazoj, kiam povus ekesti miskompreno (*li akceptis de la viro la portreton - li akceptis la portreton de la viro*) aŭ kiam la rekta objekto estas pli longa (*mi donis al li mian libron; li donis al la knabo multajn interesajn librojn*). Antaŭ la infinitivajn komplementojn kaj antaŭ la participojn de la kompleksaj verboformoj oni metas adverbajn adjektojn (*mi ne povas bone aŭdi; li estas ege ofendita*) kaj personalajn aŭ demonstrativajn rektajn objektojn (*mi volus vin viziti; se mi estus tion sciinta*), sed ne devige (*mi volus viziti vin; se mi estus sciinta tion*). Se ambaŭ verboj povas havi objekton (*mi igis lin kapti ŝin*) ne estas bone ŝanĝi la vortordon, eĉ se estas esprimita nur unu (*mi igis lin kapti; mi igis kapti ŝin*). La adjektiva epiteto staras regule antaŭ la

karaktizata vorto (*la granda hundo trinkas freŝan akvon*). Tamen en kelkaj kutimaj esprimoj (*Lingvo Internacia*), alparolo (*infano mia kara*) aŭ se la epiteto havas suplementon (*herbejo riĉa je herbo*) estas la vortordo inversa.

6.3.7.2. Ligita vortordo. Antaŭ la vortoj, kiujn ili senpere rilatas, staras NE (*ne mi faris tion - mi ne faris tion - mi faris ne tion*), NUR (*nur mi promenis en la parko - mi nur promenis en la parko - mi promenis nur en la parko*), ANKAŬ (*ankaŭ mi promenis en la parko - mi ankaŭ promenis en la parko - mi promenis ankaŭ en la parko*), JAM (*jam ankaŭ li venis hieraŭ - ankaŭ li jam venis hieraŭ - ankaŭ li venis jam hieraŭ*), EĈ (*eĉ li venis al mi - li eĉ venis al mi - li venis eĉ al mi*), ANKORAŬ (*ankoraŭ mi skribos leteron - mi ankoraŭ skribos leteron - mi skribos ankoraŭ leteron*) kaj ALMENAŬ (*almenaŭ ili aprobis la proponon ili almenaŭ aprobis la proponon - ili aprobis almenaŭ la proponon*). Male, MEM staras post la rilatata vorto (*mi mem volas inviti vin mi volas inviti vin mem*). Post KIES (*ies, ties, ĉies, nenies*) oni metas senpere la determinaton (*tio estas krimo, kies viktimo li estis; ies libron oni trovis*). Kutime NENION PLU staras kune (*ĉu vi deziras nenion plu? ne, nenion plu mi deziras*).

6.3.7.3. Reliefiga vortordo. La predikaton oni reliefigas metante ĝin antaŭ la subjekton (*kuregis la knabo per sia tuta forto*). La objekto, predikativo aŭ adjekto estas akcentataj per meto sur la frazkomencan (*la bildon li pentris en Parizo - en Parizo li pentris la bildon - granda estis mia ĝojo*). Epitetoj estas akcentataj kutime per postmeto (*li estas homo bona kaj diligenta; vi havis sukceson grandiozan*). La subjekton oni povas emfazi per propozicio kun ESTAS (*estis Petro, kiu pentris la bildon*) aŭ per MEM (*Petro mem pentris la bildon*). Se la subjekto kaj predikato estas malproksimigitaj de si, la intermetaĵon apartigu per komoj (*fine mi, post multaj malfacilaĵoj, sukcesis*).

6.4. FRAZ-SINTAKSO. La kompleksa frazo unuigas en si du aŭ plurajn propoziciojn (membrojn de la frazo). La membroj de la kompleksa frazo povas esti simple apudmetitaj aŭ unu estas subordita al la alia. La apudmetitaj propozicioj estas ja kunligitaj, sed unu ne dependas de la alia, ili estas kunorditaj propozicioj (*la patro iris en la teatron, kaj mi restis hejme*). La **subordita** propozicio (**subpropozicio**) anstataŭas iun el la frazelementoj de la **ĉefpropozicio** (*li diris tion - li diris, ke li venos*). Unu ĉefpropozicio povas havi plurajn subpropoziciojn, kiuj povas esti kunorditaj inter si (*mi aŭdis, ke li edziĝis kaj havas du infanojn*) aŭ sendependaj inter si kaj suborditaj ambaŭ rekte al la ĉefpropozicio (*kiam mi venis, mi vidis, ke nin vizitis la bopatrino*) aŭ unu povas esti subordita al la alia, kiu servas por ĝi kiel ĉefpropozicio, do temas pri **duagrada subpropozicio** (*mi postulis, ke li redonu la libron, kiun mi pruntedonis al li*).

6.4.1. Kunorditaj propozicioj. Inter la kunorditaj propozicioj povas esti diversaj rilatoj:

6.4.1.1. Kopulaj propozicioj. La kopulaj propozicioj estas simple kunligitaj per konjunkcioj (*li eksidis kaj manĝis; venis unu gasto, venos ankaŭ aliaj; donu la monon, kiel ankaŭ mi donis; ne iru tien, cetere ili ne estas hejme; li fuĝis, mi same; li longe hezitis, fine li decidiĝis; la hundido ne manĝis, nek trinkis; li povas labori, eĉ ŝofori li scias*), per duopaj konjunkcioj (*kaj frostas kaj neĝas; li parte konsentis, parte ne konsentis; kiel vi kondutas al mi, tiel ankaŭ mi kondutos al vi - tiel same*

mi kondutos al vi; la hundo nek manĝis, nek trinkis; li ne nur mensogas, sed ankaŭ ŝtelas; li ne sole helpis, sed eĉ pruntis monon) aŭ sen konjunkcio (li sidis, manĝis, silentis).

6.4.1.2. Alternativaj propozicioj. La alternativaj propozicioj indikas diversajn eblojn, el kiuj okazos nur unu (*aŭ mi iros teatron aŭ mi restos hejme. eble mi iros teatron, eble mi restos hejme; ĉu bone, ĉu malbone. mi faris tion; jen li skias, jen li patinas, sed ne lernas; li estas tridekjara aŭ pli ĝuste tridekunujara; helpu al li aŭ prefere faru tion mem).*

6.4.1.3. Adversaj propozicioj. La adversaj propozicioj kontraŭas unu la alian (*multaj laboras, multaj parazitias; ni ĉiuj klopodas, kaj li kuŝas; vi volas iri al koncerto, mi miavice restos hejme; vi estas fripono, dum via frato heroo; vi dormis, kaj dume ili ŝtelis; vi tion asertas, sed mi ne kredas al vi; ili promesis nenion, tamen ili venis; li promesis ĉion, sed tamen li faris nenion; vi ja multe klopodis, sed rezulto estas nenia).* Speciala speco de adversaj propozicioj estas la propozicioj **protestaj** (*li ne nur ne helpis al la vundito, sed eĉ priŝtelis lin).*

6.4.1.4. Konkludaj propozicioj. La konkludaj propozicioj esprimas ion, kio sekvas el la antaŭa propozicio (*li estas stultulo, diru al li nenion; nokte neĝis, tial mi iros skii; vi tion fuŝe kuiris, sekve vi manĝos sola; la trajno forveturos post unu horo, do ni havas tempon kaj pro tio mi iras en kafejon).*

6.4.1.5. Klarigaj propozicioj. La klarigaj propozicioj klarigas kaj motivas la enhavon de la antaŭa propozicio (*prenu novan veston, ĉar nur tiel vi plaĉos al ŝi; li havas du hundojn, nome pudelon kaj melhundon; li alportis iom da manĝo, tio estas, panon kaj botelon da lakto; kuraĝe iru al li, li ja estas bonulo; li certe helpos al vi, des pli, ke li amas infanojn; mi ne bezonis la libron aĉeti - fakte mi posedas ĝin jam de longe; ne diru tion al li - li sen tio jam furiozas).* Ekzistas ankaŭ **klarigaj-adversaj** propozicioj, en kiuj la dua motivas la enhavon de la unua, montrante, kio okazus en mala okazo (*mi devas labori, alie mi ne sukcesos fini mian taskon; obeu, ĉar male oni batos vin).*

6.4.1.6. Pseŭdo-subpropozicioj. La pseŭdo-subpropozicioj estas enkondukitaj per KIO, do ŝajnas rilataj subpropozicioj, sed ne anstataŭas frazelementon de la antaŭa propozicio. Oni povas ilin transformi en propoziciojn kopulajn (*ŝi scias bele danci, kio al mi tre plaĉas - ŝi scias bele danci kaj tio al mi tre plaĉas).*

6.4.1.7. Rekta parolo. La rekta parolo estas preciza citaĵo de ies vortoj (*Petro diris: "Mi venos morgaŭ."*). Ĝi konsistas el frazo citata (*mi venos morgaŭ*) kaj frazo citanta (*Petro diris*). La citatan frazon oni metas inter citilojn aŭ haltostrekojn (*- Mi venos morgaŭ, - diris Petro, - kaj helpos al vi*). La frazo citanta povas esti antaŭmetita, sekvita de dupunkto (*Petro diris: "Mi venos morgaŭ."*), intermetita (*"Mi venos morgaŭ," diris Petro, "kaj helpos al vi."*) kaj postmetita (*"Mi venos morgaŭ kaj helpos al vi," diris Petro*).

6.4.2. Suborditaj propozicioj. Ĉiu subpropozicio estas kompletiga parto de la ĉefpropozicio, t.e. frazelemento esprimata en formo de tuta propozicio. Sekve ekzistas subpropozicioj **subjektaj** (*ŝajnas, ke li venos - kio ŝajnas?*), **objektaj** (*li promesis, ke li venos - kion li promesis?*), **predikativaj** (*lia feliĉo estas, ke li venis - kio estas lia feliĉo?*), **epitetaj** (*la*

knabo, kiu vin serĉis, jam foriris - kiu knabo?) kaj **adjektaj** (*mi skribis la leteron, kiam mi venis hejmen - kiam mi skribis la leteron?*). La subpropozicioj subjektaj, objektaj kaj predikativaj havas komunan nomon **kompletivoj**. La subpropozicio povas esti antaŭmetita (*kiam li venis, li manĝis la viandon*), intermetita (*li manĝis, kiam li venis, la viandon*) aŭ postmetita (*li manĝis la viandon, kiam li venis*). Laŭ la formo estas **rilataj**, esprimantaj per KIO, KIA, KIU rilaton al la anstataŭata frazelemento, kiu povas esti reprezentata per TIO, TIA, TIU (*faru tion, kion vi promesis = faru, kion vi promesis*), **eksplikaj** disvolvantaj per KE la enhavon de la frazelemento (*mi scias, ke li venos; ŝajnas, ke li pravas*), **demandaj** formiĝantaj el dependigitaj demandoj (*ĉu li venos? - mi ne scias, ĉu li venos*) kaj **implikitaj**, en kiuj la demandvorto apartenas al la subpropozicio, sed estas metita al la ĉefpropozicio (*vi volas, ke mi faru kion? - kion vi volas, ke mi faru?*). Laŭ la modo la subpropozicioj estas **indikaj** (*mi vidas, ke li foriris; vi vidos, ke mi lernos; kredu, ke mi helpos vin*), **celaj** (*mi volas, ke vi foriru; li meditas, ĉu li lernu; mi bezonas, ke oni min helpu*) kaj **supozaj** (*mi scias, ke li forirus; diru, ĉu li lernus kun mi? estas certe, ke oni vin helpus*).

6.4.2.1. Subjektaj propozicioj. La subjekta propozicio anstataŭas la subjekton de la ĉefpropozicio. La subjektpropozicioj estas eksplikaj (*ŝajnas, ke li venos; estas necese, ke vi parolu; ĉu plaĉus al vi, ke mi vizitus vin?*), rilataj (*tiu, kiu diris tion, devas esti kanajlo; kiuj emas, laboras; kion vi diris, al mi ne plaĉas; tiu, kies libron vi legas, estas mia preferata aŭtoro*) kaj dependaj demandoj (*ne estas certe, pro kio li mortis; ne estas dirite, kien ni iru; estas dube, ĉu li povus helpi al mi*).

6.4.2.2. Objektaj propozicioj. La objekta propozicio anstataŭas la rektan objekton de la ĉefpropozicia predikato. La objektpropozicioj estas eksplikaj (*mi vidis, ke li manĝas; li sciigis al mi, ke mi venu; mi kredas, ke plaĉus al vi, se mi venus*), rilataj (*faru, kio plaĉas al vi; lernu, kion mi ordonis al vi*) kaj dependaj demandoj (*mi ne scias, kiu li estas; li elkalkulis, kiel longe daŭros la filmo; li demandis, kie mi restis tiel longe; mi ne scias, ĉu mi restu aŭ foriru; mi ne komprenas, kial li kolerus*). Speco de objekta subpropozicio estas la nereкта parolo, formiĝanta el la rekta parolo (*Li diris: mi skribas - li diris, ke li skribas*). En la **nereкта parolo** ĉiam konserviĝas tiu verbotempo, kiu estas en la rekta parolo (*li diris, ke li skribas - li diros, ke li skribas - li dirus, ke li skribas - li diru, ke li skribas*).

6.4.2.3. Nerekt-objektaj propozicioj. La nerekt-objektaj subpropozicioj anstataŭas nerektajn objektojn de la ĉefpropozicio. Ili estas eksplikaj (*li dankas sian riĉon al tio, ke li heredis grandan posedaĵon; neniu sciis pri tio, ke vi venos; mi kontentas pri tio, ke vi vizitis min = mi kontentas, ke vi vizitis min; ŝi ne kutimiĝis al tio, ke oni ŝin suspektu; mi sciigis lin pri tio, ke mi helpus al li*), rilataj (*donu la libron al tiu, kiu meritos ĝin*) kaj dependaj demandoj (*li informis min, kiel prosperas la entrepreno; li demandis ŝin, ĉu li ŝin akompanu; mi sciigis lin, kion mi tiuokaze farus*).

6.4.2.4. Predikativaj propozicioj. La predikativa subpropozicio anstataŭas ĉefpropozician predikativon en formo eksplika (*lia feliĉo estas tio, ke li helpis min; lia ordono estas, ke ni batalu; lia aserto estas, ke li neniam cedus*), rilata (*li estas tiu, kiu vin savis; tio estis, kio kaŭzis la*

skandalon) kaj de dependa demando (*la demando estas, ĉu li vivas aŭ mortis; la problemo estas, kiam ni komencu la eksperimenton; ĉu esti aŭ ne esti, jen la demando*).

6.4.2.5. Epitetaj propozicioj. La epiteta subpropozicio havas la funkcion de epiteto apud iu substantiva frazelemento. Ĝi povas esti rekta (*vi ne foriros sen respondo, kiun mi preparis por vi*) aŭ nereakta, suplementa (*vi ne foriros sen respondo pri tio, pri kio ni diskutis; kiu tro multe promesas, ties parolon ne kredu; mi ne komprenas vian koleron pri tio, ke oni diris al vi la veron*). La rekta epitetpropozicio povas esti rilata (*la homo, kiu vin vizitis, estas mia amiko; mi vizitis la sinjoron, kies aŭto al vi tiom plaĉis; la sola infano de mia amiko, kiun infanon vi vidis ĉe mi antaŭ nelonge, mortis hieraŭ; mi vidis juvelon, kiun volonte mi aĉetus; la aŭtoro, kies granda fervoro estu laŭdata, amasigis en sia libro multegan materialon; ĉu ekzistas saĝa homo, kiu komprenus tion?*), eksplika (*la stato, ke mi devas vane atendi, ne daŭros longe; mi ricevis depeŝon, ke mi tuj iru; mi havas plenan certecon, ke li ne rifuzus min*) kaj dependaj demandoj (*la demando, ĉu E-o povas havi poezion, ne estas plu diskutebla; mi ne ricevis ordonon, kiam mi revenu; mi ne ricevis respondon, kiam li komencus labori*).

6.4.2.6. Adjektaj propozicioj. La adjektaj subpropozicioj anstataŭas adjektojn de la ĉefpropozicio, tial ili diviĝas tiel same kiel la adjektoj. La lokaj montras pozicion (*li sidas tie, kie mi volis sidi*) aŭ movon (*mi iras tien, de kie vi revenas; vi rapidas, kien ankaŭ mi volas kuri; vi staras tie, tra kie mi volas ĵeti mian pilkon*). La tempaj esprimas samtempecon (*kiam venis la ŝtelistoj, mi dormis; ĉu vi mem ĉiam helpas, kiam ni petos? dum vi skribos la leteron, mi legos; kiam mi skribis la leteron, li envenis*), antaŭtempecon (*post kiam mi revenis, ni komencis labori; post ol la prezidanto malfermis la kunsidon, oni komencis la tagordon; kiam mi estis skribinta la leteron, mi sigelis ĝin; la kuracisto venis, kiam la malsanulo jam mortis; tuj kiam li ekaŭdis la krion, li alkuris*), posttempecon (*antaŭ ol li foriris, li adiaŭis ĉiujn; antaŭ ol foriri, li adiaŭis ĉiujn; kiam la kuracisto alvenis, la malsanulo jam mortis*), komencon (*li studas ĉiutage, de kiam li iĝis studento*), finon (*longa tempo pasis, ĝis oni konstruis la domon; mi silentos, ĝis oni ne plu bruos*) kaj daŭron (*dum vi skribos, mi legos; kiel longe vi konstruos la domon, tiel longe mi helpas vin*). La stataj subpropozicioj estas **originaj** (*la miskompreno devenis el tio, ke li fuŝe esprimis sin - . . . el tio, kion li fuŝe esprimis*), **rezultaj** (*mi ŝanĝis mian decidon je tio, ke mi restos hejme - . . . je tio, kion oni konsilis al mi antaŭe*) kaj **situaciaj**, nome **societaj** (*mia permeso estas ligita kun tio, ke vi restos hejme*), **separativaj** (*vi ne foriros sen tio, ke vi plenumus vian devon; li nenion faras krom manĝi*), **statindikaj** (*mi surprizis lin ĉe tio, ke li kuŝis anstataŭ labori*), **supozaj** (*ĉar vi bone faris vian taskon, mi rekompencos vin; kiam vi mensogis, oni rajte vin punis; se vi faris vian taskon, mi vin rekompencos; se vi estus farinta vian taskon, mi vin rekompencus*) kaj **koncedaj** (*mi rekompencos vin, kvankam vi faris vian taskon nur parte; eĉ se vi ne faris ĉion, mi rekompencos vin; ĉu li konsentas, ĉu li malaprobas, la afero estas farita*). La subpropozicioj modalaj estas **kaŭzaj** (*la bonon mi faris nur tial, ĉar mi ne povis agi alie; sciante pri la danĝero, mi gardos min = ĉar mi sciis...*), **celaj** (*ili faris ĉion eblan, por ke li sentu sin hejmece; mi venis por helpi vin; ŝi tro amas la infanojn, por ke ŝi povus ilin ĝuste eduki*) kaj **manieraj**, nome manierindikaj (*la laboro estas farita tiamaniere, ke ĉiu faris sian taskon aparte; laŭ tio, kion mi aŭdis, li mortis*), komparaj (*mi amas vin tiel, kiel vi amas min; li naĝas kiel fiŝo = kiel fiŝo naĝas*),

instrument-indikaj (*li multe helpis min per tio, ke li lerte asistis*) kaj konsekvenca-indikaj (*la nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi*).

6.4.2.7. Verboformoj en subpropozicioj. La verboformoj estas aŭ **absolutaj**, kiam la subpropozicia kaj ĉefpropozicia verboj estas en la sama tempo (*li kuris, kiel li povis - li kuras, kiel li povas - li kuros, kiel li povos - li kurus, kiel li povus*) aŭ **relativaj**, kiam la subpropoziciaj verbotempoj montras samtempecon, antaŭtempecon aŭ posttempecon kompare kun la tempo de la ĉefpropozicio (*ŝi diris, ke li laboras - ŝi diris, ke li laboris - ŝi diris, ke li laboros - ŝi diris, ke li laborus - ŝi diris, ke li laboru*). La relativaj tempoj aperas en la frazoj subjektaj (*ŝajnis, ke li laboras*), objektaj (*mi vidis, ke li laboras*), predikativaj (*mia decido estis, ke mi laboros*), epitetaj eksplikaj (*ŝi havis opinion, ke li laboros*), en ĉiuj dependaj demandoj (*mi dubis, ĉu li venos*) kaj en la subpropozicioj nerekt-objektaj (*mi ĝojis, ke vi venos = mi ĝojis pri tio, ke vi venos*). En la subpropozicioj adjektaj celaj aperas post POR KE ĉiam la volitivo (*mi skribis al vi tion, por ke vi ĉion komprenu*). En ĉiuj ceteraj okazoj estas uzataj la tempoj absolutaj. La antaŭtempecon, samtempecon kaj posttempecon oni devas esprimi per aliaj rimedoj (*kiam mi venis, li jam estis laborinta - kiam mi venis, li ĝuste laboris - kiam mi venis, li ĝuste estis laboronta - li komencis labori, antaŭ ol mi venis - li komencis labori, post kiam mi venis - li laboris, ĝis kiam mi venis* ktp.). Tamen ekzistas tri esceptoj: la absoluta tempo restas en la kompletivaj subpropozicioj post OKAZI (*okazis, ke li bankrotis*), ĉe ekzisto de ia interrilato de kaŭzo inter la du propozicioj (*la bruo kaŭzis, ke li eraris; tio rezultigis, ke li venkis*) aŭ se la ĉefpropozicio esprimas taksan opinion pri ia fakto esprimita en la subpropozicio (*estis bone, ke ne pluvos; estis utile, ke vi restis hejme*). En la futuro kaj kondicionalo oni uzas SE anstataŭ KE (*estos bone, se ne pluvos; estos utile, se vi restos hejme - estus bone, se ne pluvus; estus utile, se vi restus hejme*). Ambaŭ tempoj povas aperi samtempe en unu kompleksa frazo (*kiam mi revenis, mi vidis, ke la fratino skribas leteron*).



VORTPROVIZO

7.1. Leksika bazo

a) La esprimtrezoro de Esperanto konsistas el radikvortoj (*tablo, bela, kuri*), derivaĵoj (*surtabligi, beleco, kuradi*), kunmetaĵoj (*tablotuko, belvidejo, kuratingi*), vortgrupoj (*kompleksaj tempoj, dufera trioksid, egaligo de kunkudroj*) kaj frazeologiaĵoj (*tion li ne afiŝos, droni en revoj, ne restis ŝtono sur ŝtono, ĉiu vulpo sian voston laŭdas*).

b) La vortojn konsistigas la morfemoj. La leksaj morfemoj estas radikoj (*tabl, bel, kur*) kaj afiksoj, nome prefiksoj (*bo, ek, dis, mal . . .*) kaj sufiksoj (*in, ul, et, aĉ . . .*). La radikoj kaj afiksoj kunmetiĝas en radikalojn (*surtablig, belulin, tablotuk, herbriĉ*), el kiuj post almeto de la gramatikaj morfemoj, populare nomataj finaĵoj (*o, a, j, as . . .*), estiĝas vortoj (*surtabligi, belulino, tablotuko, herbriĉa*).

c) La vortradikoj estas klaseblaj en kvar kategoriojn:

- **oficialaj** - radikoj, kiuj aperis en Fundamento de Esperanto, aprobita en 1905 dum la unua Universala Kongreso en Bulonjo ĉe maro en Francio (ĉirkaŭ 2640 vortradikoj enkalkulante finaĵojn kaj afiksojn).

- **oficialigitaj** - ĉi tiujn vortradikojn aprobis la Akademio de Esperanto per siaj oficialaj aldonoj al la Fundamento

- **neoficialaj** - radikoj, kiujn provis enkonduki unuopaj aŭtoroj en siaj tekstoj (libroj, gazetoj), kaj kiuj batalas por akceptiĝo kaj oficiala aprobo (la t.n. neologismoj).

- **fakaj** - radikoj, kiuj estis enkondukitaj por la bezono de la fakstilo en diversaj sciencaj, tehnikaj, artismaj kaj sportaj branĉoj; multaj el ili neniam estos oficialigitaj, tamen ili ne estas neologismoj, ili simple havas specialan taskon en la lingvo; precize difinitaj fakvortoj estas nomataj terminoj.

d) La plej granda vortaro de Esperanto, la t.n. Plena Ilustrita Vortaro, enhavas ĉirkaŭ 15 000 vortradikojn. Inter ili estas propraj nomoj (*Rembrandto, Jozefo, Romo, Eŭropo*), fakvortoj (*glicerino, ŝafto, vulkanizi*), poetismoj (*stalono, mava*) kaj vortoj el la komunuza stilo. Multaj

neologismoj estas uzataj jam dum jardekoj (*kurta*), sen esti oficialigitaj, aliaj estas novaj (*sputniko*). Eblas krei el ili minimume 100 000 derivaĵojn kaj kunmetaĵojn, la vortgrupoj estas nekalkuleblaj. Komparante la vortprovizon de Esperanto kun aliaj lingvoj, oni devas preni en konsideron, ke ekzemple al unu angla vorto (*work*) respondas tri Esperantaj (*laboro, labora, labori*), sed ankaŭ tiujn eblas kalkuli kiel unu radikon aŭ radikalon. Do la asertoj pri la vortprovizo de Esperanto povas tre diferenci laŭ tio, ĉu oni kalkulas radikojn, radikalojn aŭ ĉiujn unuopajn vortojn, ĉu oni nombras nur oficialajn vortojn aŭ ankaŭ la neoficialajn.

7.2. Ŝhemismo kaj naturalismo.

En Esperanto interbatalas du kontraŭaj tendencoj:

- *ŝhemismo* - Esperanto transprenas el la internacia vorttrezoro plej ofte nur la bazajn vortojn, donas al ili la fonetikan Esperantan ortografion kaj siajn finaĵojn, per siaj afiksoj derivas el ili novajn vortojn (*kvalit - kvalito, kvalita, plikvalitigi, malkvalitigi, malkvalite, senkvalitiĝi* ktp.). La tiamaniere formitaj derivaĵoj estas regulaj, do ŝhemaj; ili proksimigas Esperanton ankaŭ al la neeŭropaj lingvoj.

- *naturalismo* - tendenco konservi la tradiciajn formojn de la internaciaj vortoj. La naturalismaj projektoj de la internacia lingvo (occidental, interlingua) klopodas konservi ankaŭ la historiajn ortografion, finaĵojn kaj malregulajn derivaĵojn (*orthographia, qualitation, responder - responsa*), por ke ili aspektu je la unua vido nature, do naturalisme. Ankaŭ Esperanto transprenas internacie konatajn malregulajn derivaĵojn, sed donas al ili sian ortografion, siajn finaĵojn kaj manipulas ilin kvazaŭ ili estus memstaraj vortradikoj, do regule (*agi - agente - akto - aktiva - reakcio*).

Ofte ekestas grupoj da sinonimaj vortoj, el kiuj unuj estas rezultoj de la tendenco naturalisma, aliaj de la ŝhemisma (*reformatoro - reformisto; toreadoro - toreisto; agrikulturo - agrokulturo terkulturado; micetologio - mikologio - fungoscienco*). Tiuj esprimoj interbatalas pri ekzistorajto en Esperanto, sed ofte ili kompletigas unu la alian (*ĉi tiu toreadoro apartenas al niaj plej bonaj toreistoj*). Similaj esprimoj ne ĉiam estas tute sinonimaj (*prezidento - prezidanto; studento - studanto*). La beletro preferas la ŝhemismajn vortojn, dum la naturalismajn aplikas precipe la fakliteraturo, kvankam ankaŭ en ĝi ekzistas forta tendenco al ŝhemigado, kiu ebligas pli logikan aranĝon de terminoj en sistemon. Problemoj estas ĉefe ĉe la vortoj akceptataj el la angla kaj franca lingvoj, en kiuj la prononcado grave diferencas de la ortografio. Kelkaj vortoj eniras en Esperanton laŭ la ortografia formo (*relajso* - el la franca "relais"), aliaj laŭ la prononca formo (*uesto* - laŭ la angla "west" kaj laŭ la franca "ouest", prononcataj "ŭest").

7.3. Fontoj de Esperanto. Tri kvaronoj de la Esperanta vortprovizo devenas el la latino kaj latinidaj lingvoj, tial Esperanto tre similas al la itala kaj hispana. Zamenhof enkondukis multajn vortojn germanajn (*hundo, knabo, ŝranko*). El la ceteraj lingvoj estas prenataj precipe naciaj specialaĵoj (*knedlikoj, samovaro, gulaŝo, karateo, turbano, bumerango, vigvamo* ktp.). La

M. MALOVEC: Gramatiko de Esperanto

angla lingvo influis precipe la gramatikon, kvankam tre fortaj estas ankaŭ influoj de la slavaj lingvoj (ortografio, sintakso, stilo) kaj de neeŭropaj lingvoj (aglutineco).



STILISTIKO

8.1. Stilaj ebenoj.

Fundamenta stilo estas la stilo komunuza, kiun oni parolas en la ordinara vivo, kaj kiu aplikas la fundamentan vortprovizion. Pli malalta, pli kruda formo de la komunuza stilo estas slango, transiranta iam eĉ al vulgareco kaj trivialeco, precipe ĉe la kriminaluloj, kies parolo estas nomata argoto. La plej perfektan disvolviĝon de la komunuza stilo oni trovas en la stilo beletra, kiu uzas rakontadon simile kiel la stilo komunuza, sed per pli riĉa vortaro kaj zorgas pri la estetika efiko de siaj priskriboj. La stilo publicista staras meze inter la stiloj beletra kaj faka, ĉar ĝi klopodas vigle kaj atentokapte bildigi fakajn temojn. Pri la plej preciza esprimado sen estetika efiko penas la stilo faka, kiu estas karakterizata per normigado de fakaj nomoj, alivorte terminoj. Tamen ankaŭ multaj fakaj verkoj posedas grandan estetikan valoron, precipe la historiaj kaj filozofiaj. Aparta speco de la faka stilo estas la substilo administracia, kiu prezentas voloĵojn de aŭtoritatoj. Ĉiuj stiloj komune formas unu lingvon, ĝiajn stilajn ebenojn. Por ĉiu ebena konvenas aliaj postuloj, ofte kontraŭstarantaj. Por la beletra stilo taŭgas multaj sinonimoj sen preciza signifo, dum la stilo faka strebas elimini la sinonimojn kaj ĉiun terminon unusence difini. Plenumo de bezonoj de unu stilo ne malhelpas plenumon de bezonoj de alia stilo.

8.2. Stiligadoj neŭtrala kaj sent-esprima.

Se oni uzas simplajn vortojn en ordinara parolo (*sur la tablo lumis lampo*), temas pri stiligado neŭtrala. Sed kiam oni uzas pli viglan, nekutiman esprimiĝon (*sur la tablo palpebrumis lampo*), temas jam pri stiligado sent-esprima, kiu prezentas subjektivajn sentojn kaj sintenojn de la rakontanto. La plej oftaj manieroj de la sent-esprima stiligado estas uzo de et- kaj aĉ-vortoj (*hundeto, hundaĉo*), de slangismoj (*Heninde! Ĉu jam envenis la ideo en vian melonon?*) aŭ de vortfiguroj (*li batalis kiel leono*). Ĉiu emocia esprimiĝo (*Ho mia kara!*) estas sent-esprima, sed ne ĉiu sent-esprima parolo estas emocia. La neŭtrala stiligado estas karakteriza por la faka stilo, la sent-esprima por la stilo beletra.

8.3. Vortfiguroj kaj pensofiguroj.

Por fortigi la efikon de vortoj estas uzataj multaj vortfiguroj kaj pensonfiguroj, plej ofte kun sent-esprima karaktero. La *elipso* ellasas vortojn por ne ripeti ilin (*mia libro kaj la via = mia libro kaj via libro*), dum la *ripeto* plurfojigas ilin por emfazi (*antaŭ multe, multe da jaroj*); la *hiperbato* renversas la kutiman vortordon (*homon honestan ili kalumniis*), la *opozicio* apudmetas vortojn de kontraŭa signifo (*freneze saĝa, terure bela*), la *komparo* (li batalis kiel leono) povas ŝanĝi en *metaforon* (*tio estis batalo de leono kun hundoj*); uzata estas la *ironio* (*tiu nia familia geniulo!*); la *metonimio* esprimas signifon per vorto rilatanta (*bela mano = bela skribo; homo sen koro = homo kruela*), la *sinekdoko* anstataŭigas la partojn per la tutaĵo (*alkuris la tuta vilaĝo = ĉiuj vilaĝanoj*). La *eŭfemismo* mildigas esprimojn (*la avineto forpasis = mortis*), dum la *disfemismo* krudigas ilin (*la maljunulinaĉo kadavriĝis; la inaĉo vomis sian animon*). La *gradacio* gradigas (*homo diligenta en laboro, honesta en sia vivo, fidela en la amo*), la *hiperbolo* troigas (*li fortas kiel urso*). La *retorikan demandon* respondas la parolanto mem (*Kie estas la kaŭzo? Nur en lia maldiligentado!*). Vort- kaj pensofiguroj ekzistas ankoraŭ tre multaj.

8.4. Frazologiaj esprimoj.

Parolante kaj skribante oni ofte uzas fiksiĝintajn vortkonstruojn, idiotismojn, parolturnojn kaj proverbojn (*tion li ne afiŝos; ĉie li vidas fantomojn; pinĉa frostoj; droni en mallumo; doni sian sangon por la patrujo; praktiko instruas nin; ĉie estas ĉarme, sed hejme plej varme*). En Esperanto kreis kaj notis multajn frazeologiajn esprimojn Zamenhof (Proverbaro) kaj Kalocsay (6000 frazeologiaj esprimoj). Frazologiaj esprimoj eniras en Esperanton precipe pere de la beletro.

8.5. Kelkaj stilaj apartaĵoj de Esperanto:

- a) Esperanto tre ŝatas infinitivojn (*mi invitis amikon por tagmanĝi; li foriris sen adiaŭi min; antaŭ ol foriri mi pagis*), kiuj estas pli vivecaj ol substantivoj (*mi invitis amikon por tagmanĝo; li foriris sen adiaŭo; antaŭ la foriro mi pagis*);
- b) Esperanto tendencas kurtigi frazojn per infinitivoj, participoj kaj gerundioj (*ili pene laboris por gajni monon; venis mia amiko, loĝanta en apuda strato; laborante tutan nokton, li laciĝis*); c) Esperanto tre uzas adverbojn (*mi venis vizite al vi; li alnajtis la tabulon martele; mi iradis tien ĉiutage; li iras urben; surstrate promenas multaj homoj*);
- d) Esperanto ofte unuvortigas (*mansvingi, fingromontri, surmurigi, subtabligi, enpoŝigi, elpoŝigi, albordiĝi, surteriĝi*);
- e) Esperanto ŝatas verbigi substantivojn kaj adjektivojn (*marteli, eleganti, kontenti, abundi, disporde ĉambron, li harpagonas, flugilantaj anseroj, faŭkanta kavernoj*).



TRADUKADO

9.1. Specoj de tradukoj.

Parola tradukado, *interpretado*, postulas de interpretetisto kapablon rapide reagi kaj transdoni al la aŭskultantoj la ĉefajn ideojn de la parolanto; ne tiom gravas la precizeco, ĉar ne estas tempo por mediti pri la unuopaj detaloj. Por interpretado taŭgas do personoj, kiuj ne estas harfendaj kaj precizemaj, sed kiuj posedas iom aventureman naturon, ĉar interpretistoj kutime multe vojaĝas, ŝanĝas hotelojn kun duarangaj gastejoj, renkontiĝas kun plej diversaj homoj. Male la tradukistoj kutime enfermiĝas en sia laborĉambro, ĉirkaŭitaj de tutaj stokoj da enciklopedioj kaj vortaroj, kaj laboras kun fanatika precizeco.

La tradukoj estas ĝenerale dividataj je *fakaj* kaj *beletraj*. Por la fakaj tradukoj gravas racieco kaj terminologia precizeco, por la beletra tradukado ĉefas la estetikaj vidpunktoj. Komprenoble, tradukataj estas ankaŭ gazetaraj artikoloj, reklamoj, instrukcioj por manipuli maŝinojn aŭ uzi diversajn varojn - tiuj tekstoj foje pli proksimas al la faka literaturo, foje al la beletra.

La beletrajn tekstojn eblas dividi je *prozo*, *poezio*, *dramo* (proza aŭ versa) kaj *muzika poezio*. Sed ankaŭ la beletraĵoj estas tradukataj diversmaniere. *Gramatika* traduko estas uzata en lernejoj kiel helpilo por instruado de fremdaj lingvoj. La lernantoj tradukas tekston en sian gepatran lingvon kaj poste reen en la lingvon lernatan. Ne gravas la estetikaj vidpunktoj, gravas nur la gramatika kaj enhava ĝusteco. *Lingvistika* traduko estas plenumita de lingvisto sen artisma ambicio pro sciencaj celoj (ekz. ĉe antikvaj tekstoj), por ke aliaj sciencistoj (historiistoj) sciu, kio precize estas skribita en la teksto. Lingvistika traduko povas servi ankaŭ kiel baza helpilo por artisto, kiu ne konas la originalan lingvon. Lingvisto kaj artisto tiamaniere kunlaboras por traduki el ekzotaj aŭ antikvaj lingvoj gravajn beletraĵojn konservante ilian belecon. *Artisma* traduko jam celas reprodukti ĉiujn estetikajn kvalitojn de la originalo kaj anstataŭi la originalon en la kulturo de la traduklingvo. Sub beletra traduko oni kutime pensas pri la artisma.

9.2. Teorio de bildo.

La beletro priskribas la vivon, tial necesas traduki la vivon, ne unuopajn vortojn. Ĉefe la prozo bildigas scenojn el la vivo de homoj, prezentas iliajn interparolojn, kaj ankaŭ la verkisto rakontas tiel vive, kvazaŭ li estus sidanta en apuda fotelo kaj laŭvoĉe bablanta kun sia leganto.

La faka literaturo klopodas efiki je nia racio kaj esprimiĝas per precizaj vortaj stiligoj, ofte per normigitaj terminoj kaj sciencaj difininoj, kiujn ni bezonas plurfoje malrapide tralegi por kompreni ilian logikon.

La beletro penas impresi nian fantazion kaj niajn emociojn, tial ĝi uzas bildojn, kiuj efikas neprecize, sed tuj. Legante "*ŝia koro ekstremis*" ni imagas, ke la heroino ion ektimis, sed ni ne imagas, ke la koro en ŝia brusto efektive komencis vibri - la metaforo efikas kiel kompleto, kiel bildo, ne kiel unuopaj vortoj.

Fakulo priskribas malnovan lokomotivon, kiu ne kapablis veturi pli rapide ol 10 km/h, dum artisto esprimas la saman ideon per bildo: *La lokomotivo galopis kun tia bruego, ke ĝi panikis paŝtanta sin ĉevalidon - la ĉevalido preterkuris la lokomotivon, transsaltis la relojn antaŭ la lokomotiva muzelo kaj fuĝis direkte al la bieno.* (La ĉevalido estis pli rapida ol la lokomotivo.)

Por la bildo sufiĉas nur la plej karakterizaj detaloj: *Kun lacigitaj okuloj ŝi fine fermetis la palpebrojn kaj vidis, kiel en tenebro kaj vento tremetas gasflamoj kaj antaŭ teatraj frontonoj kun granda rapideco deruliĝas la fiakraj ŝtupetoj.* (Flaubert) Ni legas plu kaj memoras, ke la sinjorino sopiras pri teatra tumulto en urbego, sed se oni demandus nin, kiujn vortojn Flaubert uzis por elvoki la bildon antaŭ nia anima vido, ni apenaŭ kapablus respondi sen denove enrigardi la libron. Kaj ĝuste tiel devas esti: kiel ĉe mozaiko ni devas percepti bildon, ne aron da ŝtonetoj, same ĉe priskribo ni vidu bildon, ne aron da vortoj.

Ĉiu nenormalaĵo aŭ strangaĵo ĉe priskribo, ekzemple neologismo aŭ monstra derivaĵo aŭ mallerta vortordo, tiras al si la atenton de la leganto kaj deturnas la atenton de la priskribata bildo, rompas ĝin (same kiel malbone sidanta ŝtoneto en mozaiko frapas la okulojn).

Bildo estas pli forta, pli impresa, se ĝi konsistas el vortoj konkretaj ol el vortoj ĝeneralaj: *sur arbo sidis birdo kaj kantis - sur tilio kaŭris pasero kaj trilis.* Same pli efikaj estas radikvortoj, kiuj efikas tuj, ol kunmetaĵoj, kiuj postulas racian analizon, precipe la negativaj: *la ĉevalo trenmarŝis plu - la ĉevalo rampis plu; malvarma, sensuna, negaja tago - friska, griza, morna tago.*

9.3. Kontraŭaj opinioj pri la manieroj de tradukado.

Dum la jarcentoj ŝanĝiĝadis opinioj pri tio, kiamaniere traduki, kiajn trajtojn de la originalo emfazi kaj kiajn dampi. Ankaŭ nun la tradukantoj ne estas unuecaj. Aperas jenaj kontraŭaj opinioj:

- Traduko laŭvorte reproduktu la tekston de la originalo

- Traduko reproduktu la ideon de la originalo
- Traduko legiĝu kvazaŭ originalo
- Traduko malkaŝu, ke ĝi estas nur traduko
- Traduko konservu stilon de la origina aŭtoro
- Traduko emfazu la individuan stilon de la tradukanto
- Traduko odoru de la epoko, en kiu estis ĝis la originalo
- Traduko freŝu laŭ la tempo, en kiu ĝi mem estis ĝis
- Traduko ne permesas aldonojn nek eliminojn
- Traduko rajtas la tekston redukti aŭ ampleksigi
- Traduko evitu rimedojn, kiuj mankas en la originalo
- Traduko plene apliku la riĉecon de la traduklingvo
- Traduko transportu la scenejon al la traduklingva lando
- Traduko konservu la nacian karakteron de la originalo
- Traduko respektu la versformon de la originalo
- Traduko apliku versformon taŭgan por la traduklingvo
- Versojn prefere traduku proze ktp.

La problemon de tradukado bone karakterizas ankaŭ la fama anekdoto: "Tradukoj similas al virinoj - se ili estas fidelaj, ili ne estas belaj, se ili estas belaj, ili ne estas fidelaj."

9.4. Evoluo de la tradukmetodoj en la historio.

La *mezepoka* tradukisto simple alirakontis la nereligiajn tekstojn konsideante la rezulton sia propra verko, dum la religiajn skribaĵojn li tradukis per sklaveca laŭvorteco, vorton post vorto, perfortante eĉ la gramatikon, kvankam la rezulta teksto estis preskaŭ nelegebla kaj malfacile komprenebla. Sed li ne kuraĝis "korekti la vortojn de Dio".

La *humanismo* jam postulis, ke oni ne traduku izolajn vortojn, sed signifon post signifo, ideon post ideo, kaj ke oni uzu korektan kaj facile kompreneblan lingvaĵon. La protestantismaj tradukoj de Biblio eĉ aktualigis vivrealaĵojn, anstataŭigante turbanojn per ĉapeloj, papirusajn volvaĵojn per libroj, kuŝadon ĉe la manĝo per sidado k.s.

La *baroko* pro propagandaj, kontraŭprotestantismaj celoj klopodis folklorigi la tradukojn ankoraŭ pli, por ke ili pli facile disvastiĝu en la popolo kaj helpu likvidi la influon de la protestantismo. Male, la fiera *klasikismo* konsideris ĉion folkloran maldigna por la literaturo; la tradukistoj penis rivale "pliperfektigi" la aŭtoron, elsarki ĉion "nepoezian" (ekz. nazpurigadon), uzi sole poetismajn esprimojn. Ambaŭ manieroj uniformigas la verkojn kaj senigas ilin de la originaleco. La aŭtoroj ofte uzas diferencajn stilojn por

karakterizi la unuopajn heroojn de siaj verkoj; en la folklorigitaj aŭ poetigitaj tradukoj la karakterizaj diferencoj malaperas.

La *romantikaj* tradukistoj pietate subiĝis al la aŭtoro, dezirante prezenti lin al la legantaro tia, kia li efektive estas, eĉ kun liaj mankoj, konservi lian stilon kaj esprimmanieron. Kiel idealo estis por ili traduko preskaŭ laŭvorta, imitanta ĉiujn apartaĵojn de la originalo, eĉ se ili impresis strange kaj nenature en la traduko, ĉar la romantikuloj opiniis tiujn apartaĵojn karakterizaj por la aŭtoro.

La *realisma* traduko klopodis aspekti kiel originalo, se la aŭtoro verkus ĝin en la lingvo de la tradukisto. La traduko imitis la stilajn manierojn kaj kutimojn de la aŭtoro, aplikante ilin je la nova lingva materialo. La interpretisto ne tradukis laŭvorte la karakterizaĵojn de la aŭtoro, sed serĉis en sia propra lingvo esprimilojn, havantajn similan efikon. Ĉar la realisma tradukisto deziris, ke lia traduko impresu la leganton same kiel la originalo, li ofte transportis la scenejon de la rakontado el fremda lando kaj malproksima pasinteco al sia lando kaj sia epoko. Sed tiamaniere li ŝanĝis la kolorecon kaj atmosferon de la rakontado.

La *naturalistoj* konsideris sia devo konservi la nacian karakteron de la verko, por ke la leganto sentu, ke li legas romanon anglan, francan, rusan ktp., kvankam li legas ilin ĉiujn en sia gepatra lingvo. Ili ne nur ne transportis la scenejon, sed klopodis akcenti la fremdan medion spicante sian tradukon per fremdismoj (anglismoj, francismoj, rusismoj ktp.). Ili ekzemple tradukis kelkajn idiomojn aŭ proverbojn laŭvorte, de tempo al tempo konservis nekutiman vortordon k.s. Sed la fremdismoj ĝenas la leganton, aspektas nenature.

En la *moderna tempo* ekzistas pluraj skoloj, kiuj akordiĝas en la postulo, ke la tradukanto prezentu al la publiko ne sin mem, sed la tradukatan aŭtoron, ne plibonigadu lian verkon laŭ sia bontrovo, sed interpretu ĝin kun ĉiuj kvalitoj pozitivaj kaj negativaj, kun plena riĉeco kaj esprimiveco de lingvaĵo, kun karakterizaj distingoj inter parolmaniero de sociaj tavoloj (nobelo, pastro, soldato, maristo, kamparano, laboristo - ĉiu el ili uzas alian vortaron, alian kulturon de esprimado). La tradukanto servu modeste kaj humile al la tradukata aŭtoro. Sed ofte la unuopaj skoloj diferencas en la opinioj, kiel la postulojn efektiviĝi. Kelkaj akceptas eĉ reduktadon de tekstoj, aliaj ĝin strikte rifuzas.

9.5. Tri etapoj de la tradukista laboro

La tradukanto klopodas:

- unue kompreni la originalon,
- due interpreti ĝin
- kaj fine realigi la tradukon per reverko en alia lingvo.

9.5.1. Kompreni la originalon.

La kompreno de la originalo okazas el du vidpunktoj:

- kompreno de historiaj kaj filologiaj faktoj
- kompreno de estetikaj kvalitoj

La aŭtoro bildigas la realon laŭ sia subjektiva vidmaniero, la tradukanto interpretas la aŭtoran mesaĝon. La legantoj volas konatiĝi kun la opinioj de la aŭtoro kaj esplori la mondon per liaj okuloj; ili fidas al la tradukinto, ke li prezentas en la traduko ne sin mem, sed efektive la aŭtoron eĉ kun liaj mankoj kaj eraroj.

Antaŭ ĉio necesas kompreni la historiajn kaj filologiajn faktojn en la verko. La historiaj faktoj estas ekzemple ironiaj aludoj je politika situacio aŭ stato de la teknika evoluo (vestado, fotado, trajnado, aŭtomobilado ktp. antaŭ cent jaroj estis io alia ol hodiaŭ). Al la filologiaj faktoj apartenas ekzemple la emocia magio de la numeralo **tri** en fabeloj kaj fabloj (do ne eblas tiun numeralon ŝanĝi pro rimo aŭ ritmo) aŭ proverboj rilatantaj al certaj historiaj okazaĵoj (pri "Judasa kiso" ne eblas paroli en la antaŭkristana epoko aŭ en budhana medio). Okazas eĉ, ke la tradukanto ne komprenas, ke temas pri frazeologia esprimo, kaj tradukas ĉion laŭvorte, ŝanĝante tute la sencon de la teksto. Ekzemple la angla "kapti krabon" dum boatado ne signifas ĉasi krabojn, sed mallerte tuŝi la akvonivelon per la remilo.

Due necesas dediĉi atenton al la estetikaj kvalitoj de la originalo. Simpla leganto lasas sin emocii de ili subkonscie, sed la tradukanto ilin perceptas, komprenas kaj analizas per sia prudento. Li deĉifras, per kiaj rimedoj la aŭtoro atingas siajn efikojn kaj individuigas sian stilon. Metiaj tradukantoj inklinas traduki vorton post vorto, la tuton ne prenante en konsideron. La kreiva tradukisto imagas la tutan bildigitan realon, ne nur en izola frazo, alineo aŭ ĉapitro, sed en la tuta libro. Tradukado estas senĉesa decidado inter pluraj variantoj, el kiuj neniu precize ekvivalentas al la originalo, necesas elekti inter esprimoj tro fortaj kaj esprimoj tro malfortaj. Tial la tradukanto bezonas koni detale la tutan verkon kaj naturon de la herooj, por ke li povu prijuĝi, kiu el la eblaj variantoj plej taŭgas por la konkreta situacio aŭ persono. Li do ne tradukas vortojn, sed bildojn. Bildojn de la realo. Temas pri realo enkadre de la verko, laŭ subjektiva vidmaniero de la aŭtoro, ne pri la objektiva realo laŭ enciklopedioj. La tradukisto klopodas imagi la mondon tiel, kiel ĝin imagis la aŭtoro. Ekzemple tradukanto de Faŭsto prezentas al la legantoj sian opinion pri tio, kion Goethe opiniis, ke opinias Faŭsto.

9.5.2. Interpreti la originalon.

La lingvo de la tradukanto havas alian palettron de koloroj kaj alian gamon de nuancoj ol la lingvo de la aŭtoro. Preskaŭ ĉiu vorto povas esti tradukebla en alian lingvon per pluraj esprimoj, el kiuj ĉiu parte sinonimas, sed neniu plene ekvivalentas. La diferencoj estas ne nur en la enhavo de la vortoj, sed ankaŭ en ilia stila uzeblo (komunuzaj, poeziaj, slangaj), en emocia forto (neŭtralaj, laŭdaj, insultaj), en eksterlingvaj asocioj (aludoj pri naciaj kutimoj, historio kaj kulturo estas ofte nekompreneblaj por alinacianoj).

Ekzemple por elekti inter la esprimoj *dando*, *fripono*, *diboĉulo*, *ekstravaganculo*, *senpripensulo*,

ventkapulo, *ĝigolo*, kiu karakterizu iun el la herooj, necesas koni la tutan verkon por scii, kiel la koncerna persono aĝas, agas, kondutas, vivas, ĉu li misfaras pro malica, eĉ krima fikaraktero aŭ nur pro juneca senzorgema temperamento, ĉu en krizaj momentoj li kondutas noble kaj kuraĝe aŭ fie kaj poltrone ktp. ktp.

Sed en la interpretado kaŝiĝas ankaŭ certa danĝero. La priskribitaj agoj aŭ personoj povas memori la tradukanton pri liaj propraj problemoj kaj li poste tendencas subkonscie meti en la verkon trajtojn, kiujn la originalo ne posedas. La tradukanto ŝatas certajn esprimojn aŭ gramatikaĵojn, kiujn li aplikas en la traduko, kaj elvokas tiamaniere impreson, ke la aŭtoro ilin ŝatas. La tradukanto ne forgesu, ke lia tasko estas prezenti al la legantoj la aŭtoron, ne sin mem. La plej bona estas tia tradukanto, kiu plene submetiĝas kun siaj talentoj al la aŭtoro, penante servi lin.

9.5.3. Reverkado de la teksto

La tradukanto vestas la pensojn kaj bildojn de la aŭtoro per novaj vortoj en alia lingvo. Tiuj vortoj havas diferencon sonon, longecon, ritmon kaj melodion, sed ankaŭ malsamajn stilajn nuancojn (slanga, poezia, dialekta, arkaika, faka, emocia, flata, malbena k.s.), diferencon tradicion en uzado, kaj sekve impresas la leganton alimaniere ol la vortoj de la originalo. Ankaŭ la gramatikaĵoj havas en ĉiu lingvo alian oftecon de uzado, la sama gramatika formo povas en unu lingvo efiki normale, en alia arkaika, poezie aŭ male folklore, eĉ vulgare aŭ tute nenature. La vortoj kuniĝas en frazojn, ofte kliŝajn: proverboj, parolturnoj, veterprognozoj, ekkrioj, suspiroj, deziroj, epitetoj ĉe substantivoj aŭ verboj, rilatoj inter verboj kaj kutimaj prepozicioj estas pli malpli stabiliĝintaj en lingvoj, la saman ideon esprimas ĉiu lingvo per alia frazeologia kliŝo. La lingvoj diferencas eĉ per uzado de interpunkciaj signoj, ekzemple punktokomo kaj dupunkto, kaj per vortordo (la sama vicigo de vortoj en ĉiu lingvo donas alian impreson, havas alian stilan valoron). Ankaŭ al fremdvortoj, et-vortoj kaj karesvortoj ĉiu lingvo rilatas siamaniere.

Ĉiu lingvo posedas sian normon, tio signifas, ke certaj leksikaj, gramatikaj kaj stilaj rimedoj estas sentataj kiel "normalaj", stile neŭtralaj, dum ĉiuj ceteraj efikas kiel spicaĵo, kiu donas al la teksto apartan guston kaj originalan aromon. Tiu spicaĵo povas nuanci la tekston al tono poezia, arkaika, slanga, folkloro, vulgara, sed ankaŭ impresi kiel simpla mallertaĵo, gramatike ja ĝusta, kaj tamen fremda al la koncerna lingvo. Kutime odorigas la frazon esprimoj emociaj (ekskrioj, ĝemoj, insultoj, karesoj), sed ankaŭ senemociaj nekutimaĵoj, kiel inversigoj de vortordo aŭ personigo de objektoj (*knabino bela tie staris, lampo palpebrumis sur la tablo, la motoro singultis* ktp.).

La tradukanto bezonas scii la diferencojn inter "siaj" du lingvoj: kio en la traduklingvo mankas kaj kio male superfluas, kio ekzistas en ambaŭ lingvoj kun la sama valoro kaj kio havas valoron malsaman.

Poste li staras antaŭ dilemo:

- se li **ne** utiligos specialaĵojn de sia lingvo, kiuj mankas en la lingvo de la originalo, lia

lingvaĵo nepre estos malpli riĉa ol en la originalo; la aŭtoro de la originalo certe aplikis ĉiujn riĉaĵojn de sia lingvo, el kiuj multaj ne ekzistas en aliaj lingvoj, do se la tradukanto rezignas kompensi ilin per aliaj riĉaĵoj, neeviteble lia traduko estos malpli kolora ol la originalo

- se li utiligos specialaĵojn de sia lingvo, kiuj mankas en la lingvo de la originalo, lia lingvaĵo povas esti same riĉa kaj multkolora, ja eĉ pli bunta ol la originalo; sed aliflanke li povas troigi sian inventemon kaj tiom ŝanĝi la tekston, ke ĝi portos alian mesaĝon, ol kiun lanĉis la aŭtoro.

Kompreneble, plej multe gravas, kian rolon ludas la lingva inventemo en la originalo. Ekzistas tekstoj, kiuj plenas de vortludoj kaj ŝercoj, kio postulas similan ŝercan vortludemon ankaŭ en la traduko, aliaj tekstoj estas sobraj, modestaj, seriozaj, ĉe kiuj ŝercemo povas ĝeni.

9.6. Procedo de la tradukado.

Tradukisto unue legas la tradukotan verkon kiel simpla leganto, lasante sin ĉarmi per la beleco de la verko kaj per filozofio, kiun la aŭtoro mesaĝas al la mondo.

Dum la dua legado li jam atentigas kiel estonta tradukanto kun krajono en la mano, substrekas la aŭtorajn specialaĵojn, kiuj spicas la tekston kaj karakterizas la individuan stilon de la verkisto aŭ dirmanierojn de unuopaj figuroj. En kajeron li enskribas esprimojn, frazojn, proverbojn, koncize: apartaĵojn, ĉe kiuj supozeblas tradukaj malfacilaĵoj.

Post la dua tralego sekvas analizo de la substrekitaj esprimoj kaj serĉado de adekvataj esprimiloj en la cellingvo, solvado de la traduk-enigmoj, enskribitaj en la kajero. La tradukisto serĉas "traduk-ŝlosilon", koncepton, kiun li aplikos ĉe tradukado de la ĝuste analizata konkreta verko.

Nur dum la tria legado okazas samtempe la propra tradukado.

Sekvas periodo, kiam la finitan tradukon tralegas pluraj kontrolantoj, dume la tradukinto mem "ripozas" (kutime tradukas alian verkon), por liberiĝi de la influo de la originalo. Post kelkaj monatoj, kiam li parte forgesis sian laboron, li denove tralegas la tradukon kvazaŭ tekston de alia tradukisto. Nun li pli klare vidas mankojn kaj erarojn, kiujn li faris sub influo de la originala lingvo, samtempe li povas pli objekte prijuĝi la rimarkigojn de la kontrolintoj.

9.7. Studoj pri la aŭtoro.

Vere responsemaj tradukistoj ne kontentiĝas nur per la tradukata verko mem. Antaŭ la komenciĝo de la laboro ili klopodas konatiĝi kun la biografio de la tradukota aŭtoro, kun la politika kaj socia situacioj en lia tempo, kun verkoj, kiujn li verkis antaŭ kaj post la tradukata libro kaj kiuj dokumentas la evoluon de lia arto. La verkoj kutime enhavas multajn aludojn je tiutempaj reĝimoj, skandaloj, sociaj movadoj, filozofioj, sen kiuj la

tradukanto ne povas la verkon kompreni kaj ĝuste interpreti por la nuntempaj legantoj en alia lingvo. Eĉ la historiaj romanoj en historia vesto okupiĝas pri problemoj, kiuj skuis la socion, en kiu la aŭtoro vivis, kaj je kiuj li reagis per sia verkaro.

9.8. Libereco de tradukanto.

Estus grava eraro starigi ian normon, laŭ kiu oni devas traduki. La tradukisto bezonas certan krea liberecon, post kiu tamen ne rajtas kaŝiĝi malseriozeco, neglektemo, fuŝemo aŭ supraĵemo. Ĉiu originalo ebligas plurajn interpretojn en alia lingvo, kiuj ĉiuj - malgraŭ siaj diferencoj - povas esti ĝustaj kaj pravigeblaj. La unuopaj interpretadoj povas diferencii laŭ la unuopuloj kaj laŭ ilia sentado, sed ankaŭ laŭ iliaj epokoj kaj lokoj.

Tamen, la tradukanto sciu kaj konsciu, kiaj ebloj de tradukado ekzistas, per kiaj diversaj manieroj eblas traduki konkretan tekston aŭ teksteron. Tradukado de beleto estas problemo samtempe lingvistika kaj artisma. Ne eblas traduki tekston nur laŭ lingvistikaj vidpunktoj, neglektante la estetikan flankon de la afero, nek interpreti la tekston sole laŭ sia lingva sento kaj intuicio, fidante sian artisman geniecon, kaj malrespektante la lingvosciencan studadon de tradukotaĵo. Bona tradukisto bazas sian arton sur serioza lingvistika analizo de la teksto.

9.9. Kvin tipoj de ekvivalenteco ĉe tradukado.

1) Pri la unua tipo oni parolas tiam, kiam du lingvoj uzas tute aliajn vortojn, kun alia signifo, tamen la rezulta efiko estas sama. La ĉeĥa "farti kiel porko en sekalo" signifas la saman kiel la Esperanta "vivi kiel kuko en butero" - ambaŭ esprimas, ke iu ĝuas bonfarton. La unua tipo konservas "la celon de komunikado".

2) Ĉe la dua tipo krom la celo de komunikado estas konservata ankaŭ la sama konkreta situacio. Anglo "respondas la telefonon",

ĉeĥo "levas la aŭskultilon". Fakte okazas ambaŭ agoj, ĉar oni devas unue levi la aŭskultilon kaj poste respondi.

3) En la tria tipo estas priskribataj la samaj trajtoj de la situacio, per similaj vortoj, kiuj tamen estas diference organizitaj, ekzemple per negado de mala trajto: "*Tio povas finiĝi por vi malbone.*" - "*Tio ne estos bona por vi.*" La detaleco de priskribo povas esti ĉe la traduko malpli alta ol ĉe la originalo (*Li eltiris el la tablo la tirkeston, elmetis cigaredojn kaj proponis ilin al Petro* - *Li eltiris el la tablo cigaredojn kaj proponis ilin al Petro*) aŭ male pli alta (*Mi vidis, ke estis prezentita demando* - *Mi legis en ĵurnalo, ke estis prezentita demando*). Tio okazas precipe tiam, kiam en ĉiu el ambaŭ lingvoj validas alia konvencio: *viva praktiko pruvas, ke ... - el konkreta praktiko oni scias, ke ...* Kelkaj lingvoj ebligas kunmeti kopule en la sama ebena kvalitojn daŭran kaj momentan, dum en aliaj lingvoj tio ne eblas: *Li estis svelta kaj dormema, kiam li enlitiĝis.* - *La svelto estis dormema, kiam li enlitiĝis.*

4) La kvara tipo de ekvivalentoj estas tiuj, kiam oni uzas la samajn vortojn, sed en unu

lingvo estas aktiva voĉo kaj en alia la pasiva (*oni rulis ŝtonon - la ŝtono estis rulata*) aŭ subpropozicio estas anstataŭigita per gerundio aŭ verba substantivo k.s. (*mi manĝis, kiam mi venis hejmen - mi manĝis veninte hejmen - mi manĝis post alveno hejmen; mi diris al li, kion mi pensas pri ŝi - mi diris al li mian opinion pri ŝi*). Tiuj ĉi ekvivalentoj ekzistas ankaŭ interne de unu lingvo.

5) En la kvina tipo estas la koincido inter originalo kaj traduko maksimuma: *The house was sold for 10 thousand dollars. - La domo estis vendita por 10 mil dolaroj.*

9.10. Danĝero de troa banaleco kaj logikeco en traduko

Analizante tradukojn kaj komparante ilin kun la originaloj, oni rimarkis du gravajn tendencojn, kiuj aplikiĝas dum la tradukado:

a) La tradukistoj tendencas uzi pli ĝenerale konatajn vortojn kun pli larĝa, sed malpli preciza signifo, uzi stilajn ŝablonojn. Ekzemple "*rorado de leonoj*" ŝanĝiĝas al "*blekado aŭ muĝado de leonoj*", "*ronronado de aŭtomobiloj*" al "*murmurado, graŭlado aŭ bruado de aŭtomobiloj*", "*serpentumado de soldatoj*" al "*zigzaga rampado de soldatoj*" ktp. La esprimoj uzitaj de la originala aŭtoro estas malpli kutimaj kaj malpli banalaj, sed ĝuste tial pli trafaj, pli koloraj, pli reliefaj kaj pli impresaj. Kiam la tradukisto rimarkas, ke la aŭtoro intence uzis emocie fortajn esprimojn, li male inklinas troigi la emocian forton. Anstataŭ "*granda amaso da mono*" li tradukas "*mamuta amaso da mono*", anstataŭ "*Joĉjo gapis*" aperas en la traduko "*Joĉjo gapaĉis*" k.s. La pliintensigo kaj malintensigo de la emociaj esprimoj estas tradukmetodaj eraroj kaj la tradukantoj devas gardi sin kontraŭ ili.

b) La tradukistoj tendencas "klarigi" la tekston, fari ĝin pli logika ol en la originalo. Sed la aŭtoroj ofte intence formulas siajn frazojn malklare por elvoki streĉitan atmosferon (detektivaj kaj psikologiaj romanoj) aŭ ŝajne nelogike, ĉar tio donas al la teksto novan, pli impresan bildon. En la frazo "*mi estis kaptita, poste ili kuris tra ia koridoro kaj fine ĵetis min en ian kelon*" la rakontanto montras sian senpovon dirante "*poste ili kuris tra ia koridoro*" anstataŭ diri "*poste ni kuris tra ia koridoro*" aŭ "*poste ili kuris kun mi tra ia koridoro*", kvankam estas klare, ke li kuris kun ili. Tradukisto, kiu anstataŭ "*ili*" skribus "*ni*" aŭ "*ili kun mi*", farus la frazon pli logika, sed malpli impresa. Li difektus la artan bildon. Tamen "plilogikigoj" estas en tradukoj tre oftaj. Multaj tradukantoj inklinas al pli ofta uzo de konjunkcioj, por ke la teksto estu "pli flua". La aŭtoro intence evitis ilin por akiri certan efikon (*Li alkuris. Li sidiĝis. Li diris nenion.*), sed la tradukinto rompis la bildon per aldono de konjunkcioj. (*Li alkuris. Kaj li sidiĝis. Kaj li diris nenion.*).

Tamen en multaj situacioj la klarigoj taŭgas. Estas konsilinde skribi "la rivero Sázava, la vilaĝo Kr~enovice, la ĵurnalo Rovnost", ĉar la nomoj Sázava, Kr~enovice, Rovnost per si mem dirus nenion al eksterlanda leganto.

9.11. Kulturaj diferencoj

La tradukanto devas memori, ke li tradukas ne nur inter diferencaj lingvoj, sed ankaŭ inter

diferencaj kulturoj. Ĉiu teksto vekas en la leganto asociojn, kiuj troviĝas kvazaŭ malantaŭ la vortoj ekster la teksto, kaj tiuj eksterlingvaj asocioj diferencas laŭ la kulturoj historiaj aŭ geografiaj. Ekzemple nun estas azeno simbolo de stulteco, dum ĉe antikvuloj ĝi estis simbolo de seksa pasiemo kaj voluptemo. Ankaŭ "pano" kaj "domo" estas diferencaj en ĉiuj mondopartoj kaj historiaj epokoj. Ju pli malproksimaj estas la lando kaj la tempo de la originalo, des pli diference la verko estos komprenata de niaj legantoj.

9.12. Kompensoj.

La tradukanto ne rajtas plibonigi nek ŝanĝi la verkon, lia tasko estas prezenti al la legantoj la aŭtoron, ne sin mem. Sed se en la traduk-lingvo mankas certaj esprimrimedoj, la tradukanto povas serĉi konvenan kompenson, aliajn esprimilojn kun la sama aŭ simila efiko. Ekzemple unu vortludon oni povas anstataŭigi per alia, la poeziecon esprimi per inversa vortordo (*kato nigra*) aŭ per aldono de komparo (*kato nigra kiel nokto*), foje unu vorton de la originalo pli taŭge tradukas vortgrupo aŭ frazeologia frazo en la traduko. La tradukanto ekzamenas, kiajn esprimilojn la aŭtoro uzis, kion li volis atingi per ili, kiujn el ĉi tiuj rimedoj posedas la traduklingvo kaj kiujn necesas kompensi. Simple dirite, li serĉas traduk-ŝlosilon.

En poezio oni aplikas ekzemple aldonajn rimojn, kiuj en la originalo mankas, por kompensi netradukeblajn trajtojn de la originalo. Tiu metodo estas uzita ĉe *Bapto de caro Vladimir* de Karel Havlíček Borovský en traduko de Tomáš Pumpr. En la originalo ĉiu strofo havas nur unu riman paron, en la Esperanta traduko ofte tri parojn (*Vi sensperte vivas certe, / neestinte dio, / false ŝajnas, ke mi gajnas / en la profesio.*) La tradukisto certe ne volis "plibonigi" aŭ "korekti" la aŭtoron, sed simple kompensi spicon de folkloraj esprimoj en la originalo.

9.13 La preparo de la tradukonto.

La publiko ĝenerale akceptas, ke muzikistoj kaj kantistoj en operejo akiris muzikan kleriĝon en konservatorio, ankaŭ pri poeziaj tradukoj oni kredas, ke ilin faris efektivaj poetoj, majstroj de lingvo kaj de poeziaj formoj. Sed pri tradukado de prozo regas ĝenerale opinio, ke ĝi estas nenia arto nek scienco, kaj tial ĝin povas fari ĉiu, kiu scias paroli ambaŭ lingvojn kaj posedas sufiĉe grandan vortaron. Tiu miskompreno rezultigas tradukojn, kies kvalito similas al opero kantata de amatoroj sen ekzercitaj voĉoj kaj sen ia ajn scio pri muzika teorio.

La profesiaj tradukistoj rekrutiĝas el lingvistoj, kiuj kompletigis sian kleriĝon per studado de artiliteratura teorio, aŭ el verkistoj, kiuj kompletigis sian edukon per studado de lingvistiko. Tradukado troviĝas sur la limo inter arto kaj lingvoscienco. Simile kiel por restaŭri pentraĵojn ne sufiĉas esti bonega pentristo, sed necesas specialaj scioj (rentgenado, kemio, arthistorio), ankaŭ por tradukado necesas scioj, kiujn originala verkisto ne bezonas.

Por naciaj lingvoj ekzistas aŭ translatologiaj institutoj aŭ translatologiaj fakoj ĉe

universitatoj, kie la adeptoj - krom la fremda lingvo - studas ankaŭ lingistikon, stilistikon, teorion de tradukado kaj ankaŭ artteorion, ĉar kiu volas interpreti arton por aliaj, tiu devas antaŭ ĉio la arton mem kompreni.

Esperantaj tradukoj estas kutime laboraĵoj de amatoraj volontuloj, pli aŭ malpli talentaj, sed ofte tute ne konsciaj pri la tradukaj problemoj. Aŭ ili komprenas la problemojn nur el vidpunktoj gramatika kaj leksika, sed pri la artismaj ili eĉ ne scias, ke tia vidpunkto ekzistas.

En naciaj lingvoj haveblas sufiĉe ampleksa translatologia literaturo, kiun oni povas prunti en publikaj bibliotekoj, same kiel diversajn enkondukojn en lingvistikon kaj stilistikon. Por konatiĝi kun artaj problemoj taŭgas kritikoj de grandaj verkistoj kaj kritikistoj (Balzac, Dostojevski, Eliot, Orwell, Ingarden, S~alda ktp.), kiuj estas eldonataj libroforme en diversaj lingvoj. Kompreneble, tralego de tiuj libroj ankoraŭ neniun faros eksperto, sed vi almenaŭ ne saltos en tradukadon kiel Pinokjo en la maron, ne havante imagon pri ĝia grandeco.



LITERATURO

Esperantlingva:

- KALOCSAY, K. - WARINGHIEN, G.: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, UEA, Rotterdam 1980
- KOZ~ENÝ J.: Gramatiko de Esperanto, Tr~ebíc~
- SEPPIK, H.: La tuta Esperanto, BEA, Sofia 1971
- WARINGHIEN, G.: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, SAT, Paris 1970
- ZAMENHOF, L. L.: Proverbaro
- KALOCSAY, K.: 6000 frazeologiaj esprimoj, HEA, Budapest 1975
- KALOCSAY, K. - WARINGHIEN, G. - BERNARD, R.: Parnasa Gvidlibro, Heroldo de Esperanto 1968
- LAPENNA, I.: Retoriko, Rotterdam 1971
- WÜSTER, E.: Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko, Budapest 1936
- WERNER, J.: Terminologia kurso, Roudnice n. L. 1986
- SUONUUTI, H.: Terminologia gvidlibro, UEA 1998

Ĉeĥlingva pri translatologio

- Kniha o pr~ekládání (*Libro pri tradukado*), Praha 1953
- LEVÝ, J.: Ĉeské teorie pr~ekladu (*Ĉeĥaj teorioj de traduko*), Praha 1957
- LEVÝ, J.: Ume~ní pr~ekladu (*Arto de traduko*), Praha 1983
- Pr~eklad literárního díla. Sborník souc~asných zahranič~ních studií. (*Traduko de literatura verko. Kolekto de nuntempaj eksterlandaj studaĵoj*), Praha 1970
- LOTKO, E.: Ĉes~tina a pols~tina v pr~ekladatelské a tlumoc~nické praxi. (*La ĉeĥa kaj la*

pola en la tradukista kaj interpretista praktikoj), Ostrava, 1986

- PECHAR, J.: Otázky literárního překladu (*Demandoj de la literatura traduko*), Praha 1986
- HRALA, M.: Současnost uměleckého překladu (*Nuntempo de la artisma traduko*), Praha 1987
- Překládání a čes-tina (*Tradukado kaj la ĉeĥa*), Praha 1994
- 9x o překladu (*9x pri traduko*), Praha 1995
- Překlad a překladatel (*Traduko kaj tradukisto*), Praha 1998

Ĉeĥlingva kaj slovaklingva pri stilistiko kaj lingvistiko

- MISTRÍK, J.: S-tylistika (*Stilistiko*), Bratislava 1984
- HUBÁČEK, J. Učebnice stylistiky (*Lernolibro de stilistiko*), Praha 1987
- ONDRUŠ, S. - SABOL, J.: Úvod do štúdia jazykov (*Enkonduko en la studadon de lingvoj*), Bratislava 1981
- ERHERT, A. Základy jazykovédy (*Fundamentoj de lingvistiko*), Praha 1984
- PALEK, B.: Základy obecné jazykovédy (*Fundamentoj de ĝenerala lingvistiko*), Praha 1989
- SAUSSURE, F. de: Kurs obecné lingvistiky (*Kurso de ĝenerala lingvistiko*), Praha 1996

Ĉeĥlingva pri arto

- BALZAC, H.: Stati a korespondence (*Artikoloj kaj korespondaĵoj*), Praha 1988
- ORWELL, G.: Uvnitř velryby a jiné eseje (*Interne de la baleno kaj aliaj eseoj*), Brno 1997
- ELIOT, T. S.: O básnictví a básnících (*Pri poezio kaj poetoj*), Praha 1991
- INGARDEN, R.: Umělecké dílo literární (*Artverko literatura*), Praha 1989
- SEKERA, J.: Dar slova (*Donaco de vorto*), Ostrava 1980
- EISNER, P.: Chrám i tvrz (*Templo kaj ankaŭ citadelo*), Praha 1997
- MATHESIUS, V.: Kultura a slovesnost (*Kulturo kaj literaturo*), Praha 1982
- ČERNÝ, V.: Tvorba a osobnost (*Kreado kaj personeco*), Praha 1993
- MUKAROVSKÝ, J.: Studie z poetiky (*Studoj pri poetiko*), Praha 1982
- ŠALDA, F.X.: O předpokladech a povaze tvorby (*Pri premisoj kaj karaktero de kreado*), Praha 1978
- ZATLOUKAL, A.: Studie o francouzském románu (*Studoj pri la franca romano*), Olomouc 1995